

Anna Löwenstein



LA ŠTONA URBO

La ŝtona urbo

LA ŜTONA URBO

Anna Löwenstein

Kovrilo: junulino kun pleto (murpenraĵo el Stabia, apud Pompejo, 1an jarcenton pK).

La Ŝtona Urbo

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

n-ro 23 en la serio "Stafeto"



Tiu ĉi e-libro estas nekompleta provversio kaj rajtas esti kopiita laŭvole.

Memore al mia praonklo
Julius Löwenstein el Nurenbergo,
esperantisto

Antaŭparolo

Tre multnombraj estas la romanoj traktantaj pri okazaĵoj en la frua Roma Imperio kaj la komenciĝo de la kristana epoko – pensu ekzemple pri Quo vadis. La ŝtona urbo estas unu el tiuj. Sed laŭ mia sperto ĝi estas unika, ĉar ĝiaj rolantoj estas nek senatanoj nek korteganoj nek armeanoj, kaj la imperiestro – Nerono dum la lastaj ĉapitroj, sed apenaŭ eĉ nomita en la libro – estas nur flanke aludita. Ne, la rakonto priskribas la vivon kaj spertojn de sklavigita kaptitino, brita virino transportita al Romo kaj tie aĉetita de sufiĉe ordinara vilaoposedanto. Ni vidas la imperion, do, kvazaŭ desube. Eĉ en la diversaj romanoj pri Spartako kaj la ribelintaj sklavoj mankas fakte tiu perspektivo.

Nia aŭtoro tre lerte enscenigas nin. En la unua parto de la romano ni konatiĝas kun kelta socio en Britujo, kaj ni lernas multon pri la tieaj moroj kaj kutimoj. Poste ni kunvojaĝas al Romo kaj la sklava sorto. Tre lerte Anna Löwenstein sentigas al ni la konfuziĝon de virino perforte fortrenita al socio fundamente fremda, kun tute aliaj moroj kaj kutimoj, kies lingvon ŝi tute ne komprenas. Iom post iom ŝi adaptiĝas al la novaj cirkonstancoj. Post kelkaj jaroj ŝi devas translokiĝi al la “ŝtona urbo” mem, al Romo, kie ŝi estas liberigita kaj pasigas kelkajn jarojn kiel edzino de kopiisto, ĝis ili implikiĝas en la konata urba incendio dum la Nerona regotempo.

Granda merito de Löwenstein estas, ke ŝi sukcesas kroĉi nian atenton kaj stimuli nian intereson sen la trudo de fantaziaj sensaciaĵoj aŭ vera katastrofo (escepte de la kaptiĝo kaj la fajrego). Rezulte, la rakonto efikas kiel aŭtentika priskribo de reala vivo.

Alia merito estas, ke la fruajn kristanojn ŝi traktas tute ne ŝablone. Ŝia protagonisto mem ne konvertiĝas, kaj ŝi neniam tute aprobas ties sintenojn – precipe kiam ŝia propra filo firme aliĝas al la sekvantaro de Petro; sed la aŭtoro ne misprezentas tiujn fruajn kristanojn, destinitajn pereji en la amfiteatro kaj aliloke pro la Nerona persekutado. Historia aŭtentiko karakterizas ĉi tiun tutan verkon.

Kaj fine, grandan laŭdon meritas ŝiaj stilo kaj lingvaĵo. Ŝia Esperanto estas la komuna lingvaĵo, kaj oni legas ĝin flue, sen iu ajn risko karamboli kun la groteskaj entrudaĵoj, per kiuj tro multaj el niaj nuntempaj verkantoj makulas kaj stumbligas sian prozon, pretendeme kaj sinlaŭde. Vera plezuro estas, ensorbi tiun ĉi romanon, kiun mi senblage taksas estonta klasikaĵo de nia literaturo. Gratulon ĉiurilate al Anna Löwenstein!

William Auld

Antaŭparolo al la dua eldono

Post la apero de La ŝtona urbo en Esperanto, ĝi aperis ankaŭ en la angla. Laŭ peto de la anglalingva eldonejo, Citron Press, mi iom mallongigis la originalan tekston; precipe ĉe la dua duono de la kvina ĉapitro mi faris sufiĉe drastajn tranĉojn. Pro tiuj tranĉoj, la intrigo certe disvolviĝas laŭ pli celtrafa maniero, aliflanke perdiĝas pluraj scenoj, kiuj laŭ mi tamen kontribuas al la ĝenerala etoso. Tial mi ĝojas, ke en Esperanto eblas legi la plenan, kvankam malpli rapide moviĝantan, tekston.

Preparante la verkon por la angla eldonejo, mi kaptis la okazon por parte reverki la scenon en kiu romiaj komercistoj vizitas la keltan vilaĝon (p. 23-32). La rezulto, laŭ mi, estas pli trafa kaj konciza ol antaŭe. Tial mi decidis enpreni tiun plibonigitan tekston en ĉi tiun duan Esperantan eldonon.

Mi dankas la plurajn legintojn, kiuj atentigis min pri lingvaj eraretoj, kaj precipe la italan esperantiston, kiu afable informis min, ke la antikvaj britoj ne konis domajn katojn (kvankam ja sovaĝajn!). Tiujn malglataĵojn mi nun korektis.

Anna Löwenstein

BRITUJO

UNUA ĈAPITRO

Ni ĉiam diris, ke Morimanos estas la plej lerta rakontisto en la kvar vilaĝoj. Ne ofte li vizitis nian domaron, sed kiam li venis, nia kabano ĉiam estis plenega. La tuta familio de mia onklo venis por aŭskulti, kaj eĉ kelkaj parencoj de mia onklino el la najbara domaro ĉe la alia flanko de la monteto.

Mi aparte memoras unu tian okazon, kiam mi estis nur knabineto. Estis malvarma, griza vespero. Post pluraj tagoj da senĉesa pluvado, la du kabanoj en nia korto kaŭris malgaje sub siaj rondaj tegmentoj el trempita pajlo. Ni infanoj timis, ke Morimanos ne venos, sed bonŝance la pluvo iom malpliiĝis antaŭ noktiĝo, kaj je nia ĝojo li aperis. Ni rigardis dum li atente paŝis tra la kota grundo de nia korto, kiu estis muelita de tagoj da pluvo ĝis ĝi iĝis marĉo sulkita je akvoplenaj kavoj kaj truoj.

Haladzo de fumo ŝvebis en la tro plena kabano, krom kie sentiĝis kruela trablovo de la pordo, nefermita por enlasi la malfortan lunbrilon. La malvarma aero falĉis vojon inter la homoj, kiuj kunpremiĝis en la pli varmaj partoj de la ĉambro. Aparte sidis nur mia patro, sola, rekte en la trablovo, kun sia mantelo firme streĉita ĉirkaŭ la ŝultroj. Neniam ĝenis lin la malvarmo, kondiĉe ke li povis enspiri bonan, freŝan aeron. Lunradio brilis je la flanko de lia vizaĝo, kaj mi rigardis kun fascino kiel ĉiu movo de lia kapo lumigis alian trajton: lian ostecan nazon en unu momento, kaj poste la tremantan ekstremaĵon de liaj longaj lipharoj.

Longharan hundofelon oni jam etendis por Morimanos en la plej bona loko, proksime al la fajro sed ekster la fumo, kie ĉiuj povis vidi lin per la flagra lumo de la flamoj. Apud li estis mia patrino, nigra konturo kontraŭ la ruĝa ardo de la fajro. La plejmulto de la homoj sidis kun krucitaj kruroj sur la grundo, sed ŝi preferis sidi sur malalta arbostumpo, kie ŝi povis ŝpini ĉe la fajrolumo dum ŝi aŭskultadis la rakonton. Ŝi volvis la ŝpinilon kaj rekaptis ĝin per regulaj movoj, paŭzante nur por fortiri unu el siaj longaj harplektaĵoj de sia vizaĝo aŭ por alkroĉi mian fraton, Tasgjon ([noto 1](#)), pli firme al la mammo.

Mi kuŝis sur pajlamaso apud mia preferata kuzo, Kaljakos. Ni ĉiam elektis unu el la pli mallumaj anguloj, laŭeble plej fore de la malfermita pordo, kie ni povis ludi kaj sekrete flustri sub la malalta tegmento. Ĉi-nokte tamen nia atento estis komplete okupata pro la rakonto de Morimanos. Li estis parolanta pri Romo.

La domoj, laŭ li, estas tiel multaj kaj tiel multegaj kiel la fiŝoj en la riveroj, kiel la ŝtonetoj ĉe la bordo, kiel la ondoj de la maro, kiel la steloj en la ĉielo. Ili estas pli altaj ol la pintoj de la arboj kaj tiel proksimaj inter si, ke se oni vidus puton da greno, la greneroj en tiu puto ne estus pli kunpremitaj ol la domoj en Romo. La urbo etendiĝas tiome en ĉiu direkto, ke se oni prenus la tutan teritorion de nia popolo, tamen ĝi ne kovrus pli ol unu anguleton de la teritorio de Romo. Kaj tiuj domoj havas unu egan strangaĵon: ili estas konstruitaj ne nur flank-al-flanke sed ankaŭ unu super la alia. En kelkaj lokoj troviĝas eĉ tri aŭ kvar supermetitaj, tiel ke la loĝantoj paŝas super la kapoj

de siaj najbaroj.

“Kaj la kampoj, ĉu ankaŭ ili troviĝas supre en la aero?” demandis mia fratineto Vinda. Ŝi estis tro juna por scii, ke oni ne interrompu la rakontiston. Morimanos paŭzis en sia rakonto. “Tute ne estas kampoj,” li diris. “La domoj estas pli streĉe kunpremitaj ol la haŭto kontraŭ viaj ripoj, kaj eĉ ne arbo, eĉ ne branĉeto, eĉ ne herbero povas interpuŝiĝi inter ili. Neniu punkto da verdo estas videbla en tiu tuta urbo, eĉ ne punkteto tiel et-eta kiel la ungeto de via fingreto. Ĉar en tiu urbo, ĉio estas farita el ŝtono.”

“Sed kion la homoj manĝas?” mia fratino persistis. Mia patrino komencis silentigi ŝin, sed Morimanos respondis, “Mankas kampoj en tiu urbo, kaj tamen al la romanoj ([noto 2](#)) neniam mankas manĝaĵoj. Ĉar tie troviĝas konstruaĵoj tiel grandegaj, ke eĉ unu el ili povus kovri ĉi tiun tutan monteton de la piedoj ĝis la haroj. Kaj ĉiu konstruaĵo estas plena je manĝaĵoj. La unua enhavas nenion krom greno, la dua nur viandon, en la tria viciĝas kruĉoj da vino kaj biero. Kaj tie troviĝas ankaŭ aliaj konstruaĵoj, ŝtopitaj per ĉio kion oni povus bezoni. Unu enhavas sitelojn kaj potojn kaj vazojn, kaj en alia estas ĉiaj multvaloraj juveloj: broĉoj kaj brakringoj kaj oraj trezoroj. Sed en tiu konstruaĵo ne estas torditaj kolringoj, ĉar neniu romano, eĉ ne la reĝo de ĉiuj romanoj mem, portas torditan ringon ĉirkaŭ sia kolo. Alia konstruaĵo enhavas ŝtofojn, ne nur en mallarĝaj strioj, sed en grandegaj rulaĵoj longaj cent ulnojn. Ĉiuj koloroj videblas tie: sanga ruĝo, brilverdo, nigro, violo, en kvadratetoj kaj strioj kaj punktetoj. Kelkaj ŝtofoj estas pli delikataj ol araneaĵoj kaj brilas kiam la lumo tuŝas ilin, kiel la suno flagretas ĉe la pintoj de la ondoj. Kaj estas alia ŝtofo tiel dika kaj mola, ke ĝia portanto neniam sentas la malvarmon, eĉ en tiaj tagoj kiam la birdoj pro frosto fiksiĝas al la branĉoj kaj la pluveroj glaciĝas antaŭ ol atingi la grundon.”

Tiam Morimanos plurakontis pri la aliaj konstruaĵoj troveblaj en Romo. Tiom grandegaj ili estas, ke ili ŝajnas laboro de gigantoj; kaj tamen konstruis ilin homoj. Ĉar la romanoj posedas tiom da sklavoj, ke sendi cent sklavojn por levi unu ŝtonon por ili estas nura bagatelaĵo. Troviĝas tie vastegaj haloj, sufiĉe grandaj por enteni tutan lagon, en kiuj fluas riveroj. En kelkaj la akvo agitiĝas kaj bolas; ĉe aliaj glacio formiĝis sur la supraĵo.

Sed pli stranga ol ĉio estas la homoj kaj bestoj videblaj en Romo. La homoj estas ne nur blankaj aŭ palbrunaj kiel ni, sed ankaŭ malhelbrunaj, nigraj, bluaj kaj verdaj. Kaj la bestoj estas eĉ pli eksterordinaraj. Kelkaj havas nazon sufiĉe longan por tuŝi la teron; aliaj havas sur la haŭto strangajn desegnojn kiel strioj, cirkloj aŭ spiraloj; estas bestoj kun du kapoj aŭ ses kruroj; kaj aliaj kun tiel longa kolo, ke ili povas manĝi la foliojn ĉe la pinto de la arboj, eĉ de la plej altaj.

Finparolinte pri la urbo Romo, Morimanos ekrakontis pri ĝia armeo, kaj kvankam la urbo enhavas egajn mirindaĵojn, la armeo mirigas eĉ pli. Kompreneble, ni ĉiuj jam aŭdis tiun rakonton, sed ni aŭskultis sen eĉa brueto dum la fajro preskaŭ estingiĝis, esplorante en niaj mensoj la bildon de tiuj miloj kaj miloj da homoj, ĉiuj vestitaj precize same.

“Ĉiu homo en tiu armeo,” Morimanos diris, “eĉ ĝis la plej malgrava el ĉiuj soldatoj, portas kompletan armilaron, kaj neniu heroo en la antikva epoko estus hontinta aperi kun tiaj armiloj. Ĉar ĉiu unuopa soldato inter tiuj milegoj portas ferajn kirason kaj kaskon, fajroharditan glavon, du akre pintajn lancojn, kaj bone faritan ŝildon. Kaj tiu armeo havas unu egan apartaĵon: ĉar ĝi ekmarŝas nur je la sono de trumpeto. Kaj ekmarŝinte, ĝi ne haltas, eĉ se ĝi renkontas altan monton aŭ profundan valon, ĝis sonoras alia trumpeto. Kaj kiam unu homo en tiu armeo movas sian dekstran kruron, ĉiu alia movas sian dekstran kruron; kaj kiam unu homo movas la maldekstran kruron, ĉiu alia movas la maldekstran. Kiam tiu armeo marŝadas, ĝi similas arbaregon, kiu kovras vastan ebenaĵon; kaj kiam tiu armeo ekbatalas, ĝi similas nehaltigeblan ŝtormondon, kiu furiozas antaŭen pro militardo.”

Aŭdinte la finon de la rakonto, mi kuŝis varme kaj komforte sur la pajlo, aŭskultante la regulan spiradon de mia kuzo, kiu jam endormiĝis apude. Mia gravedega onklino alproksimiĝis kaj kovris nin per ŝafofelo. Mi ŝatis mian onklinon, kiu estis nekutime trankvila kaj bonhumora, kaj ĉiam povis kvietigi la homojn per sia milda voĉo. Ŝi estis lerte elektita edzino por mia onklo, ĉar malkiel ŝi, li estis senpacienca kaj kverelema. Ofte aŭdeblis lia kolera voĉo, muĝante el la alia kabano trans la korto, verŝajne kun akompano de plorantaj infanoj. Sed ĉiam sekvis la trankviligaj vortoj de mia onklino, kiu respondis mallaŭte.

“Ĉu vi ankoraŭ ne dormas, eta ruĝkapulino?” ŝi demandis. Ŝi nomis min tiel pro miaj haroj. Ruĝaj haroj estis tre oftaj en mia familio; ankaŭ mia patrino havis ilin, kvankam ŝiaj estis pli malhelaj ol la miaj kaj ne tiel belkoloraj.

Mia patro revivigis la mortantan fajron. La lumo denove ekbrilis, kaj kuŝante sur mia flanko mi dormeme rigardis dum mia patrino prenis felon da biero por la viroj, kiuj interparolis ĉirkaŭ la fajro. Mia frateto estis firme volvita en ŝalo, kiu pendis de ŝia ŝultro, kaj lia kapo daŭre balanciĝetis dum ŝi moviĝis.

Mia patro leviĝis por aliĝi al mia onklo kaj nia najbaro, Alaŭnos, kiuj sidis proksime al mia pajla nesto. Alaŭnos loĝis en la domaro sur la alia flanko de nia monteto, pli malproksime de la vilaĝo ol ni. Li estis la frato de mia onklino, kaj havis similan karakteron, bonhumoran kaj tolereman. Li estis tre ŝercema, kaj kiam li vidis min, li ĉiam tiris miajn longajn ruĝajn harplektaĵojn kaj ŝajnigis, ke li bruligis sian manon. Nun la viroj interparolis ekscite, kaj iliaj voĉoj plilaŭtiĝadis, malgraŭ la klopodoj de la virinoj trankviligi ilin.

“Pri la popolo de Kunobelinos mi parolas nun,” diris mia patro. “Ĉu ni aŭdis, aŭ ĉu ni ne aŭdis, kio okazas nuntempe en ilia teritorio? Eblas marŝi laŭ iliaj bordoj de unu fino ĝis la alia, kaj ĉiu ŝipo kliniĝanta tie sur la sablo kaj la ŝtonoj venis de trans la maro. Tiuj ŝipoj alvenadas tiel senĉese kaj tiel senpaŭze, ke oni povus paŝi de unu ferdeko al alia la tutan vojon trans la maron ĝis Gaŭlujo.”

Mia onklo konsentis. “Kaj kiam homo manĝas ĉe la tablo de la reĝo Kunobelinos, kaj vidas la lumon brilegi de la oraj kaj arĝentaj teleroj, li supozus sin en Romo mem.

‘Ŝovu al mi tiun arĝentan vazon, knabo, mi devas urini.’”

Mia onklo havis danĝeran langon, kiu jam plurfoje enkaĉigis lin. Eĉ okazis iam ke li kverelis kun kurbadorsa Bodvokos el la vilaĝo, kiam li diris ke unu el liaj bovinoj aspektas tiel aĉe malgrasa, ke Bodvokos evidente manĝas mem ĝian fojnon. Post nelonga tempo, la bovino komencis forvelki. Finfine ĝi mortis, kaj Bodvokos plendis al la druido. Kompreneble Dumnovalos subtenis lin kaj diris, ke mia onklo devos pagi kompenson pro la bovino. Komence mia onklo rifuzis agnoski sian kulpon, kvankam ĝi estis absolute klara al ĉiuj. Li provis eliri el la situacio per insultoj kaj blekoj, kriante ke la bovino estis senkarna malsaniĝema bestaĉo jam de la komenco, kaj ke li diris nur tion, kio estis evidenta al ĉies okuloj. Tia homo li estis.

Finfine mia patro sukcesis konvinki lin, ke li devos pagi; do li faris, sed nur tre malvolonte. Poste li restis relative neparolema dum kelka tempo, ĝis li iom post iom denove cedis al sia tro rapida kolereco.

Ne plaĉis al miaj patro kaj onklo la ŝanĝiĝoj, kiuj okazadis tiutempe en la malproksima reĝlando de Kunobelinos, oriente de ni. Sed trankvila Alaŭnos havis alian opinion. “Ne malhelpis Kunobelinon, kaj jen la vero. Kestojn da oraj moneroj li havas tie, kaj la tintado de tiuj oraĵoj trafas kiel dolĉaj harpoj la oreilon.”

“Oraj moneroj, dolĉaj harpoj...” mia onklo gruntis. “Prefere la sonon de ŝtonoj el ĵetiloj li aŭdu. Tiu sono ne aŭdiĝis en la teritorio de Kunobelinos de post lia juneco.”

“Jes,” aldonis mia patro, “kiam mi estis knabo, eĉ ne unu tribestro en la sudaj reĝlandoj povis ĝui trankvilan dormon dum la nokto, pro timo de Kunobelinos. Li similis sovaĝan virbovon tiutempe, kiu furiozas kaj muĝas en kampo de timemaj bovinoj. Sed ĉio ŝanĝiĝis de kiam li permesis al tiuj rikanantaj romanoj gvidi lin permane, kun siaj bankedoj kaj molaj litoj.”

“Li pensigas min pri porko, kiun oni grasigas por Samono([noto 3](#)),” diris mia onklo. “Sed ekzistas pli malbonaj ol li.”

“Verika,” diris mia patro.

“Verika,” mia onklo konsentis. “Jen tribestro kiu pli volonte aŭskultus nudkruran mesaĝiston el Romo ol siajn proprajn druidojn. Li ne eliras por pisi sur sterkejon, se li ne ricevis permeson de Romo. Se ĉiuj tribestroj en ĉi tiu regiono ne estus tiel timema, kaŭrema ularo, ni estus povintaj sendi lin al la morto antaŭ longaj jaroj. Sed ili ĉiuj paliĝas kaj tremas pro timo de la vaka, senvalora kolero de Romo.”

“Ĉu Verika?” kriis Alaŭnos. “Jen stranga nomo por kompari kun la glora nomo de Kunobelinos. Baldaŭ vi prenos sekiĝintan maljunan bovinon kaj volos prezenti ĝin kiel virbovon. Estas vere, ke Kunobelinos maljuniĝas nun, sed li postlasos du belajn manplenojn da batalpretaj filoj kaj vartofiloj ([noto 4](#)), kiuj anstataŭos lin kiam li foriros el ĉi tiu vivo.”

“Romaj festoj, arĝentaj pokaloj... Belan aron da filoj li postlasos, kiam li estos for,” diris mia patro. “La sola afero kiun ili scias fari, estas marĉandi kun eksterlandaj vinkomercistoj.”

“Jes, kaj mi aŭdis, ke ili scias fari tion eĉ per la lingvo de la romanoj mem,” aldonis mia onklo.

“Vi ne dirus tion, se vi vidus Karatakon, la propran filon de Kunobelinos, en sia tuta militista gloro, antaŭ viaj okuloj en ĉi tiu ĉambro,” Alaŭnos diris.

“El barelo da putraj pomoj ĉiam eblas elfosi unu aŭ du manĝeblajn,” diris mia onklo. “Kiam temas pri la aliaj, estas kelkaj inter ili kiuj mordas siajn lipojn pro hasto, atendente nur la forpason de la patro por forrazi siajn lipharojn kaj ekparadi sen pantalono.”

Ĉiuj viroj ridis pro lia komento, kaj eksidiĝis pli komforte por ĝui sian bieron. Poste, ili ekkantis. Kuŝante agrable varme en mia malluma angulo, mi rigardis en la flamojn dum mi mense ripetis la ĵus aŭditan rakonton. Mi ŝatis tiujn belsonajn frazojn kiujn uzis Morimanos, precipe kiam li diris “la fiŝoj en la riveroj, la ŝtonetoj ĉe la bordo, la ondoj de la maro, la steloj en la ĉielo”. Mi rediris al mi la frazon, kaj provis igi ĝin eĉ pli longa kaj belsona ol antaŭe. Mi pensis, ke mi povus aldoni, “la floroj sur la montoj, la folioj en la arboj”. Mi decidis mem inventi la postan tagon rakonton, kiu enhavos tiun frazon, kaj diri ĝin al mia kuzo. Mi bedaŭris, ke mia patro ne estas rakontisto kiel Morimanos, por ke mi lernu lian specialan manieron kunmeti la vortojn. Sed mia patro ne faris ion apartan. Li nur kultivadis la teron kaj prizorgadis la brutaron, kiel ĉiuj aliaj.

Aliaj detaloj el la rakonto vagis en mia menso: la strangaj bestoj, la domoj metitaj unu sur la alia. Mi endormiĝis, pensante pri Romo.

* * *

Estis bela mateno du somerojn poste, kiam romanoj venis al nia vilaĝo. Mi unue konstatis, ke okazas io aparta, kiam mi ekvidis mian kuzon Kaljakon. Li hastegis supren laŭ la mallarĝa kalka vojeto, kiu sekvis la flankon de la monteto ĝis nia domaro. Kutime ni ne povis vidi la homojn alproksimiĝi, ĉar la domaron ĉirkaŭis longa teraltaĵo sur kiu kreskis heĝo. Sed tiumatene okazis, ke mi sidis en la enirejo de nia kabano, pretigante fabojn por mia patrino. La pordo frontis la ĉefan breĉon en la heĝo, kaj kiam la ligna barilo estis flankenŝovita, nenio blokis mian superrigardon al la suba deklivo.

“Bivana,” Kaljakos vokis min, tuj kiam li venis sufiĉe proksimen: “estas du strangaj viroj sur la vojo. Ili ne portas pantalonojn. Ili marŝas laŭ la rivero al la vilaĝo kaj pelas ĉaregon.”

Aŭdinte la novaĵon, mia patrino tuj sendis mian fratinton Vindan al la paŝtejo por voki mian patron. Al mi ŝi diris, “Iru sciigi vian onklinon, kaj poste vi prefere finu pri tiuj faboj kaj metu ilin sub la cindrojn por bakiĝi. Tiam vi rajtos iri al la vilaĝo.”

“Sed la fremduloj estos for antaŭ ol mi eĉ vidos ilin!” mi protestis.

“Ĉu fremduloj aŭ ne,” diris mia patrino, “vi ekkrios ĉi-vespere kiam mankos eĉ unu buŝpleno por manĝi, kaj via stomako grumblos kiel ŝtono ruliĝanta laŭ deklivo. Kaj tamen ni manĝos fabojn sen pano, ĉar mi ne havos tempon por hejti la fornon, se ankaŭ mi volas rigardi ĉi tiujn fremdulojn. Vinda, iru enŝlosi la kokinojn, kaj certiĝu ke la kokinejo estas bone fermita. Ni ne povas lasi ilin ekstere la tutan tagon kun neniu ĉi tie por gardi ilin.”

Kiel eble plej rapide, ni finis la plej esencajn taskojn. Mia patrino grumblis la tutan tempon, dum ŝi haste pakis kelkajn manĝaĵojn en korbon. “Kia amaso da ĝeno kaj konfuzo, ke ni ĉiuj forkuras ĉi tiel, kvazaŭ la spiritoj nin pelus de malantaŭe! Kaj la akvositeloj estas pli malplenaj ol du sekiĝintaj nuksoŝeloj. Ĉu mi ne ripetadas al vi knabinoj, ke necesas ĉerpi la akvon frue en la tago? Nun vi devos iri en la mallumo, do ne ploru kaj plendu kiam mi sendos vin.”

Preskaŭ neniam okazis, ke ĉiuj en la domaro eliris samtempe. Ĉiam iu restis hejme por prizorgi la bestojn. La sola escepto estis je Belteno, la granda festo komence de la somero, kaj tiam, kompreneble, necesis grandiozaj preparlaboroj dum la antaŭaj tagoj por pretigi ĉion.

Kaljakos aperis ĉe la pordo kun siaj du junaj fratinoj. “Rapidu, Bivana,” li vokis min. “La fremduloj malaperos trans la montetojn antaŭ ol vi kaj Vinda moviĝos. Haste, aŭ ni ekiros al la vilaĝo sen atendi vin.”

“Kian amason da tempo vi bezonas por tiuj faboj,” mia patrino diris. “Estas sufiĉe ĉi tie por nutri familion de birdetoj, eble. Do, ek kun viaj gekuzoj. Mi finos ilin mem.” Mi rapidis eksteren, sed ŝi revokis min. “Tasgjos ploras kaj petegas, por ke vi kunportu lin.”

Malvolonte, mi rigardis malantaŭen kaj vidis mian frateton, kiu ploris en la pordo. “Li bezonos duonan tagon por fari la vojon,” mi diris, “dum ni ĉiuj vokos kaj alkrios lin por ke li restu kun ni. Kaj kiel li povos transsalti la riveron per la ŝtonegoj? Ni volis iri laŭ la mallonga vojo.”

“Vi ne iros kun Bivana ĉi-foje,” mia patrino diris al Tasgjos. “Vi venos kun mi, kun onjo kaj la bebo.” Mi forkuris ĝustatempe por aŭdi Tasgjon eligi plenvoĉan lamentadon.

Fronte al nia domaro, la vidaĵon trans la rivero superregis granda monteto, kiu staris alte super la tuta regiono. Ĝiaj flankoj leviĝis krute sub maldensa kovraĵo de mallonga herbo, kiu apenaŭ kaŝis la suban kalkon. Jam vidiĝis la ĉarego, pene antaŭenirante laŭ la malsupraj deklivoj. Ĝi sekvis la pli facilan vojon, kiu zigzagis kun malurĝo ĉirkaŭ la flankoj de la monteto antaŭ ol iom post iom alproksimiĝi al la vilaĝo ĉe la pinto. Ni

facile preterpasos ĝin, se laŭ la rekta vojo ni iros supren.

Vinda kaj mi, kun niaj tri gekuzoj, kuris al la rando de la akvo por aliĝi al grupo de infanoj el la najbaraj domaroj. Ni paŭzis mallonge ĉe la bordo por peti permeson de la rivero antaŭ ol transiri. Normale ĝi estis bonhumora kaj donema, sed ĝi povus ekkoleri se ni ne alirus ĝin kun ĝusta respekto. Ni transsaltis per la grandaj ŝtonoj, tre atente ĉe la tria, ruza ŝtono, kiu ĉiam provis glitigi nin en la akvon. Ni estus povintaj pli facile transiri sekvante la riverfluan ĝis punkto, kie arbotrunko kuŝis inter unu bordo kaj la alia, sed tio devigus nin fari pli longan vojon.

De la kontraŭa bordo, mallarĝa vojeto iris rekte supren laŭ la monteto ĝis la vilaĝo. Ĝi estis sufiĉe facila en la komenco, sed rapide iĝis tre kruta. La kretaj ŝtonoj ofte forruliĝis subpiede, kaj ni devis helpi nin, kaptante tufojn de la mallonga, raspa herbo, tre atente por ne samtempe ekpreni manplenon da kardoj aŭ da urtikoj. Anhelante, ni atingis la eksteran remparon. Kaljakos havis ŝvitogutojn sur la supra lipo. Ĉiuj infanoj de la vilaĝo jam staris super ni laŭlonge de la remparo kaj vokis por urĝi nin supren. Per lasta fortostreĉo ni grimpis la krutan remparon – ne estis facile, sed ni malestime rifuzus la proponon eniri per la pordego – kaj ĵetis nin sur la herbon.

De la pinto oni vidis la tutan regionon kiu etendiĝis malsupre: vastan areon da malkrutaj, ondosimilaj montetoj. La malpli altajn deklivojn kovris multenombraj flavaj kaj verdaj kampetoj dividitaj de malhelaj arbaretoj. Domaroj estis dissemnitaj tra la montetoj, kaj jen kaj jen sur la deklivoj brilis kiel blanka fadeno unu el la multaj kalkaj vojetoj. En la malproksimo ni povis vidi kie la kultivataj areoj komencas maldensiĝi kaj la grupoj de arboj iĝas pli grandaj kaj pli oftaj ĝis ili kunfandiĝas en solidan amason.

La duobla remparo konsistis el du longaj teraltaĵoj apartigitaj de profunda fosaĵo, kiuj formis kompletan cirkon ĉirkaŭ la vilaĝo. Oni rakontis, ke vivanta infano estis subterigita en kavo sub la interna remparo, kaj ke tio estas la sekreto de ĝia fortikeco. Certe estis vere, ke en la tempo de mia avino rabobando veninta laŭ la rivero el la sudo foje sukcesis atingi la supron de la ekstera remparo, sed ankoraŭ neniu malamiko iam ajn transiris la internan. Estis unu punkto ĉe la bazo de la interna remparo, kie la tero estis iom malaltiĝinta, kaj mi ĉiam imagis, ke tiu estas la loko kie kaŝiĝas la kavo. Mia patrino diris, ke la knabineto sciis, ke estas granda honoro elektiĝi kiel tiu, kiu gardos la ĉiaman sekurecon de nia vilaĝo. Mi tamen ne povis forigi la penson, ke ŝi verŝajne timis, kiam oni lasis ŝin tute sola en tiu malluma kavo.

Pli malproksime laŭ la remparo ni vidis mian pli aĝan fraton, Atepilon, kun grupo de grandaj knaboj, kaj aliris lin iom timeme. Li ŝajnis al mi ĉiam pli alta kaj plenkreska, kaj eĉ ekvideblis delikata lanugo sur lia supra lipo. Atepilos ne loĝis hejme kun ni, sed en la vilaĝo ĉe la kuzo de mia patrino. Li rakontis al ni, ke du vilaĝanoj estis riparantaj la ŝtonan muron sur la kresto de la interna remparo, kiam ili kiel unuaj vidis la fremdulojn alveni el fora punkto pli malsupra laŭ la rivero. Ili tuj iris por informi Katumandon. Kiam la fremduloj proksimiĝis, oni vidis ke ne temas pri la kutimaj komercistoj, kiuj vizitadas nin de tempo al tempo, kaj Katumandos sendis sian junan nevon Kunignon surĉevale por sciigi Dumnovalon. Dumnovalos, kun siaj familianoj kaj lernantoj, loĝis iom for de

la vilaĝo en granda, izolita domaro ĉe la rando de la arbaro. Kunignos bezonos sufiĉe da tempo por rajdi tien kaj reen, sed neniu eĉ pensus entrepreni gravan aferon ne alvokinte la druidon.

De nia alta gvatejo sur la remparo, ni rigardis la homojn plurope alfluadi el la ĉirkaŭaj domaroj. La infanoj grimpis supren por aliĝi al nia grupo, dum la plenkreskuloj iris saluti la vilaĝanojn, kiuj jam staris atendoplene en la spaco inter la du pordegoj. Ĉiu en la regiono jam aŭdis la novaĵon aŭ vidis la fremdulojn de malproksime, kaj ĉesigis ĉian laboron por hasti supren al la vilaĝo. Komercestoj vizitadis nin nur unu aŭ du fojojn jare, kaj ili ĉiam apartenis al nia propra popolo aŭ al unu el la pli riĉaj reĝlandoj en la oriento. Ĉiuj konsentis, ke la du fremduloj evidente venis de trans la maro; ili portis palkolorajn mallongajn vestojn, kaj laŭ malproksima takso ŝajnis havi nudajn krurojn.

Senspire ni spektis la penan progreson de la ĉarego, dum ĝi skuiĝis kaj saltetis malrapide supren laŭ la flanko de la monteto. En kelkaj lokoj la vojo ne estis videbla pro kurbiĝo, kaj ni senpacience atendis ĝis la fremduloj reaperis ĉe la posta angulo, paŝante malrapide apud siaj bovoj. Finfine ni ekvidis ilin sur la fina stadio, kiu kondukis al la ĉefa enirejo. Dum ili alproksimiĝis al la ekstera pordego, ni infanoj kurgrimis malsupren kun malfacilo en la fosaĵon kaj resupren ĉe la alia flanko ĝis la pinto de la interna remparo, de kie eblos bone vidi kiam la fremduloj eniros la pordegon. [\(Legu la noton.\)](#) La plenkreskuloj intertempe retiriĝis malantaŭ la internan enirejon.

La spaco inter la du pordegoj estus povinta esti mortiga kaptilo por la du fremduloj, kaj mi demandis min, ĉu ili ne hezitos je la lasta momento. Sed ne, ili promenis senĝene internen, laŭŝajne tute trankvilaj sub la altaj remparoj, dum ĉiu infano en la vilaĝo rigardis ilin scivole. Kiam ili atingis la internan pordegon, ili ege interesiĝis pri la kranioj muntitaj en la fostoj kaj ekzamenis ilin tre detale, ŝajne tute ne konsciaj pri la amasiĝintaj vilaĝanoj, kiuj atendis, apenaŭ bridante sian malpaciencon, interne. Sed kompreneble, ili prave admiris la kraniojn, kiuj apartenis al malamikaj militistoj kaptitaj dum rabekspedicioj kontraŭ la vilaĝoj pli malsupre laŭ la riverfluo. Ni infanoj profitis de la paŭzo por grimpi trans la malaltan ŝtonan muron sur la interna remparo kaj malsupren en la vilaĝon, kie ni puŝis nin tra la homamaso ĝis la antaŭa vico.

Kiam la du fremduloj finfine envenis la pordegon, ili ŝajnis tute nekonsciaj pri la granda intereso, kiun ili ekscitis. Ili senĝene promenis ĉe malsamaj flankoj de la ĉarego, parolante super ĝi per laŭtaj voĉoj, kvazaŭ troviĝus nur ili en la tuta loko. Ili parolis nekonatan lingvon per senesprima monotono, kiun ni infanoj imitadis poste dum monatoj.

Mi ĉiam imagis, ke romanoj estas nekredeble altaj kun grandiozaj, ŝtormoblovitaj hararoj. Sed ĉi tiuj homoj estis relative malaltaj, kvankam fortikaj, kaj iliaj haroj estis mallonge tonditaj. Ili estis sufiĉe junaj, kun forrazitaj lipharoj, kaj iliaj haroj kaj haŭto estis multe pli malhelaj ol la niaj. Iliaj vestoj estis ridindaj: ili similis tro kreskintajn infanojn kun siaj tunikoj super la genuo kaj nudaj kruroj kiel du maldikaj bastonoj. Iliaj

tunikoj eĉ ne estis tinkturitaj.

La sola homo en la vilaĝo kiu ne estis imponata pro la okazo estis, kiel kutime, freneza Dumna. Ignorante maltrankvilan murmuradon de la apudaj homoj, ŝi nun elstaris el la amaso kaj ekmarŝis per grandaj paŝoj antaŭ la du fremduloj, dum el sia buŝo ŝi eligis senĉesan fluon da sensencaĵoj, surprize similan al ilia parolmaniero. Tiel ŝi ĉiam kondukis. Kiam okazis ceremonio, ŝi kutimis stari antaŭ ĉiuj, imitante la movojn de la druido kaj mimante liajn vortojn, ĝis forkondukis ŝin unu el la militistoj. Kompreneble, kiam ŝi faris tion, Dumnovalos simple daŭrigis kvazaŭ li rimarkas nenion. Krom en unu fama okazo – mi tiam ankoraŭ ne naskiĝis, sed mi multfoje aŭdis la rakonton – kiam la miskonduto de Dumna iĝis pli ol normale provoka. Dumnovalos simple tuŝis ŝin per sia kverka bastoneto kaj rigardis en ŝiajn okulojn, je kio ŝi fiksiĝis kiel fosto kun la buŝo malfermita kaj la brakoj etenditaj en glaciiginta gesto, ĝis li liberigis ŝin post la oferado.

La reago de la fremduloj estis tute malsama. Ili rigardis Dumnan kun senkaŝa miro. Bonŝance, antaŭ ol ŝi povis plu hontigi nin, unu el la militistoj de Katumandos aperis en la enirejo de lia kabano, kaj indikis al la du viroj, ke ili alproksimiĝu.

Atendiginte ĉiujn dum pluraj minutoj, Katumandos kaj Rigandrika aperis, sekvataj de la militistaro. Katumandos portis tunikon el verdo kaj bruno kun ruĝbruna pantalono kaj franĝohava verda mantelo, kiun fermis granda broĉo. Rigandrika havis robon kun desegno el flavaj kaj violaj kvadratoj, kaj malhelviolan mantelon kun bordero el blanka brodaĵo, fiksitan per dekorita pinglo. Ambaŭ portis torditan kolrington. Katumandos aspektis aparte impona pro la haroj diskrispigitaj kaj elstarantaj, la longaj pendantaj lipharoj, kaj la glavo ĉe sia flanko. Li estis sufiĉe pli alta ol la fremduloj.

La du viroj salutis nian ĉefon kaj lian edzinon. Unu el ili paroletis nian lingvon, sed tiel malbone kaj per tiel monotona prononco, ke estis malfacile distingi la vortojn. Tiam ili transdonis iom malgrandaspektan donacon. Mi aŭdis poste kio ĝi estis, kaj kvankam malgranda ĝi montriĝis tre valora. Temis pri vazeto el belega travidebla materialo. La kuzo de mia patrino estis la batalĉaristo de Katumandos, do poste li havis okazon pli detale ekzameni la donacon. Li diris, ke la flankoj de la vazo estis tiel klaraj, ke vere eblis vidi tra ili. Sed necesis trakti ĝin zorge, ĉar la materialo estis tre delikata kaj povis rompiĝi pli facile ol argilo.

La fremduloj portis donacojn ankaŭ por la infanoj. Ili ĵetis al ni kelkajn ĉifonojn, en kiuj estis pluraj rondaj kuketoj. Mi sukcesis kapti nur unu, kaj opiniis ĝin la plej bongusta aĵo, kiun mi iam ajn manĝis. Ĝi estis kraka ekstere sed mola kaj frandinda interne, kun aparta gusto, kiun mi neniam forgesis. Kiam mi alvenis al Romo, mi ĉiam esperis denove gustumi tian kuketon, sed kvankam mi foje ricevas ion, kio memorigas min pri ĝi, nenio poste iam ajn precize rekaptis tiun perfektan kombinon de krakeco kaj fandiĝanta dolĉeco. Kaj cetere, homoj ne kutime malŝparas tiajn frandaĵojn, donante ilin al sklavo.

Katumandos kaj Rigandrika, akompanataj de la militistoj, nun malaperis en sian

kabanon kun la fremduloj. Estis seniluziigo por ni, ke la caregon oni fermis en la apuda korto, dum ilia juna vartofilo ricevis la taskon gardi ĝin. Mi demandis min, kiujn varojn miaj gepatroj portos por la komercado. Ni posedis neniumon kaj malmulte da ĉio alia, kio imageble povus interesi la fremdulojn. Oni ankoraŭ ne rikoltis la grenon, kaj estis apenaŭ verŝajne, ke ili deziras la restaĵon de la pastintjara rikolto. Ili akceptus felojn aŭ salitan viandon, sed ni ne buĉis bestojn lastatempe.

Mi ankoraŭ gapis al la carego, premante min kontraŭ la barilo kiu ĉirkaŭis la korton, kiam alvenis miaj patro kaj onklo. Mia patro portis plenŝtopitan sakon da lano sur la ŝultroj. Certe ne estis facile suprengrimpigi la krutan deklivon sub la suno kun tiel peza ŝarĝo, sed li aspektis, kiel kutime, trankvile digna. Tio tamen tute ne imponis mian patrinon. Ŝi hazarde staris apude kun kelkaj aliaj virinoj, kaj nun ŝi subite ekpaŝis el la grupo por alfronti lin. "Sed tiun lanon mi bezonas por fari vintrajn vestojn por la knabinoj!" ŝi protestis kolere.

Mia patro forturnis sin indiferece. "Kiam ni denove vidos romanojn en nia vilaĝo?" estis lia sola respondo. Mia patrino diris eĉ ne plian vorton sed reiris al siaj amikinoj, streĉe kunpremante siajn lipojn. Mi sciis, ke hejme li ne tiel facile silentigus ŝin, sed sendube ambaŭ ne volis ekkvereli antaŭ la vilaĝanoj.

La alvenon de Dumnovalos signalis vigliĝo inter la homoj, kiuj staris apud la pordegoj. Li enmarŝis per grandaj paŝoj, mallonge ĉirkaŭrigardis, kaj eĉ ne salutante transiris rekte al la kabano de Katumandos kaj Rigandrika kaj malaperis internen. Li alvenis pli frue ol oni atendis, sed montriĝis, ke Kunignos renkontis lin survoje. La druido jam antaŭvidis la viziton de la fremduloj kaj ekiris piede al la vilaĝo. Precize tian aferon ni atendis de Dumnovalos. Li estis tre potenca druido, kaj la homoj venis de ĉiuj kvar vilaĝoj ĉe nia parto de la rivero por konsulti lin. Li estis peza, stumpa homo kun decidema maniero, sed liaj specialaj povoj ne estis evidentaj unuavide. Ŝajnis strange al mi, ke malkiel Katumandos kaj Rigandrika li ne surmetis siajn plej bonajn vestojn por renkonti la fremdulojn. Li portis paliĝintan bluan tunikon kun kvadrata desegno, kaj flikitan pantalonon kun granda makulo ĉe la genuo.

Nun kiam ĉeestis Dumnovalos, la komercado povis komenciĝi. La caregon oni tiris el la korto kaj la plenkreskuloj avide amasiĝis ĉirkaŭe. Kiel la aliaj infanoj, mi faris mian eblon por puŝi min antaŭen, ĝis mi fine atingis malkomfortan pozicion, premate kontraŭ la flanko de la carego. Ĝi estis plena je altaj potoj kun strangaj formoj, en diversaj nuancoj de malhela ruĝo. Mi rigardadis kun fascino, eĉ ne rimarkante la kubutojn kiuj pikadis min, ĝis mi estis flankenŝovita de la homamaso kaj malvolonte cedis mian lokon.

Estis malfrue en la posttagmezo kiam mi marŝis malrapide hejmen kun miaj patrino kaj onklino. Ni estis lacaj, malsataj kaj ŝarĝitaj de la du plej junaj infanoj; la aliaj jam kuris antaŭen kun la viroj. La plej eta infano de mia onklino pendis en ŝia ŝultro, kaj mi proponis porti Tasgjon, por kompensi mian rifuzon kunporti lin en la mateno. Efektive li estis tro peza por ke mi portu lin tiel longan distancon, kaj por malbonigi la situacion eĉ plie, li endormiĝis, tiel ke lia kapo konstante glitis de mia

Ŝultro. Mi esperis, ke mia patrino rimarkos kaj reprenos lin, sed ŝi paroladis indigne al mia onklino.

“Kion li imagas, ke la knabinoj portos ĉi-vintre? Li estas pli egoisma ol hundo kun ostoj, kiu formordus la manon, se oni provus forpreni ĝin! Tiu lano estis lavita kaj kombita tiel bele, ke ĝi estus taŭga kuŝejo eĉ por la reĝo Kunobelinos - kaj krome estis tiuj feloj, kiujn alportis via edzo - kaj li forĵetis ĉion kontraŭ kelkaj gutaĉoj da vino, kiuj estos for antaŭ la venonta novluno! Nia propra biero sufiĉis por li antaŭ la alveno de tiuj romanoj, kaj li estis kontenta akcepti duan tason, kaj trian, el mia mano. Tiu vino malaperos en du vesperoj, dum la knabinoj frostos kaj tremos la tutan vintron pro la neĝo kaj la morda malvarmo.”

Ni plumarŝis iomete en silento, tiam mia patrino rekomencis. “Tiuj homoj ŝajnis imagi, ke ili estas la reĝo Kunobelinos mem, ke ili vagas tiel tra nia tero, ridetante al junuloj kaj maljunuloj sen eĉ unu penso pri la propra sekureco. Ili estis bonŝancaj, ke oni ne mortigis ilin, aŭ almenaŭ forprenis la ĉaron.”

“Ŝajnis strange, tio estas certa,” mia onklino konsentis. “Verŝajne ili vagis malproksimen de sia vojo. Ili intencis iri trans la montetojn al la Dobonoj ([noto 5](#)), eble.”

“Do, ili alvenos post la rikolto, kiam la vilaĝanoj jam sidos ĉirkaŭ la fajro en la nigraj, longaj noktoj de la vintro.”

“Ili havis sufiĉe malmulte por montri sur tiu ĉaro, krom la potoj,” mia onklino komentis. “Mi esperis, ke ili alportos ankaŭ aliajn aĵojn, tiujn kolorajn ŝtofojn eble, pri kiuj Morimanos ĉiam rakontadas al ni.”

“Kial ili ĝenu sin porti kolorajn ŝtofojn al homoj kiel ni? Neniu ĉi tie havas monon por tiaj aĵoj, nek sufiĉan grenon por pagi pecon da brilanta ŝtofo, kiu venis la tutan vojon el Romo. Kaj cetere, estas longa vojaĝo de la maro kaj malfacila, porti tiun ĉaron dum ĝi skuiĝetas kaj saltetas la tutan vojon tra la montoj, kaj ili certe iris tra ĉiuj aliaj vilaĝoj antaŭ ol atingi ĉi tian malproksiman solecan lokon, kie ni loĝas. Jen, mi prenos Tasgjon,” ŝi aldonis, finfine rimarkinte, kiel mi penas sub mia ŝarĝo. “Kial vi ne vokis min, anstataŭ ĝemi kaj ŝviti pro la pezo? Sed vi scias kio okazis: tiom ĉagrenis kaj turmentis min la menso, ke mi tute ne havis liberan penson. Ĉar la bonaj spiritoj helpu min, se mi scias, kion vi portos ĉi-vintre.”

“Ankoraŭ restas al mi bela manpleno da lano,” mia onklino diris. “Eble vi povus nur alkudri pecon al iliaj malnovaj roboj anstataŭ fari novajn.”

“Verŝajne mi devos fari tion. Sed kia bedaŭro, ke ili portos malnovajn, flikitajn vestojn la tutan vintron, kiam mi havis sakon de la plej mola, blanka lano, kiun oni trovas ĉi-flanke de la rivero.”

Alveninte hejmen, ni trovis ĉion en malordo, precize kiel ni lasis ĝin matene. Necesis peli la bovinojn al la rivero antaŭ ol melki ilin kaj ellasi la kokinojn; krome la akvositeloj

estis malplenaj, la forno malvarma kaj la pasto tro fermentinta. Mia patrino iris al la fajrejo kaj levis la kovrilon de la poto por kontroli la fabojn. Eskapis bonegaodoro. “Nu, jen la sola bona afero kiu okazis de kiam ni leviĝis ĉi-matene,” ŝi diris.

“Bedaŭrinde ke la sola pano kiu restas estas pli malmola kaj seka ol malnova ŝafosto. Bivana, kuru ĉerpi la akvon. Nu,” ŝi aldonis, dum mi prenis la sitelojn, “finfine ni vidis, kiaj estas romanoj, kaj mizera vidaĵo ili estis. Mi esperas, ke ili neniam plu revenos ĉi tien, ĉar ili havas nenion, kion ni bezonas, kaj jen la vero.”

* * *

Kiam ajn mi havis eblecon, plaĉis al mi pasi apud la herbejo, kie la viroj perfektigis siajn batallertojn. Temis pri ebenaĵo en la direkto de la riverfluo, kaj dum mi preteriris, mi rigardis la virojn kaj knabojn, kiuj ekzercis sin per diversaj armiloj. Ili ĵetis lancojn kontraŭ sako plena je pajlo, svingis ŝtonĵetilojn super siaj kapoj, aŭ manipulis siajn longajn glavojn kun sovaĝaj krioj. Ne ĉiu familio en nia vilaĝo posedis glavon, sed ne gravis, ĉar en lertaj manoj ĵetilo povis esti same efika. Kelkfoje eĉ pli efika, ĉar malkiel glavo ĝi estis uzebla de malproksime.

La herbejo estis la preferata renkontejo de la viroj, kaj miaj patro kaj onklo iris tien ne tiom por perfektigi sian uzon de la ŝtonĵetilo, kiom por aŭdi la novaĵojn. La plejmulto de la knaboj pasigis tie ĉiun posttagmezon, se ne estis tro da laboro por fari en la kampoj. Estis grave, ke ili lertiĝu pri la manipulado de armiloj, ĉar oni ĉiam timis, ke iam rabekspedicio venos supren laŭ la rivero el la malgranda grupo de tri vilaĝoj sude de ni.

Estis vere, ke ne okazis seriozaj rabadoj de multaj jaroj, fakte ne post la epoko de miaj geavoj, kaj la deklivojn ekster nia vilaĝo nun kovris trankvilaj domaroj. Sed ni kreskis kun la memoro de tiuj malicaj rabekskursoj, kun rakontoj pri mortigoj kaj bruligoj kaj perfortoj, pri la brutoj forpelitaj, pri infanoj ŝtelitaj kaj venditaj kiel sklavoj, kaj pri plenkreskuloj forportitaj kiel oferaĵoj. Nature, nia vilaĝo ja gajnis sian justan venĝon. Aliaj rakontoj temis pri gloraj kontraŭekspedicioj, pri kaptado de malamikaj vilaĝanoj, kaj pri brutoj forportitaj por inde kompensi mortigojn kaj perdojn. Sed ĉio ĉi okazis antaŭ longe, kaj intertempe la rilato kun niaj sudaj najbaroj relative plipaciĝis ĝis stato de nura suspektado. Kvankam multaj jaroj pasis de post la lastaj rabadoj, ĉiuj en mia vilaĝo opiniis, ke necesos nur malgranda misaĵo - kelkaj malbonaj rikoltoj, ekzemple, aŭ ekapero de bovinmalsano - por ke la tuta afero ekflagru denove. Certe, iun ajn signon de malforteco niaflanke ili taksus kiel inviton al novaj rabatakoj. Tial la viroj plupasigis siajn posttagmezojn en la herbejo, kvankam praktike nur la pli aĝaj iam havis okazon svingi glavon kontraŭ vera malamiko, kaj la ŝtonĵetiloj estis pli ofte uzataj kontraŭ birdoj ol kontraŭ rabistoj.

Iam okazis, ke rabobando atakis la domaron de mia patro, kiam li estis nur knabeto. Li

kaj lia familio vekigis dum la nokto pro freneza bojado de la hundoj. Per la lumo de plena luno ili vidis grupon de armitaj rajdantoj, kiuj alproksimiĝis tenante brulantajn torĉojn. Kvankam la domaranoj estis senespere malpli nombraj, la viroj viciĝis antaŭ la enirejo, pretaj defendi sian hejmon per glavoj kaj ŝtonoj. Intertempe, ĉe la alia flanko, la virinoj trarompis la heĝon kaj forglitis kun la infanoj. La luno superverŝis la montetojn per sia klara lumo, do ili celis la ombrojn, kurante kun timo trans la liberajn spacojn ĝis ili atingis la sekurecon de malhela arbareto. Tie ili kuŝis kaj anhelis el streĉitaj brustoj, ankoraŭ tenante la hakilojn kaj sarkilojn, kiujn ili ekkaptis en la lastaj teruraj momentoj antaŭ ol fuĝi. Senhelpe ili aŭskultis la kriegojn, kiuj eĥis trans la valo el ilia domaro, dum samtempe la hundoj bojegis.

Poste, torĉoj balanciĝis tien kaj reen tra la montetoj, kvazaŭ la rajdantoj serĉas ion. Bonŝance, ilia fuĝejo ne estis malkovrita. Ili aŭdis la kriojn de la viroj, kiuj elpelis la brutojn kaj aliajn bestojn, kaj poste la nokta ĉielo heliĝis pro la lumo de la brulanta domaro. Ili ne kuraĝis moviĝi ĝis la lasta rajdanto malaperis preter la horizonto, kaj tiam ili finfine reiris al la restaĵoj de sia hejmo. Sub la furioza ardo de la flamoj atendis ilin horora vidaĵo: la kadavroj de la viroj, senkapigitaj.

La avino de mia patro rekonstruis la domaron pli proksime al la vilaĝo, kie estis malpli da risko, ke ĝi fariĝos celo de nova rabatako. Unu el ŝiaj bofilinoj reiris al la propra familio, sed la aliaj du restis, kaj ili kune kultivis la kampojn kaj edukis siajn junajn infanojn. Temis pri la sama domaro, kiun intertempe heredis miaj patro kaj onklo.

La restaĵoj de la antaŭa domaro estis ankoraŭ videblaj. Mi vizitis ilin de tempo al tempo kun miaj gekuzoj kaj fratino, kaj ni ludis inter la herbokovritaj teraltaĵoj, kiuj indikis la lokojn, kie iam staris kabanoj kaj staloj. Foje ni ludis, ke ni estas la domaranoj, kiuj rigardas la alvenon de la rabobando kun siaj brulantaj torĉoj. Sed en nia versio, ĉiam la domaranoj forpelis la rabantojn kaj revenis triumfe kun iliaj kapoj. Ni opiniis, ke la vivo estis certe pli ekscita, kiam niaj gepatroj estis infanoj. Ili almenaŭ havis la eblecon montri, kiel lerte ili uzas la lancon kaj la glavon: eblecon, kiu ŝajnis al ni tiutempe tre malproksima.

Unu aferon mi neniam komprenis: kial la avino de mia patro forŝteliĝis tra la heĝo kun siaj bofilinoj, anstataŭ preni sian lokon apud la viroj. Mia patro ĉiam rakontis al ni, ke ŝi estis kuraĝa, fortika virino kun muskolaj brakoj kaj sovaĝa temperamento. Ŝi mem plugis la kampojn, lerte uzis la ŝtonĵetilon, kaj mi estis certa, ke ŝi estis tute kapabla manipuli ankaŭ glavon.

Foje mi imagis, kion mi farus, se rabobando venus al nia domaro. Mi starus sola en la enirejo kaj svingus mian glavon tiel lerte, ke miaj patro kaj onklo retiriĝus kun miro, sen bezono fari ion ajn krom respekte rigardi dum mi sola batalus kontraŭ tri aŭ kvar rabistoj samtempe. Ankaŭ Kaljakos rigardus, kaj mia frato Atepilos. Estis vere, ke li ne kutime loĝis ĉe ni, sed li ja venis por helpi dum la rikolto. Efektive estus malverŝajne, ke rabatako okazus dum tiu periodo, sed nu, tiel mi imagis la aferon.

Poste mi kompreneble forhakis la kapojn de la rabistoj, kaj ni pendigus ilin super la

pordo de nia kabano. La plej sovaĝan kapon ni rezervus kiel donacon por Katumandos kaj Rigandrika, kaj la postan tagon mi kun mia patro portus ĝin al la vilaĝo. Tie mi aŭskultus dum li fiere rakontus al ili kiel mi tutsola venkis tutan rabobandon. Tiam ili invitus min aliĝi al ilia militistaro, kaj mi iĝus unu el la plej famaj el ĉiuj herooj, kaj la poetoj verkus pri mi kantojn.

Plaĉegis al mi aŭdi pri bataloj kaj militoj. Kiam Morimanos vizitis nin, li rakontis belegajn historiojn kiel tiun pri la heroo, kiu povis ŝveliĝi kiel nigra nubo kun la hararo kiu elstaris de la kapo, kaj frontis tute sola trioble kvindek ĉampionojn. Sed mia preferata rakonto estis tiu pri la reĝino, kiu de sia ĉaro kondukis sian armeon al la batalo, dum ŝi frapegis siajn lancojn kontraŭ sia ŝildo. Kiel mi, ŝi havis ruĝajn harojn, sed ŝi portis ilin malplektitaj ĝis la genuoj. Ĉi tiaj rakontoj tiom ekscitis min, ke aŭskultinte ilin mi ne povis dormi. Ili donis al mi deziron kuregi kiel frenezulo tra la montetoj ĝis mi liberiĝos de la pasiaj sentoj, kiujn ili vekis en mi. Dum la postaj tagoj mi serĉis ĉiajn pretekstojn por eliri sola, por ke mi povu ripetadi ilin en mia menso kaj teksti el ili novan, propran fantazon. Kiam neniu rigardis, mi kuris tien kaj reen, imagante ke mi estas la ruĝhara reĝino en sia batalĉaro.

Mi ne malkaŝis al iu ajn miajn sentojn pri tiu rakonto, sed mi havis ĝenan impreson, ke mia patrino divenis mian sekreton. “Kia bela historio por rapidigi la sangon de juna knabino,” ŝi diris. “Kiam mi havis vian aĝon, mi estus povinta aŭskulti ĝin ĉiunokte de Samono ĝis Belteno kaj trovi ke la tempo pasis rapide. Ĝi ne donas al mi la saman plezuron nun kiam mi plenkreskis.”

La militistoj de nia popolo estis famaj pro sia lerteco per la batalĉaro, kaj ili scipovis plenumi tiajn manovrojn, kiel marŝi laŭ la timono de la ĉaro dum la ĉevaloj galopis je plena impeto. En mia vilaĝo troviĝis nur unu iom malnova ĉaro, uzita de Katumandos en lia juneco. Lia ĉaristo estis Isarninos, la kuzo de mia patrino, kiu sciis ĉion pri la prizorgado kaj bredado de ĉevaloj. Isarninos kaj lia edzino vartis mian fraton Atepilon kiel filon ekde lia naskiĝo, por ke Isarninos povu transdoni al li ĉiujn siajn konojn. Tion oni ofte faris ĉe mia popolo. Nun Katumandos pludonis la ĉaron al sia nevo Kunignos, kaj Kunignos elektis Atepilon kiel sian ĉariston.

Preskaŭ ĉiuposttagmeze, Atepilos kaj Kunignos malsupreniris al la herbejo kun la aliaj junuloj por elprovi kelkajn heroaĵojn per la ĉaro. Tio estis ne malpli postula por Atepilos ol por Kunignos, ĉar li devis teni la ĉevalojn kiel eble plej firme, dum ili impetis ĉirkaŭ la herbejo kaj Kunignos staris en ekvilibro sur la timono. Se Kunignos perdis la ekvilibron kaj desaltis, kiel kelkfoje okazis, Atepilos devis malrapidiĝi kaj reiri, por ke li ensaltu de malantaŭe. La ruziĝo troviĝis en tio, ke devis aspekti kvazaŭ li desaltis intence. La celo de ĉi tiu manovro estis elmontri sian lerton al la malamiko eĉ antaŭ la komenco de la batalo. Mia popolo estis tre konscia pri la neceso krei ĝustan impreson, aperante sur la batalkampo, kaj ni kredis, ke se militisto sukcesas tremigi sian malamikon, li praktike jam venkis. Tial niaj militistoj ĉiam atakis siajn malamikojn per fanfaronoj kaj insultoj antaŭ ol eĉ tuŝi armilon.

Iam okazis, ke mi vagis malrapide apud la herbejo kun korbo da naturaj kuirherboj,

kiam alproksimiĝis mia kuzo Kaljakos. Li estis anhelanta kaj havis ruĝan vizaĝon, ĉar li ĵus kuregis kun la aliaj knaboj laŭ la deklivoj malantaŭ la ĉaro. “Ĉu vi vidis Kunignon?” li demandis entuziasme, dum ni iris hejmen. “Nur imagu kiel li aspektus, kun la haroj elstarantaj kiel tranĉiloj de la kapo, kaj la glavo brilanta per ruĝa lumo! Mi bedaŭras, ke li neniam havas la ŝancon elmontri siajn heroaĵojn en batalo.” Ni plumarŝis iomete kaj li aldonis, “Sed venos lia momento, eble, kiam mortos Kunobelinos. Tiam la filoj de Kunobelinos diskuros kiel hundaro, kaj bojos kaj blekos kaj furiozos tra la reĝlando de Verika, ĝis restos nenio krom amaso da ruboj.”

“Sed neniuj rajtas tuŝi Verikan!” mi kriis kun hororo. “Li estas amiko de la romanoj!” Je dek du jaroj mi havis nur la plej malklaran ideon pri la okazaĵoj en apudaj reĝlandoj, kiuj ŝajnis havi nenan evidentan rilaton kun miaj propraj intereso. Sed eĉ mi sciis, ke Verika havas la subtenon de Romo, kaj ke se oni atakus lin, ilia reĝo verŝajne sendus armeon por helpi lin.

“Kial vi mienas tiel, kiel timigita ŝafo?” Kaljakos demandis. “Ne vivas romano, kiu kuraĝus ekpaŝi en nian landon. Ili scias, ke niaj militistoj estas la plej aŭdacaj en ĉi tiu flanko de la maro. Kaj ne gravas, se ilia armeo estas tiel granda kaj impona: ili eĉ ne havas batalĉarojn. Nur imagu, kiel ili tremus kaj timus, se ili vidus la ĉaron de Kunignos preterflugi, kaj lin kiu kurus laŭ la timono aŭ starus senmove dum la vento plumblovus lian mantelon kaj liaj haroj elstarus de lia kapo!”

Kompreneble, mi sciis, ke li pravas. Mi ofte aŭdis miajn patron kaj onklon aserti, ke niaj militistoj estas la plej batalemaj en ĉiuj sudaj reĝlandoj. Cetere, ja entuziasmigis min la penso, ke eble okazos io nova kaj malsama, io kio skuos nian vivon el la kutima, facile antaŭvidebla rutino. Ŝajnis maljuste, ke ni neniam havas eblecon montri nian kuraĝon fronte al minaco. La herooj en la rakontoj de Morimanos konstante frontis terurajn, eĉ nesupereblajn, danĝerojn, sed ili estis komplete sentimaj. Ili ekiris al la batalo sciante, ke ili mortos, sed al ili tio tute ne gravis kondiĉe ke temos pri glora morto kaj ke poste ilian famon diskonigos la poetoj.

* * *

Dum la tagoj antaŭ Belteno, ni infanoj pli kaj pli ekscitiĝis. Laŭ la kutimo ni rajtis ekkolekti la lignon por la fajroj nur je la antaŭvespero de la lasta novluno antaŭ la festo, sed niaj planoj estis jam delonge pretaj. Tuj kiam venis la ĝusta tago, ni kuregis al la arbaretoj kiel hundoj senĉenigitaj.

Belteno estas la centra punkto de la jaro. Ĝi okazas en tiu periodo kiam la mondo ankoraŭ tremas inter vintro kaj somero. Ja, la vetero estas malvarma kaj pluvema kaj ankoraŭ sentiĝas koto sub la piedoj, sed jam la pli varmaj tagoj oftigis, la frostoj pasis, oni finis la printempan semadon, kaj la freŝaj verdaj folietoj montras, ke baldaŭ

venos la somero.

En la antaŭvespero de la festo, estis grave estingi ĉiujn fajrojn en la vilaĝo. Eĉ ne unu flamo rajtis resti, ĉar la postan tagon ni devis rekomenci per nova fajro, kies flamoj nutros nin dum la tuta somero kaj daŭre dum Samono kaj la sekvonta vintro, ĝis revenos Belteno. Sed ne temis nur pri tio: la fajro donos novajn lumon kaj forton al la pala printempa suno kaj certigos, ke ĝi plubrilos super nia teritorio dum la venonta jaro.

Ni infanoj ĉiam atendis kun aparta entuziasmo la antaŭvesperon de Belteno, kiam oni kutimis dormi ekstere en la kampoj. Evidente ne necesis, ke eĉ la infanoj dormu en la kampoj, sed ĉiuj plenkreskuloj faris tion kaj kompreneble ankaŭ ni volis partopreni. Eĉ kiam pluvis, kiel kelkfoje okazis, tio tute ne malkuraĝigis nin. Ni portis eksteren garbojn da pajlo kaj kovris nin per feloj, sub kiuj ni restis sufiĉe varmaj kaj sekaj. Ne estis facile endormiĝi. Unue ni flustradis kaj subridadis inter ni, kaj poste ni rapide pasis al pli ekscitaj ludoj, kiel enfosiĝi profunde en la pajlamason aŭ forŝovi unu la alian, ĝis finfine la fasko disfalis kaj necesis leviĝi por reĝustigi ĝin. Ni sciis, ke neniu plenkreskulo ĝenos nin en tiu nokto. Ili estis okupataj en la grenokampoj, kie ili kuŝis inter la novaj verdaj burĝonoj por certigi bonan rikolton. Elspirojn kaj krietojn portis al ni la vento tra la montetoj: la samajn sonojn, kiujn mi kelkfoje aŭdis nokte en nia malluma kabano, kiam miaj gepatroj supozis, ke ni dormas.

Ankaŭ ĉi-jare ni ekdormis tre malfrue, sed apenaŭ eklumiĝis la postan matenon, kaj la lastaj steloj ankoraŭ videblis en la ĉielo, kiam nin vekis mia patrino. "Ĉu vi kuŝas ankoraŭ, kun pajlotigoj en la haroj, kiam ni devas transiri la montetojn antaŭ la sunleviĝo?" ŝi diris. "Kaj la bovinoj muĝas kaj la kokinoj falas de siaj stangoj pro malsato. Hastu, aŭ oni ekbruligos la festofajron dum ni ankoraŭ promenetos trankvile laŭ la vojo."

Ni rapidis hejmen al la domaro, tremetante pro la malvarma aero de frua mateno, por manĝigi la bestojn kaj melki la bovinojn. Mi kuris al la rivero por ĉerpi la akvon, dum miaj patrino kaj fratino plenigis korbon per la manĝaĵoj, kiujn ni pretigis jam la antaŭan tagon.

Kiel eble plej baldaŭ, la tuta familio ekiris. Estis malvarmete kun iom da vento, sed la ĉielo estis sennuba. Ŝajnis ke poste estos sufiĉe bela tago. Miaj patrino kaj onklino pelis la porkojn, dum ni aliaj gvidis la bovinojn. La plej malfacila momento venis, kiam necesis konvinki ilin eniri la akvon. Bonŝance la rivero estis en bona humoro: estis jam sufiĉe malfacile okupiĝi pri la bestoj, sen la neceso trakti ankaŭ kun la rivero. Ĉe la alia bordo troviĝis la vojeto, kiu kondukis ĉirkaŭ la malaltaj deklivoj sub nia vilaĝo kaj tiam laŭlonge de la rivero kontraŭflue ĝis la Kresto, kie devis okazi la ceremonio. Multaj vilaĝanoj kaj brutoj jam vidiĝis sur la vojo.

La Kresto estis malalta monteto, laŭdire la tombo de giganto. Ĝi troviĝis proksimume duonvoje inter nia vilaĝo kaj la posta. Estis du malpli grandaj vilaĝoj iom pli norde, kaj eĉ el tiuj kutime venis kelkaj homoj por partopreni la feston. Belteno estis la ĉefa

okazo por renkonti homojn el la aliaj vilaĝoj, por revidi parencojn kaj por aranĝi geedziĝojn. Estis multaj intimaj familiaj ligoj inter niaj kvar vilaĝoj. Mi estis kontenta esti ankoraŭ iom tro juna, por ke miaj gepatroj ekserĉu por mi edzon, sed fakte mi esperis, ke mi povos edziniĝi kun iu el mia propra vilaĝo. Mi ne volis iri loĝi en fremda loko.

Ĉe la Kresto svarmis granda homamaso. Kelkaj homoj arigis la bestojn malantaŭ palisaro, aliaj preparis la fajrojn, sed la plejmulto ĉefe interesiĝis trovi siajn parencojn kaj interŝanĝi salutojn kun malnovaj geamikoj. Mia patrino malaperis inter la homamaso por serĉi sian fratinton, kiu edziniĝis al viro de la apuda vilaĝo. Post mallonga tempo ŝi revenis, gvidante sian fratinton kaj areton da malgrandaj infanoj. Ni salutis niajn gekuzojn iom reteneme; ni laste vidis ilin je Belteno antaŭ unu jaro. Unu el la pli junaj havis maltrankviligan similecon al Tasgjos, kaj mi demandis min, ĉu mia patrino rimarkis tion. Post lia morto antaŭ du vintroj, ŝi neniam menciis lian nomon se ŝi povis tion eviti. Sed ŝajne ŝi ne ĉagreniĝis. Ŝi gaje babilis kun sia fratino, kaj ridis dum ŝi montris la novan bebon, mian frateton Makaron.

Subite ĉiuj silentis. Ni ĉesis paroli kaj rigardis al la Kresto. Dumnovalos aperis ĉe la flanko de la monteto, sekvate de du grupoj de naŭ viroj. Kverka fosto jam staris antaŭ la festofajro, kun alia fosto kruce trametita tra truo en la pinto. La du grupoj de viroj ekkaptis la ekstremaĵojn de la trametita trabo kaj komencis rapide ŝovi ĝin tien kaj reen kvazaŭ ili segus. Dum ili laboris, la tamburoj eksonis mallaŭte, por helpi ilin teni la ritmon.

Malgrandaj nubetoj de fumo baldaŭ elpafiĝis, sed la viroj estis laciĝantaj kaj ankoraŭ ne aperis eĉ unu fajrero. Mia onklo, kiu ĉiam imagis malbonon pri ĉiuj, komencis laŭte esprimi sian suspekton, ke iu en unu el la aliaj vilaĝoj ne estingis sian fajron. Tio klarigus, kial la ligno ne ekbrulas. Bonŝance, en tiu momento subite flagris flamo kaj la seka ligno rapide brulegis.

Tuj oni aplikis ardantan torĉon al la festofajro, kaj dum ĝi ekflamis, la tamburoj silentis. Tiu abrupta silento estis kiel longa enspiro. Neniu parolis. Niajn okulojn tiris la fajro, kaj tiam leviĝante malantaŭ ĝi, aperis la Spirito de la Suno. Temis pri junulo, ankoraŭ ne tute matura, kiel la suno en la komenco de la somero. Li portis flavan kaj ruĝan robon kaj en ambaŭ manoj tenis torĉojn, kiujn li ekbruligis en la flamoj de la festofajro ĵus pretigita por li. Tiam li turnis al ni la dorson kaj marŝis majeste supren ĝis la pinto de la Kresto, kiel la suno malrapide leviĝas en la ĉielo. Bedaŭrinde la imponon de la momento detruis freneza Dumna, kiu aperis senaverte kaj paŝegis supren flanke de la Suno, en groteska imito de ĉiu lia gesto, ĝis du militistoj rapidis antaŭen kaj firme forkondukis ŝin. "Do, ŝi imagas, ke ŝi povas aperi kiel la Suno en lia tuta gloro," mia onklo komentis. "Tiu rolo postulas kuraĝon, kaj pli da ĝi ol iam ajn havos tia malgrasa ostokolekto kia ŝi."

Sed la Suno, kiel decis, ne permesis al si ĝeniĝi pro la okazaĵo. Li daŭrigis sian malrapidan vojon supren ĝis la pinto de la Kresto, kie li levis alten la torĉojn kaj turnis sin por fronti nin. Ni kovris niajn okulojn per la manoj kaj ĵetis nin teren, blindigite pro

lia brilego.

Sekvis nun la momento, kiu aparte plaĉis al ni infanoj. Du longaj linioj de brulaĵoj estis jam aranĝitaj laŭ la flanko de la Kresto. Ili konsistis el la branĉoj kaj aliaj lignaĵoj, kiujn ni kolektadis dum la antaŭaj tagoj. Dumnovalos prenis brulantan torĉon el la festofajro ĉe la pinto, kaj ekbruligis la du liniojn. La flamoj kuregis laŭlonge de la faskoj de unu fino al la alia, kaj atendinte iomete ĝis ili perdis la unuan forton, ni liberigis la porkojn el la palisaro kaj pelis ilin per krioj kaj batoj en la direkto de la fajroj. La porkoj estis devigataj eniri la mallarĝan koridoron inter la du flamantaj strioj, kaj ili galopis freneze ĝis la alia fino, kie ili trovis la elirejon parte blokita pro la granda festofajro. Alia grupo de vilaĝanoj reĉasis ilin laŭ la sama vojo, ĝis finfine ili sukcesis eskapi el la fermita ejo. Kelkaj estis brulvunditaj tiel serioze, ke ili kriegis pro doloro. Tiujn ni intencis buĉi por la festo, sed intertempe la ceterajn ni repelis internen de la palisaro. Sekvis la vico de la bovinoj, kaj laste tiu de la ĉevaloj.

Post ĉi tiu parto de la ceremonio, Dumnovalos grimpis ĝis la pinto de la Kresto, kie la Suno briladis super la okazaĵoj. Ankaŭ li portis ruĝan-flavan robon, por ke la Suno rekonu lian rajton aliri. Sed eĉ la druido ne kuraĝis alproksimiĝi al la Suno en ties tuta gloro. Li haltis je ioma distanco, ŝirmante siajn okulojn, kaj ĵetis sin teren dum ni faris same pli malsupre. Tiam Dumnovalos levis la kapon kaj humile petegis la Sunon, ke li venu brili sur niaj kampoj. Unue la Suno ignoris lin, sed finfine li ŝajnis cedi kaj malrapide sekvis Dumnovalon malsupren laŭ la deklivo, dum ni eksaltis kaj kriis pro ĝojo.

En granda grupo ni ĉiuj sekvis je sekura distanco, dum Dumnovalos kondukis la Sunon tra la kamparo, kaj la Suno levis alte siajn torĉojn kaj svingis ilin super ĉiu kampo. Tio daŭris grandan parton de la tago, ĉar necesis viziti ankaŭ la kampojn de la alia vilaĝo, kaj ni ne revenis ĝis longe post la tagmezo.

Intertempe la junaj virinoj jam rostitis la porkojn, kaj nun ni sidiĝis sur la herbon por ĝui grandiozan feston. La plej bonaj pecoj, kompreneble, estis rezervitaj por la Suno, kiu ankaŭ konsumis grandan kvanton da biero. Oni atendis, ke li sufiĉe ebriiĝu, ĉar tio helpos lin alfronti la lastan parton de la ceremonio.

Dum la manĝo proksimiĝis al fino, la bruo kaj ekscita babilado malpliiĝis ĝis obtuza zumado. La pli junaj infanoj jam delonge enuis pri manĝado kaj forkuris por ludi. Mia patrino vokis min, por ke mi forpaku la restantajn manĝaĵojn en la korbojn, kaj mi iris al ŝi malvolonte. Fakte mi volis serĉi mian amikino Elvisan, sed mi sciis, ke mia patrino ne liberigos min ĝis kompletigo de la tasko, do mi hastis por fini ĝin.

Miaj patro kaj onklo staris apude sur la herbo kaj vigle interparolis. Ŝajnis, ke ili aŭdis kelkajn interesajn onidirojn de la aliaj viroj. Kutime iliaj diskutoj ne tuŝis min, sed hodiaŭ mi kaptis ion, kio aŭskultigis min pli atente.

“Romo estas la ĝusta loko por molventra rampulo kiel li,” mia onklo diris. “Kutimiĝinta la tutan vivon al mola lito kaj plena stomako. Li sentos sin pli hejme en Romo ol iam

ajn en la propra reĝlando.”

“Estas strange imagi tian militiston inter tiuj romanoj, kun iliaj razitaj vizaĝoj kaj afekta konduto,” mia patro diris.

“Li enmarĉiĝos en romaj porkaĵoj ĝis li estos pli grasa ol porko en la antaŭvespero de Samono,” mia onklo diris. “Kunobelinos neniam plu vidos lin, pri tio ni povas esti certaj, nek li sentos la mankon.”

“Ni esperu,” diris mia patro. “Se li ja revenos trans la maron, li venos kun roma armeo ĉedorse.”

En la voĉo de mia onklo vibris malestimo. “Ne imagu, ke tiuj romanoj malŝparos siajn lancojn pro iu feĉulo, kies propraj fratoj kontraŭas lin. Por ne mencii lian patron, se la novaĵo estas vera.”

“Laŭ mia opinio, Kunobelinos ne plu okupiĝas pri tiaj aferoj,” mia patro diris. “Tiuj liaj filoj ne donas eĉ unu sekiĝintan tigon por la tradicioj de siaj patroj, aŭ de siaj avoj de antaŭaj jaroj, kaj Kunobelinos faras malpli por malhelpi ilin ol maljuna kaprino. Mi diras al vi, ke tiu homo perdis ĉian regon super siaj filoj.”

“Jen vi,” diris voĉo ĉe mia dorso, “kaj mi puŝiĝis tra la homoj por serĉi vin.” Mi turnis min kaj trovis mian amikino Elvisan, altan knabino kun malhelaj, krispaj haroj, kiujn ŝi nur per terura peno sukcesis ligi en plektaĵojn. Preskaŭ ĉiam vidiĝis eskapintaj bukloj, kiuj nesubpremeble elstaris en la malĝustaj lokoj. Tamen estis evidente, ke hodiaŭ ŝi faris seriozan provon glatigi ilin.

Mi kuris apud ŝi por aliĝi al la aliaj junulinoj. Malgranda rondo jam formiĝis ĉirkaŭ Kanda, diketa knabino, kiu ĉiam volis esti en la centro de la agado kaj diri al la aliaj, kion ili faru. Mi estus preferinta sidiĝi aliloke, sed jam Elvisa puŝiĝis sencere monie al la mezo de la grupo. Kaj mi devis konsenti, ke estas tre agrable sidi kun la aliaj, sciante ke almenaŭ dum unu tago mi liberiĝis de la muelado kaj portado kaj sarkado kaj de la multenombraj aliaj taskoj, kiuj kutime okupas mian tempon. En aliaj tagoj tute ne eblis ripozi; se mi haltis eĉ malmultajn minutojn por revii, la maldolĉa voĉo de mia patrino rapide revenigis min al la realeco: “Ĉu vi denove sidas farante nenion, dum la greno kreskas en la kampoj? Se vi havas nenion pli utilan por fari, iru preni vian ŝpinaĵon.”

La vetero estis preskaŭ perfekta, eventuale kun iom tro da vento, sed krom tio, precize kiel Belteno ĉiam revenas al mia memoro, kun brilanta suno kaj pufaj blankaj nubetoj en blua ĉielo. Mi bedaŭris vidi, ke la ombroj longiĝas, montrante ke la tago baldaŭ finiĝos. Sed nun alproksimiĝis la vespero. Ni iĝis maltrankvilaj kaj nia entuziasma babilado iom post iom estingiĝis. Ni plusidis kune dum kelka tempo kaj tiam leviĝis por re-aliĝi al niaj familiaj grupoj.

Ĉie en mia ĉirkaŭaĵo la festantoj revigliĝis kaj komencis organizi sin. Patrino vokis siajn infanojn per voĉoj, en kiuj aŭdiĝis urĝa nuanco. La finaj momentoj de la festo

estis alproksimiĝantaj. La suno estis baldaŭ subironta.

Mi ne tuj rimarkis, ke la tamburoj jam eksonis. Ili sonis tiel mallaŭte kaj malrapide, ke ili estis apenaŭ rimarkeblaj, kaj ilia ritma bam-bam-bam aŭdiĝis nur kiel obtuza baso sub la zumo de voĉoj. Sed eĉ en la momento, kiam mi ekkonsciis pri ĝi, tiu malklara baso komencis elstari el la ĉirkaŭaj sonoj, ĝi iĝis iom post iom pli laŭta kaj rapida, kaj ekekestis kiel io aparta.

Ĉi tiun momenton ni atendadis la tutan tagon. Mi preskaŭ forgesis ĝin dum mi parolis kun la aliaj knabinoj, sed ĉiam mi duonkonsciis pri ia anticipo, pri ia sento ke la kulmino de la festo ankoraŭ ne alvenis.

Mia haŭto piketis ĉiufoje kiam mi rigardis la Sunon. Kiaj estas liaj pensoj nun? Mi esploris lian vizaĝon, serĉante ian signon pri tio, kio okazas interne de lia kapo, sed lia esprimo malkaŝis nenion.

Kiam mi estis malgranda, mi ĉiam imagis, ke la Suno iel superis tiajn normalajn homajn emociojn, kiaj timo kaj doloro. Tiu supozo definitive eksplodis kelkajn jarojn pli frue, kiam la Suno panikis. Li manĝis tre malmulte dum la festo, kaj kiam alproksimiĝis la vespero li paliĝis pli kaj pli, kaj nerva spasma aperis en unu flanko de lia vizaĝo. La homoj en mia proksimeco rigardis unu la alian maltrankvile. Kaj efektive, kiam ni atingis la kulminon de la ceremonio, li komencis eligi orelŝirajn kriojn de teruro kaj provis lastmomente fuĝi tra la homamaso. Liaj kunuloj devis kapti lin kaj fini la aferon perforte.

Mi memoras la malestimon de mia patrino pro tiu malinda konduto. “Kia manieraĉo agi!” ŝi abrupte kriis dum ni marŝis hejmen. “Tiu junulo hontigis sin mem kaj sian familion. Kia malĝojo por lia patrino, devi aŭskulti sian filon plori kaj vekii antaŭ la geanoj de kvar vilaĝoj! Homo ne devus proponi sin por fari aferon, se poste mankas kuraĝo por fini ĝin. Se li renaskiĝos kiel limako, tio ne estos malpli bona sorto ol li meritas.”

Kaj kiel oni povus antaŭatendi, kiam la Suno rifuzis sekvi sian ĝustan vojon, tiu estis tre malbona jaro. La suno brilis kiam ni bezonis pluvon, kaj estis ŝtormoj kun torenta pluvo dum la rikolto. Tial, kiam la ĉi-jara Suno reiris al sia pozicio ĉe la pinto de la Kresto, ni rigardis lin zorge. Ne gravus se li verŝus kelkajn larmojn en ĉi tiu momento: tio signifus, ke la pluvo dum la jaro abundos. Sed se li senbride plorkrius, tio estus tre malbona signo.

La Suno staris ĉe la pinto de la Kresto, alte tenante siajn torĉojn, kaj dume la malrapida batado de la tamburoj plilaŭtiĝis. La batado estis por li; neniel li povus rezisti tiun regulan ritmon. Li plonĝigis siajn torĉojn en la teron, kaj ili estingiĝis. Tiam, tre malrapide, li ekmarŝis majeste malsupren laŭ la deklivo. Samtempe, la junuloj senbrue ariĝis malantaŭ lia dorso. Eĉ la plej kuraĝa Suno povus ŝanceliĝi je la lasta momento, kaj en tiu kazo ili estos pretaj por direkti lin al lia celo. Sed ĉio funkciis glate. Sen eĉ ioma hezito nek tuŝo de malantaŭe, la Suno, tute sola, paŝis fiere en la fajron.

Lia korpo tordiĝis inter la flamoj, donante lastan brilon al la vespera ĉielo, dum la suno subiris.

* * *

La tago post Belteno ĉiam ŝajnis al mi la plej teda de la tuta jaro. Post monato da preparoj kaj atendado ĉio finiĝis, kaj nun restis nenio por antaŭĝui ĝis Samono post duona jaro. Mi rigardis el la malfermita pordo kaj pensis, ke laŭdire Belteno estas la unua tago de la somero. Oni certe ne imagus tion. La vetero estis malvarma, pluva kaj griza.

Mi muelis grenon: tasko, kiun mi aparte malŝatis. Ĉe nia kabano troviĝis ankaŭ mia onklino; ŝi kaj mia patrino kune pretigis legomojn antaŭ ol hejti la fornnon. La pli junajn knabinojn ili jam sendis eksteren por gardi la porkojn, kiuj fosumis en unu el la nekultivitaj kampoj. Miaj patro kaj onklo estis for ĉe la vilaĝo; ili iris por ricevi tiun porcion de la cindroj de la Suno destinitan por nia domaro. Venis al mi la penso, ke ili prefere ŝutu kelkajn cindrojn sur nian domaron anstataŭ verŝi la tutan kvanton sur la kampojn. Utilus al ni iom da sunbrilo.

Dum mi laboris, revenis al mia menso kelkaj frazoj de la konversacio, kiun mi aŭdis inter la viroj la antaŭan tagon. Ŝajnis al mi bona okazo por mencii la temon. Sed mia patrino ne estis tre klarigema.

“Ĉu mi ne jam havas sufiĉe por pripensi pro la bakado kaj la sarkado, sen ke mi ankaŭ ĝenu min pri ĉiuj stultaĵoj, kiuj okazas en la mondo? Via patro estas la homo kun tempo por tiaj aferoj.”

Mia onklino estis pli bone informita. “Tiuj filoj de Kunobelinos havis grandan kverelon, laŭ tio kion mi aŭdis. Unu el ili ĵus forlasis sian propran landon kaj transiris la maron al Romo.”

“Kia bela frateca konduto,” mia patrino komentis malŝate. “Oni tute ne imagus, ke ili naskiĝis fratoj, se oni rigardas la ameman manieron, laŭ kiu ili traktas unu la alian. Kaj kion faras ilia patro, tion mi volus scii, ke li permesas al siaj filoj kvereli kaj disputaĉi kaj forpuŝi unu la alian trans la maron?”

“De tiom da jaroj ili faras precize kion ili volas, ke ili tute ne plu pretas aŭskulti sian patron, nun kiam li maljuniĝis,” mia onklino respondis. “Sed ne tio maltrankviligas min. Mi nur demandas min, kio okazos, kiam Kunobelinos forlasos ĉi tiun vivon.”

“Tiam ili frenezos kaj furiozos kiel bovoj en kampo. Same kiel faris Kunobelinos en sia junaĝo. Estas familioj, kiuj vidos sian domaron ekbruli post jaroj da laboro, kaj la greno, kiu putros en la kampoj, kaj la bovinoj kaj ŝafoj forpelitaj ...”

Ili plutranĉis la legomojn silente. Mia patrino ekstaris. “Nu, ne utilas maltrankviliĝi pro tio, kio ne nepre okazos. Kiom da tempo vi bezonas ankoraŭ por finmuĝi tiun grenon, Bivana, tiel tikle kaj tuŝete kaj ludete, ke mi perdas ĉian paciencon? Vi ne faris sufiĉe por nutri mortantan kokinon. Rapidu, knabino, mi volas ekhejti la fornon.”

Mi saltetis kulposente kaj komencis frotigi la muelŝtonon kontraŭ ĝia bazo kun nova energio. Fakte, mi estis revanta. De kiam mi estis malgranda mi ĉiam aŭdis pri la mita reĝo Kunobelinos en la oriento, kiu estas fabele riĉa kaj manĝas de arĝentaj teleroj venintaj la tutan vojon el Romo. Mi apenaŭ povis imagi la vivon kiam ne plu estos la reĝo Kunobelinos.

Miaj brakoj doloris kaj la muelado ankoraŭ ne estis finita, kiam envenis mia amikino Elvisa kun siaj akvositeloj. “Ĉu vi venas ĉerpi akvon?” ŝi demandis.

“Ĉu vi preskaŭ finis?” mia patrino diris al mi. “La spiritoj protektu nin! Ĉu nur tiom vi faris? Ni malsatmortus sen ia dubo, se ni dependus de vi por niaj manĝaĵoj. Vi ne moviĝos el ĉi tiu domo ĝis mi vidos tiun poton plena je faruno.”

“Mi atendos vin,” Elvisa diris afable. Ŝi estis la filino de Alaŭnos, la frato de mia onklino, kiu loĝis sur la alia flanko de la monteto. Ŝi sufiĉe similis lin: kiel li, ŝi havis tolereman, ne tro postulan aliron al la vivo, kaj serĉis la amuzan flankon en ĉio. Foje mi demandis min, ĉu ŝi ne trovas min iom teda. Estis vere, ke ŝi kelkfoje incitiĝis, kiam mi ne komprenis unu el ŝiaj ŝercoj, sed ŝi ĉiam forgesis la aferon tuj poste.

Ni ne estis aparte intimaj kiel infanoj, ĉar mi preferis ludi kun Kaljakos, dum ŝi ĉiam impetis post siaj pli grandaj fratoj. Plenkreskante, ni nun trovis pli da komunaj intereso, kvankam duone surprizis kaj flatis min ŝia evidenta preteco amikiĝi kun mi, kaj mi demandis min, ĉu ne temas pri eraro. Mi ne plu ĝuis la antaŭan intimecon kun mia kuzo, kiu nun pasigis sian tempon ĉefe kun aliaj samaĝaj knaboj, kaj liaj fratinoj estis amikinoj pli de Vinda ol de mi.

Spronate de la perspektivo akompani Elvisan al la rivero, mi laboris pli entuziasme, kaj baldaŭ povis montri al mia patrino monteton da grajneca bruna faruno. “Mi ne vidis vin puŝi tiun ŝtonon tiel rapide dum la tuta mateno,” estis ŝia komento. “Do, ekiru nun kaj ne restu tie la tutan tagon. Necesas sarki la hordeon, se ni ne volas kreskigi kampon da herbaĉoj.”

“Mi kaj panjo eliros frue morgaŭ matene por tranĉi alnobranĉojn,” Elvisa anoncis, dum ni marŝis malsupren, svingante niajn sitelojn. “Ĉu vi venos kun ni?”

“Mi venos,” mi promesis, “se panjo permesos. En ĉi tiu momento ŝi tiom kriaĉas, ke ŝi timigus la korvojn.”

Venis vespero antaŭ ol mi kuraĝis aludi al la temo. Neatendite, mia patrino ŝajnis sufiĉe kontenta pri la afero. “Vi havas bonan ŝancon nun, kaj vi multe lernos de la patrino de Elvisa, se vi uzos viajn okulojn. Neniu en la vilaĝo scias pli ol ŝi, kiam temas pri mikado de koloroj, kaj kiel fiksi ilin al la lano. Estu certa fari ĉion, kion ŝi

diros al vi, kaj eble ŝi invitos vin alifoje.”

La patrino de Elvisa, Svadvan, oni konis en la tuta vilaĝo pro ŝia lerteco pri tinkturado. Ŝiaj koloroj estis ĉiam aparte brilaj kaj puraj, kaj ŝi sciis, kiel fari la pli malfacilajn tinkturojn: la bluan kaj la ruĝon, kiujn la plejmulto el la homoj eĉ ne kuraĝis provi. Mi ofte vidis virinojn el la vilaĝo, kiuj pretermarŝis nian heĝon portante faskojn de jam ŝpinita lano, por ke ŝi tinkturu ilin kontraŭ kompenso de koko aŭ korbo da ovojn.

Mi pasigis la postan tagon kun Elvisa kaj Svadva en la arbaretoj apud la rivero, kie mi kun plezuro tranĉis la alnobranĉojn kaj forigis la sekigotan ŝelon. Temis pri nur la unua el multaj ekspedicioj, ĉe kiuj mi akompanis ilin tiusomere por rikolti foliojn, florojn, radikojn, berojn, ŝelojn, kaj ĉiun alian parton de planto, pri kiu oni havus esperon persvadi ĝin liberigi sian kaŝitan koloron por tinkturi lanon aŭ linon. Multajn posttagmezojn mi pasigis ĉe ilia domaro, babilante kun Elvisa dum ni tralaboris monton da ŝeloj aŭ radikoj, kiujn ni devis tranĉi en tute malgrandajn pecetojn antaŭ ol trempi ilin en pluvakvo. Se entute eblis, Svadva insistis pri pluvakvo por siaj tinkturoj, ĉar laŭ ŝi, per riverakvo ne ekzistus espero fiksi la kolorojn unuforme. Sed ŝi uzis riverakvon por la fina lavado, do estis pli simple fari la boligadon kaj trempadon ĉe la riverbordo. Elvisa kaj mi pasigis tie multajn somerajn posttagmezojn, prizorgante la fajron sub la kaldrono por ke la kolora miksaĵo daŭre boletu je la ĝusta intenseco.

Kompreneble, mi jam konis la plejmulton el la pli uzataj tinkturplantoj - la virinoj de mia vilaĝo fieris pri sia kapablo produkti kolorajn teksaĵojn kun desegnoj de strioj kaj kvadratoj - sed Svadva havis fundon da sekretaj scioj, kiu superis ĉion, kion mi akiris de mia patrino. Ŝi povis diri, kiun planton oni plej verŝajne trovos en la ombro de difinita arbo, kiujn oni prefere pluku en la frua mateno aŭ dum la malkreska fazo de la luno, kiun oni tranĉu nur per osta tranĉilo. Nur flarante la kaldronon, ŝi povis taksu kiam venis la momento por kirli ĝin aŭ por aldoni kelkajn manplenojn da brano aŭ da kalko pulvorigita.

La kapabloj de Svadva fascinis min, kaj baldaŭ mia ĉefa deziro estis iĝi same lerta kiel ŝi pri la produktado de tinkturoj. Sed mi vidis, ke ŝi scias multe pli ol ŝi pretas malkaŝi al mi. Kiam ŝi plukis difinitajn plantojn, mi kelkfoje rimarkis, ke ŝi murmuris sorĉon subvoĉe. Ne konante ŝiajn sorĉojn, mi sciis, ke mi havas neniun esperon akiri kompareblan lertecon. Mi povis diveni la celon de la sorĉoj, ĉar ankaŭ mi konis plurajn, kiujn mi lernis de mia patrino. Ni ripetis ilin kiam ni lasis la paston por pufiĝi aŭ la bieron por fermenti. Sed tiuj estos senutilaj por la tinkturoj. Mi sciis, ke Svadva certe transdonis siajn sorĉojn al Elvisa, kaj plurfoje mi rimarkis Elvisan murmuri ion dum ni kune rikoltis plantojn. Mi estis tentata alproksimiĝi por subaŭskulti la vortojn, sed mi sciis, ke se mi faros tion, ili ne plu invitos min. Ne estis kialo por supozi, ke Svadva kaj Elvisa estos pretaj dividi kun mi siajn sekretojn.

Dum ni vagis ekstere, ni ofte renkontis vilaĝanojn, kiuj serĉis herbojn aŭ fungojn, aŭ plantojn por fari tinkturojn, same kiel ni. Foje ni vidis Dumnovalon en la malproksimo, kiu murmuris subvoĉe dum li serĉis sub la heĝoj, sed ni ĉiam zorge evitis lin. Estis konsilinde ne tro interesiĝi pri la radikoj kaj floroj, kiujn li bezonis por siaj miksaĵoj, kaj

kompreneble liaj sorĉoj estis eĉ pli sekretaj ol tiuj de Svadva. Morimanos havis rakonton pri homo, kiu ŝtelrigardis druidon, esperante malkovri liajn magiaĵojn. La druido rimarkis nenion, sed plurikoltis plantojn kaj distranĉis ilin kaj boligis ilin super la fajro; dum la tuta tempo la viro restis kaŝita malantaŭ arbo por rigardi kaj aŭskulti. Subite venis birdeto, kiu eksidis sur la ŝultro de la druido kaj parolis en lian orelon. La druido ne levis siajn okulojn, sed plukirlis la kaldronon. Dum li kirlis, li diris klarvoĉe, “Neniu homo havas okulojn por vidi tion, kion mi tenas en la mano.” Tiam la viro en sia kaŝejo falis, kaj kiam li vekiĝis, li troviĝis sur la herbo, kaj li estis komplete blinda.

Dum tiuj posttagmezoj, kiujn mi pasigis kun Elvisa apud la rivero por prizorgi la boletantan tinkturaĵon, ni ofte vidis la frenezan Dumnan, kiu vadis en la malprofunda akvo kun alte kroĉita jupo por rikolti junkojn. Kiam ni estis solaj, ni ŝajnis ne rimarki ŝin; oni neniam sciis, kiajn strangaĵojn ŝi diros aŭ faros. Sed se Svadva ĉeestis, ŝi ĉiam salutis Dumnan per ĝentila tono. Tiam Dumna respondis per sia raspa voĉo kaj plej ofte venis al la bordo por alparoli nin. Elvisa kaj mi moviĝetis malkontente, kiam ni vidis ŝin alproksimiĝi. Ni sciis, ke ŝi alparolos nin per duonkompreneblaj demandoj, kiujn ni ne povos respondi, kaj ke ŝi ridos make, dum ni senespere serĉos taŭgan reason. Poste ŝi prezentos al ni po unu floron per ceremonia gesto, dirante konfuzan frazon, kiu ŝajnos implici, ke ŝia donaco havas ian profundan, kaŝitan signifon. Se tio efektive okazis, ni ĉiam dankis ŝin ĝentile kaj akceptis la florojn, kiujn ni fiksis tra la maldelikata ŝtofo de niaj vestoj por esprimi nian kontenton pro la donaco.

Unu fojon, anstataŭ florojn Dumna donis al ni tute malgrandajn, sed perfektajn, korbetojn. Mi konservis la mian tre longe. Ĝi estis tro malgranda por havi iun ajn praktikan utilon, sed mi metis en ĝin kelkajn specialajn objektojn kaj amuletojn, kiujn mi akiris dum la jaroj: blankan ŝtonon preskaŭ en la formo de apro; brile bluan plumon, kiun mi iam trovis apud la rivero; lignopecon kun krude ĉizita vizaĝo supre, kiun donis al mi mia frato Atepilos.

Neniu en nia vilaĝo faris pli belajn korbojn ol Dumna, kaj ŝi estis preta fordonaci ilin kontraŭ unu pano aŭ kelkaj ovoj. Kiam ni estis apud la rivero, Elvisa kaj mi ofte vidis ŝin ordigadi junkojn en faskojn laŭ longeco kaj dikeco, antaŭ ol dismeti ilin por sekiĝi sub la suno. Dumna dediĉis nenecesan kvanton da tempo al ĉi tiu agado. Ŝi prenis ĉiun junkon laŭvice, ekzamenis ĝin nekredeble detale, tiam komparis ĝin kun ĉiu unuopa fasko de jam pretigitaj junkoj, por decidi, kie ĝi plej taŭge aliĝu. Ŝi kapablis malŝpari plenan matenon por pene kompletigi tiun senutilan taskon kun persisto formika. Sed eble ne temis pri tute vana laboro, ĉar la rezultoj certe ŝajnis pravigi la atenton, kiun ŝi dediĉis al sia tasko. Korbo farita de Dumna estis tuj rekonebla: ĝi estis perfekte prilaborita kun la tranĉitaj finaĵoj de la junkoj belorde aranĝitaj.

En la komenco ne ĝenis mian patrinon la fakto, ke mi pasigas tiom da tempo kun Elvisa kaj Svadva. En la daŭro de la somero, tamen, kiam mi ofte malaperis dum plenaj tagoj, ŝi komencis grumbli. “Ĉe la familio de Elvisa vi devus loĝi, anstataŭ ĉe ni. Mi ne vidas vin inter sunleviĝo kaj la malluma nokto, kaj se mi serĉas iun por manĝigi la porkojn aŭ forpeli la ŝafojn el la hordeo, la bebo estas pli utila ol vi. Ĉu ne troviĝas sufiĉe por fari ĉi tie, sen ke vi ĉiam forkuru kun via kapo plena je ŝtofoj kaj koloroj?”

Kial vi ne finas vian teksaĵon, kiu pendas jam tutan monaton en la kadro, anstataŭ reveni ĉi tien, ĉu frue, ĉu malfrue, kun la manoj makulitaj verde aŭ la manoj makulitaj flave?” Sed malgraŭ siaj plendoj, ŝi ŝajnis kontenta pri miaj novaj scioj. Kondiĉe ke mi finis miajn proprajn taskojn en la mateno, ŝi kutime permesis, ke mi kuru al la domaro de Elvisa post la tagmezo.

Mi tamen havis dubojn, kiel ŝi reagos, kiam Svadva proponis, ke mi akompanu ilin al la arbaro por serĉi difinitajn ŝelojn kaj likenojn, kiujn ŝi bezonis. La invito neimageble entuziasmigis min; mi tre malofte iris tiel malproksimen, kaj la arbaro troviĝis eĉ preter la domaro de Dumnovalos. Kutime, mi iris tien nur en la aŭtuno, kiam ĉiuj infanoj iris dum pluraj sinsekvaj tagoj por rikolti nuksojn kaj berojn, kaj glanojn por la porkoj. Ĉiam plaĉegis al ni tiuj malmultaj tagoj, kiuj tiel ekscite interrompis nian ĉiutagan rutinon. Sed iri meze de la somero estis plezuro tute neatendita.

Fakte, mia patrino ŝajnis sufiĉe kontenta pri mia bonŝanco. “Vi vere multe helpis la patrinon de Elvisa, kaj ŝi evidente trovas vin utila, alie ŝi ne invitus vin kuniri,” ŝi diris. “Estas bedaŭrinde, ke ŝi ne vidas vian malkontentan mienon, kiam mi petas vin forigi poton de la fajro aŭ leviĝi de via loko por kirli la supon. Sed nun atentu: estu certa resti tute proksime al ŝi kiam vi trairos la arbaron, kaj ne forvagu laŭ fremdaj vojoj.”

Mi sciis pri kio ŝi pensas, kompreneble. Ni evitis paroli pri la Malbona Loko. Fakte, mi jam iris tien unu-du fojojn por apartaj aferoj kiam mi estis pli juna, kaj mi havis malklaran memoron pri timigegaj duonformitaj figuroj kaj montoj da homaj kranioj. Estis tie ankaŭ aliaj aferoj, ne aferoj videblaj: potencaj fortoj kiuj ŝvebis super la ejo kiel malhelaj nuboj. Laŭ mia imago, neniu besto aŭ birdo loĝas tie, kaj la herbo estas ŝlima kaj nigriĝinta. Eĉ Dumnovalos kuraĝis viziti la Lokon nur en la fiksitaj tagoj aŭ je difinitaj apartaj okazaĵoj. Se mi restos kun Svadva, tamen, ne estus kialo por ke mi troviĝu en tiu parto de la arbaro. Neniu normala homo volus vagi al tiuj vojoj, kie eĉ la arboj malice erarigus ŝin.

La cetera parto de la arbaro estis tute malsimila. Ĝi estis donema kaj amika; ĝi ĉiam montris sian bonvolon al la homoj de mia vilaĝo kaj provizis nin per ĉio, kion ni bezonis. Kondiĉe ke mi aliros ĝin kun la ĝusta respekto, mi estos tie sekura kiel en la brakoj de mia patrino.

Ni ekiris frumatene en tago, kiu promesis poste iĝi bela kaj somereca. La suno ankoraŭ ne estis plene altiĝinta kiam ni atingis la randon de la arbaro. Baldaŭ ni povis vagi tra la longa herbo de multenombraj maldensejoj, varmigante nin sub la suno, dum insektoj zumis kaj papilioj flirtis super la floroj en la brila lumo. Mia ĉiutaga vivo ŝajnis malproksima, kaj la penso pri mia domaro ŝvebis antaŭ mi kvazaŭ mi memorus ion el alia vivo. La bruetoj de la kampoj ne atingis min ĉi tie, kaj mi aŭdis nur la pepadon de birdoj, la susuradon de folioj, foje la vokon de strigo, subitan agitiĝon sub la arbustaro, aŭ la krakon de rompita branĉo ie en la malproksimo. Eble tiuj malmultaj tagoj, en kiuj ankoraŭ netuŝite de konscio pri la estonteco mi plenigis mian korbon per ŝeloj kaj likenoj, branĉetoj kaj folioj, estis la plej feliĉaj, kiujn mi iam ajn spertis.

Kvankam mi apenaŭ interesiĝis pri tiaj aferoj, estis maleble ne konstati, ke en la granda mondo ekster nia vilaĝo okazas ŝanĝoj. Estis nun evidente, ke Kunobelinos estas mortanta, sed eĉ lia ŝvelinta reĝlando ne sufiĉos por kontentigi ĉiujn liajn filojn. Li havis kvar aŭ kvin, sen kalkuli tiun, kiu iris al Romo. Estis sufiĉe verŝajne, ke iuj el ili direktos sian atenton al apudaj teritorioj, ĉiu kun la espero gajni sian propran reĝlandon. Sed la filoj de Kunobelinos troviĝis malproksime en la oriento, kaj estis malfacile imagi, ke tiaj aferoj rekte tuŝos nin.

Precize nun okazis ekscita nova evoluo en mia persona situacio. Elvisa venis serĉi min en tago de malfrua somero, kaj ni kune portis niajn sitelojn malsupren al la rivero. Mi vidis, ke ŝi volas diri al mi ion, sed necesis atendi ĝis ni pasis la izolitan spindelarbon ([noto 6](#)), kiu kreskis apud la vojeto. Ni ĉiam suspektis ĝin pri malbona volo kaj atentis por ne ofendi ĝin, tamen ni preferis ne diskuti niajn sekretojn en ĝia proksimeco. Elvisa atendis ĝis ŝi estis certa, ke niaj voĉoj ne plu atingas la arbon, kaj tuj diris, “Ĉu vi ne opinias, ke mia frato estas bela viro?”

Mi estis konsternita, sed ankoraŭ ne certa, ĉu la demando signifas tion, kion mi suspektas. “Kiu frato?” mi demandis singarde.

“Pri kiu frato mi parolu nun?” ŝi respondis senpacience. “Belinos.”

“Mi apenaŭ vidis lin, krom kiam mi restas malfrue ĉe vi kaj li revenas de la kampoj.” Tio ne estis absolute vera. Malantaŭ la kabano de Elvisa estis puto da urino, kiun Svadva uzis por fiksi siajn tinkturojn. Unu fojon mi iris malantaŭen kaj trovis lin, kiu staris tie kun larĝe malfermitaj kruroj por pisi en la puton. Mi tute konfuziĝis kaj forkuris tuj, sed ne antaŭ ol kapti la malafablan rigardeton, kiun li pafis al mi.

Elvisa kaj mi plumarŝis en silento dum kelkaj minutoj, tiam ŝi diris, “Mi aŭdis panjon diri al mia patro, ke vi havas lertan manon je la tinkturoj. Ŝi diris, ke vi estus bona bofilino.”

Mi ne respondis tuj; mia menso estis tro okupata pro ĉio implicita en ŝiaj vortoj. Kompreneble mi sciis, ke mi devos edziniĝi post kelkaj jaroj, sed ĉiufoje kiam venis al mi tiu penso, mi forpelis ĝin. Mi ne volis ekloĝi en la domaro de alia familio, sub la rego de bopatrino, kaj eble tiel malproksime de mia propra familio, ke mi vidos ilin nur je Belteno. Sed se mi nepre devos edziniĝi, mi ne povis imagi pli bonan solvon ol aliĝi al la familio de Elvisa. Ne estus kvazaŭ mi ekloĝus ĉe nekonatoj, kaj ilia domaro estis tiel proksima, ke mi povus viziti mian familion ĉiutage, se mi dezirus. Sed por mi la plej grava afero, kaj la unua kiu trafis min, estis tio: ke se mi iĝos la bofilino de Svadva, certe ŝi dividos kun mi ĉiujn siajn sekretojn. Kiam temis pri Belinos, mi malmulton sciis pri li: nur ke li estas alta kaj maldika kun aknoj sur la vizaĝo. Krom tiu embarasa

renkontiĝo ĉe la urinputo, mi neniam entute pripensis lin ĝis tiu momento.

“Nu, ĉu vi staros tiel la tutan tagon, kun la okuloj fiksitaj al via sitelo?” demandis Elvisa. “Mi diras al vi, ke estas vera bonŝanco. Vi povos veni loĝi ĉe ni. Kaj se vi kraĉus el la pordo, vi trafus vian propran domaron. Li estas trankvila kaj silentema, mia frato Belinos; li ne estos ĉiam ĝenanta kaj muĝanta, kiel faras kelkaj edzoj.”

“Jes, sed ankaŭ vi edziniĝos tre baldaŭ kaj transloĝiĝos al alia familio. Kaj tiam malgrandan plezuron vi donos al mi kiel bofratino.” Sed malgraŭ miaj protestoj, mi estis jam tute konvinkita. Elvisa kaj mi ŝercis kaj ridis dum ni plenigis niajn sitelojn.

Dum ni interparolis ekscite, surprizis nin vidi mian fraton Atepilon, kiu glitis malsupren laŭ la vojeto de la vilaĝo. Li mansvingis al ni, kaj baldaŭ alvenis ĉe la alia bordo de la rivero. “Venu al la domo,” li diris, dum li saltis trans la riveron per la ŝtonegoj. “Estas novaĵoj.”

Ni sekvis lin supren kiel eble plej rapide, kun la pezaj siteloj kiuj frapadis kontraŭ niaj kruroj. Alveninte ĉe la domaro, ni trovis ke ĉiuj parolas samtempe. Ŝajnis, ke Karatakos, la filo de Kunobelinos, kondukis armeon en la reĝlandon de la Dobonoj, tuj norde de nia lando. Mia patrino grumblis kolere dum ŝi kirlis grandan kaldronon. “Ĉu mi ne jam antaŭvidis ĉi tiajn afliktojn, kun tiom da junuloj kiuj diskuras svingante glavojn kaj svingante lancojn, tiel kverelaĉaj kaj kriaĉaj, ke ili timigas eĉ la spiritojn? Ili patro ankoraŭ ne forlasis ĉi tiun vivon, kaj jam la ĝenoj komenciĝas. Ekzistas homoj, kiuj ne eltenas vidi la aliajn ĝui trankvilan vivon, sed tuj volas detrui kaj distreti iliajn kampojn.”

Intertempe, miaj patro kaj onklo strebis eltiri pliajn informojn el Atepilos. Ŝajne li ricevis la novaĵojn de Isarninos, la kuzo de mia patrino, kiu aŭdis ĝin en la kabano de Katumandos la antaŭan vesperon. Sed ne plu restis multo por rakonti. Almenaŭ duona monato jam pasis de kiam la armeo eniris la landon de la Dobonoj, sed ankoraŭ ne alvenis sciigoj pri la sekvo. Atepilos sciis nur, ke kelkaj vilaĝoj jam cedis al la invadintoj, dum en aliaj regionoj oni forte rezistas.

Baldaŭ nia najbaro Alaŭnos alvenis por pludiskuti la aferon kun miaj patro kaj onklo. Ili longe staris kune en la mezo de la kabano, en la preciza loko kie ili pleje malhelpis mian patrinon dum ŝi provis kuiri.

“Tiuj filaĉoj de Kunobelinos troigis ĉi-foje,” mia onklo diris. “Ili kuŝis la tutan vivon sur molaj plumoj, plenigante la faŭkon per roma vino, kaj nun ili kredas, ke ili triumfos super la Dobonoj. Kiam ili aŭdos la lancojn sibli preter iliaj oreloj, ili grakos kaj disflugos kiel timigitaj kokinoj.”

“Ne pro roma vino viro perdas sian forton,” Alaŭnos diris. “Karatakos estas same brava kiel iu ajn militisto en nia lando, kaj mi neniam aŭdis, ke mankas al li kuraĝo. Li diskurigos la Dobonojn sen ia ajn ĝeno. Kaj cetere, ĉu ne temis pri la reĝo de la Dobonoj, kiu fordonacis sian glavon kontraŭ vazo da vino kaj malgranda arĝenta

bovleto el trans la maro?”

“Kion vi havas kontraŭ la Dobonoj,” mia patro demandis Alaŭnon, “kiuj estis sufiĉe bonaj najbaroj en ĉi tiuj jaroj, kaj loĝas trankvile trans la montetoj sen entute ĝeni nin?”

Alaŭnos ignoris tiun demandon. “Estas tro frue por aŭdi, kiel la afero finiĝis,” li diris. “La novaĵoj vojaĝos ankoraŭ duonmonaton antaŭ ol atingi nin.”

Finfine mia patrino sukcesis puŝi ilin ekster la pordon, kaj ili reiris al la kampoj, plu laŭte diskutante.

Dum la postaj tagoj, la viroj pasigis sufiĉe da tempo ĉe la herbejo, parte por repoluri siajn batallertojn, sed ĉefe por teni pretan orelon por kapti la lastajn novaĵojn. Komence ŝajnis ke la armeo de Karatakos superos niajn najbarojn; ĝi sukcesis kapti grandan regionon en la orienta kaj centra partoj de la reĝlando. Poste ni aŭdis, ke oni haltigis ĝian antaŭenpuŝon. La Dobonoj plutenis la nordan kaj sudan partojn de la reĝlando, sed mankis al ili sufiĉa forto por peli la invadintojn for el la centra regiono kaj reen al ilia propra lando. Laŭ nia vidpunkto, tio signifis, ke almenaŭ provizore la situacio restas trankvila. La strio, kiu tuŝis la teritorion de nia popolo, restis en la manoj de la Dobonoj. Kaj mi, intertempe, havis multe pli interesajn aferojn por okupi mian menson.

Iun posttagmezon, mia patrino sendis min malsupren al la herbejo kun kelkaj manĝaĵoj por la viroj. Revenante, mi vidis homon antaŭ mi sur la vojo. Estis Belinos. Li marŝis tiel malrapide, ke mi ne povis ne atingi lin. Mi intencis tuj preterpasi, sed li salutis min, kaj mi komprenis, ke ĝuste min li atendis. Mi resalutis, provante ne ruĝiĝi, kaj ni plupromenis kune. Mi estis kontenta, ke ne ĉeestas Elvisa, alie mi certe eksplodus pro nerva ridado.

“Troviĝas amaso da homoj ĉe la herbejo nuntempe,” li diris post iom da tempo.

Mi konsentis kaj trakribis mian cerbon, serĉante plian frazon por aldoni. “Mi ĵus portis malgrandan korbon da manĝaĵoj al mia patro,” estis la respondo, kiun mi finfine sukcesis elpensi.

Ni plupromenis iomete, ĝis li diris, “Nu, mi devas hasti.” Mi salutis lin kun sento de liberiĝo, kaj li returnis sin al la herbejo.

Mi saltis kaj kuris la tutan vojon ĝis mia hejmo, kantante kaj babilante al mi mem. Mi senpacience atendis la momenton, kiam mi povos rakonti ĉion al Elvisa. Efektive li estis tre maldika, kaj liaj oreloj tro multe elstaris, sed li havis afablan, amikeman mienon. Liaj aknoj, kiuj antaŭe iom mallogis min, iel ne plu gravis.

Ne longe post tiu renkontiĝo alvenis la novaĵo, kiun ni atendis de tiom da tempo: la reĝo Kunobelinos mortis. Mi komencis kompreni kun maltrankvilo, kiom mia persona feliĉo dependas de eksteraj faktoroj. Tiel ofte mi aŭdis la virojn diskuti, kion faros la

filoj de Kunobelinos, kiam li ne plu ĉeestos por reteni ilin, kaj la invado de la dobona reĝlando ŝajnis antaŭaverto de tio, kion ni povos atendi. Antaŭ mallonga tempo, mi senpacience sopiris novajn, pasiajn spertojn: danĝeron kaj batalojn. Sed nun mi komencis kompreni la malentuziasmon de mia patrino pri tiaj aferoj. En la momento, kiam mia vivo ŝajnis ekmarŝi laŭ nova kaj plene kontentiga direkto, io ekokazis, kio certe povus devojigi ĝin al tute alia trako. Mi estis ankoraŭ multe tro juna por edziniĝi; necesis atendi almenaŭ tri pliajn jarojn. Multo povos okazi dum tiu tempo, precipe nun kiam la filoj de Kunobelinos ĉirkaŭvagas kaj flaretas kiel ĉashundoj, ĉiu serĉante la spuron, kiu kondukos al ekposedo de la propra teritorio.

Frue en la aŭtuno, mia patro revenis de la herbejo kun maltrankviliga novaĵo. Laŭŝajne ne sufiĉis al Karatakos granda peco el la teritorio de la Dobonoj; li nun kondukis armeon ankaŭ en la reĝlandon de Verika. Kvankam Karatakos neniel povis esti konsiderata amiko de nia popolo, tamen mi sciis, ke la viroj admiras lin; certe mi ofte aŭdis ilin diskuti liajn meritojn. Ili trovis lin kuraĝa kaj militema, kaj konsideris lin subtenanto de la tradicioj de sia popolo. Ankaŭ Kunobelinos estis tia en sia junaĝo, antaŭ ol li cedis al la plezuroj de la facila vivo kaj al la fluo de luksaĵoj el Romo.

Aliflanke, mi neniam aŭdis bonan komenton pri Verika, kies reĝlando tuŝis la teritorion de mia popolo en la orienta flanko. Li ĉiam subiĝis al la deziroj de Romo, kaj ĉiuj konsentis, ke nur tial li sukcesis teni la potencon dum tiom da jaroj. Perdinte sian junaĝan impulsiĝemon, Kunobelinos preferis lasi lin en paco ol riski inciti la romanojn. Sed tia prudenta politiko apenaŭ taŭgus por batalema juna militisto kia Karatakos. Ĉe mia popolo, ni admiris aŭdacan, senhezitan konduton, ne timeman kalkuladon de sekvoj.

Ne longe poste alvenis la informo, kiun ĉiuj atendis: la reĝlando de Verika falis al Karatakos. Verika eĉ ne provis kontraŭstari lin. La unuopaj vilaĝoj devis mem pripensi sian defendon, kaj tuj kiam evidentiĝis, kiel la afero finiĝos, Verika malaperis.

Neniu sciis, kien li iris, sed abundis onidiroj, laŭ kiuj li jam troviĝas sur la vojo al Romo. Tamen, malpli interesis nin Verika ol la demando, kion Karatakos faros nun. Almenaŭ provizore, li ŝajnis kontentiĝi per la reĝlando de Verika, sed estis malverŝajne, ke li haltos tie. Plia movo portos lin al nia propra lando. La viroj komencis pasigi eĉ pli da tempo ĉe la herbejo, kaj estis iom da diskutado pri tio, ĉu oni konstruu kroman remparon ĉirkaŭ la vilaĝo.

* * *

En posttagmezo mallonge antaŭ Samono, mia patro venis hejmen de la kampoj kun la informo, ke Alaŭnos kaj liaj fratoj venos ĉe nin la postan vesperon. La pretigado okupis min kaj mian patrinon dum la tuta sekvonta tago. Vindan ni sendis kun korbo

da ovoj pli supren laŭ la rivero al familio, kiu bredis abelojn. Ilia domaro ne estis aparte proksima, kaj iri tien kaj reen postulis tutan matenon. Sed Vinda estis kontenta pri la komisio, kvankam pluvis. Estis pli amuze promeni tien ol helpi min kaj mian patrinon ŝanĝi la pajlon interne de nia kabano, kaj ni bone sciis, ke ŝi certe kaptos la okazon por sufiĉe leki la mielon dum la reveno.

Dum la posttagmezo ni bakis mielkukojn, kiujn ni kutime faris nur por festoj. Intertempe ni varmigis grandan kaldronon da akvo super la fajro, kaj poste mia patrino helpis min lavi miajn harojn per herba miksaĵo. Sekiginte miajn harojn apud la fajro kaj kombinte ilin, mi surmetis mian bonan robon.

Mia patro revenis frue de la kampoj, tute tratrempite. Mia patrino tuj proponis al li tason da biero kaj pretan manĝon. Post la manĝo, ŝi sendis min kaj Vindan al la kabano de mia onklino trans la korto. La pluvo intertempe iom malpliiĝis sed ne komplete ĉesis, do ni transkuris rapide; mi aparte atentis por ne makuli mian robon per koto.

Tuj kiam ni eniris la alian kabanon, miaj gekuzoj ekkaptis Vindan, kaj ĉiuj komencis flustri kaj ridaĉi inter si. Mi sentis min sufiĉe idiota, kaj pasigis la tempon per ne tre konvinka provo helpi mian onklinon kardi lanon ĉe la fajrolumo.

Miaj gekuzoj kaj Vinda konstante rigardis eksteren, por vidi kio okazas trans la korto. “Jen Alaŭnos nun, kun felo da biero sub la brako. Li venas kun siaj du fratoj kaj la koramanto de Bivanjo. Kian vizaĝplenon da aknoj tiu havas, kaj sufiĉe grandajn orelojn por involvi vin ambaŭ dum la malvarmaj, longaj noktoj de la vintro. Kian belan rason de infanoj produktos Binjo, aknulojn kun svingiĝantaj oreloj!”

Mi sentis mian vizaĝon varmiĝi. “Ho, ne ĝenu min per via bruo!” mi diris.

“Tenu viajn langojn nun, kaj lasu Bivanan en paco,” mia onklino riproĉis ilin. Ŝi forsendis ilin de la pordo kaj malsuprentiris la felan klapon. “Ŝi havas pli gravajn aferojn ol viajn stultaĵojn por pripensi ĉi-nokte.”

Finfine eniris mia patrino por diri, ke oni vokas min. Ekstere, la pluveto jam pasis, sed la malvarma aero tranĉis min ĝisoste. La ĉielo estis komplete sennuba kaj en ĝi brilis sennombraj steloj. “Ĉiuj homoj komplimentas min pro mia admirinda filino,” ŝi diris, dum ni transiris al nia kabano. “Levu vian kapon alte kaj fiere, kiam vi eniros.”

Per la malforta lumo en nia kabano, mi vidis ĉiujn turni sin por rigardi mian alvenon. Mia patro venis al mi kaj gvidis min permane al Alaŭnos kaj Belinos, kiuj sidis kun krucitaj kruroj sur hundofeloj en la plej bona loko proksime al la fajro. Mi sidiĝis apude dum mia patro klarigis al mi la kondiĉojn. Ili pagos du melkobovinojn kaj konstruos por mi kaj Belinos novan kabanon ĉe la domaro de Alaŭnos. Laŭ la kutimo, la pagon oni transdonos kiam ni geedziĝos post kvar jaroj. Intertempe mi laboros regule por Svadva, kaj ŝi ekinstruos al mi la sekretojn de sia metio.

Tiam la viroj pasigis inter si la bieron, kaj mi iris sidiĝi apud mia patrino. Mi vidis, ke ŝi

estas tre kontenta. “Alportu la mielkukojn,” ŝi diris, “kaj mi diros al ĉiuj ke vi faris ilin per la propraj manoj. Ili komprenos, ke ili ne forĵetis la pagon kontraŭ iu ajn knabino, kiun oni facile trovas plektantan junkojn apud la rivero.”

Kiel kutime, la viroj diskutis Karatakon. Estis jam malfrue en la jaro, kaj se li intencas eniri nian teritorion, plej verŝajne li atendos ĝis post la vintro. Ilia interparolado vekis en mi malagrablajn pensojn, kiuj subfosis mian feliĉon. Mi provis forpuŝi la maltrankviligan senton. Finfine, niaj militistoj ja estis famaj pro sia kuraĝo, kaj cetere, estis tute ne certe, ke Karatakos vere intencas invadi nian landon. Mia patro opiniis, ke ne, kaj mi ne dubis, ke li pravas. Sed mi tiom deziris scii kun certeco. Ĝis lastatempe, niaj vivoj ŝajnis tiel seninteresaj kaj rutinaj. Nun, eĉ la venontajn monatojn kaŝis netravigebla vualo.

* * *

Tiun vintron, la unuan fojon en generacio, okazis rabatako. La rabistoj venis nokte, kaj atakis grupon de sendefendaj domaroj malsupre de la vilaĝo laŭ la rivero.

Du el la domaranoj estis mortigitaj; iliajn senkapajn kadavrojn oni trovis la postan tagon. Sed la plejmulto el la loĝantoj, se ne menciis la bovinojn kaj aliajn bestojn, estis tutsimple malaperintaj.

Neniu spuro restis por klarigi la devenon de la rabintoj, sed neniu eĉ dubetis, ke ili venis de Lugos-kresto. Tiu estis la plej granda kaj potenca el la tri pli malproksimaj vilaĝoj laŭ la rivero. Ŝajnis strange, tamen, ke post tiom da jaroj ili subite decidis revivigi tiun antikvan malamikecon. La antaŭa somero ja estis sufiĉe bona kun kontentiga rikolto, kaj ni ne ricevis raportojn pri bovinmalsano aŭ aliaj problemoj, kiaj eventuale decidigus ilin kompensi siajn malgajnojn alimaniere.

Tuj kiam la novaĵo atingis nian domaron, la viroj ekkaptis siajn armilojn kaj formarŝis. Urgajn mesaĝojn oni jam sendis al la najbaraj vilaĝoj, kaj dum la tuta mateno ni vidis senĉesan fluon de armitaj viroj, kiuj grimpis la deklivojn fronte al nia domaro ĝis la vilaĝo. Vinda kaj miaj pli junaj gekuzoj diskuris en stato de freneza ekscito, kaj hakegis per bastonoj ĉion, kion ili trovis, dum mia patrino plufaris la domtaskojn kun multaj malbonvolaj komentoj. Eĉ mia pacema onklino kriis malbenojn kontraŭ tiuj monstroj, kiuj detruis sendefendan familion. Unu el la malaperintaj virinoj estis la fratino de ŝia bofratino.

Mi estis riparanta korbon kiam la novaĵo alvenis, sed nun mi apenaŭ plu komprenis, kion mi faras. Estis maleble koncentriĝi pri mia laboro, kaj mi nur plektadis la junkojn tra miaj fingroj dum mi pripensis tion, kio okazis ĉe la malfeliĉa domaro. Miaj iamaj heroaj fantazioj jam komplete forvaporigis. Mi konsideris tion pura bonŝanco, ke la rabintoj ne atingis nian monteton.

Unu el la malaperintoj estis Melikja, junulino de proksimume mia aĝo. Ŝi estis unu el la grupo kun kiu mi kaj Elvisa sidis je Belteno. Efektive mi ne konsideris ŝin aparta

amikino; mi ne sufiĉe ofte renkontis ŝin por tio. Tamen mi ja konis kaj ŝatis ŝin, kaj nun mi apenaŭ povis kredi, ke vere trafis ŝin sorto tiel terura. Estus pli facile akcepti la aferon, se ŝi estus mortinta pro malsano. Tio ja kelkfoje okazis al knabinoj de mia aĝo, kaj estis pli facile adaptiĝi al ĝi, precipe se oni jam ricevis antaŭaverton.

Sed tre verŝajne Melikja vivas ankoraŭ. Ili ne forportus ŝin nur por mortigi ŝin. Krom - la ideo trafis min kun hororo - se ili intencas oferi ŝin. Tiel oni ofte traktas kaptitojn. Kompreneble, estis ankaŭ eble, ke ili simple tenos ŝin kiel sklavon. En tiu kazo, ne estos malfacile por ŝi eskapi, kiam la situacio retranskviliĝos, kaj tiam duonmatena promenado reportos ŝin hejmen. Lugos-kresto ne estis malproksima.

Sed ekzistis ankaŭ alia ebleco. En la malnova tempo, kiam rabatakoj estis pli kutimaj, oni ofte vendis gekaptitojn al komercistoj, kiuj tute forportis ilin, eventuale al la orientaj reĝlandoj, aŭ eĉ trans la maron al Gaŭlujo, aŭ al Romo mem. Mi ne povis liberigi min de tiu lasta ideo. Mi imagis Melikjan alveni en Romo, en tiu ŝtona loko kie vidiĝas nek arbo nek herbero, por ke oni vendu ŝin kiel sklavon aŭ manĝigu ŝin al iu el tiuj monstraj bestoj. Necesis memorigi min, ke plej verŝajne ili simple tenos ŝin en Lugos-kresto, ĝis iun belan matenon ŝi reaperos, promene inter la montetoj. Mi devis tamen konfesi, ke mi iugrade seniluziiĝus, se tio okazus. La pasiaj scenoj, kiujn mi kreis en mia imago, ja tiklis mian fantazion, kaj mi bedaŭrus malhavi ilin.

La viroj revenis antaŭ ol mallumiĝis. Ili rakontis, ke ili perdis plurajn anojn de sia kompanio: ĉefe el la aliaj tri vilaĝoj, sed mortis ankaŭ du el nia propra vilaĝo. Temis pri Visumarkos: maldika, silentema homo, kiu estis ano de la militistaro de Katumandos; kaj Katarnos, porkobredisto el domaro pli supre laŭ la rivero. La Lugosanoj, kiel oni povus imagi, antaŭvidis la alvenon de la kontraŭekspedicio, kaj rifuĝis interne de sia vilaĝo. Niaj homoj mortis en rekta sturmatako: senespera entrepreno, nepre malsukcesonta. La vilaĝo de Lugos estis bone lokita sur kruta monteto, kaj ĉirkaŭis ĝin alta remparo. Tamen, post la insulto al nia popolo, rekta sturmatako estis la sola akceptebla reago, kiom ajn ĝi kostus. En tia situacio, oni rigardus nur kun malestimo tian homon, kia paŭzus por taksi siajn ŝancojn.

Niaj homoj almenaŭ sukcesis detrui kelkajn el la apudaj domaroj, kvankam ili reportis nenion havindan. Kiel antaŭvideble, la brutojn kaj ĉiujn aliajn valoraĵojn oni jam pelis internen de la remparo antaŭ ol ili alvenis. Ĝenerale necesis agnoski, ke la kontraŭekspedicio ne estis aparte sukcesa, sed almenaŭ ĝi montris, ke ĉiu atako estos tuj venĝita.

Kaj ili reportis unu kaptiton: junan virinon. Mi ne scias, kial ŝi troviĝis ekster la remparo. La problemo estis tio, ke kaptinte ŝin, neniu sciis, kion fari pri ŝi. Iuj sugestis, ke Katumandos kaj Rigandrika tenu ŝin kiel sklavon, sed montriĝis, ke tiu ideo ne aparte entuziasmigas Rigandrikan. Finfine, oni donis ŝin al unu el la militistoj, kies edzino mortis lastatempe. Tiu postlasis al li kvar infanojn, sen kalkuli tiun, kiu mortis je la nasko, kaj li bezonis iun por prizorgi ilin kaj por estri lian hejmon.

Vinda kaj mi ekiris la sekvontan posttagmezon kun niaj gekuzoj por viziti la domaron,

kiu estis celo de la rabatako. Ne estis multo por vidi, kiam ni alvenis. La konstruaĵoj restis sendifektaj, kaj ni seniluziiĝis, ke ili montras tiel malmultajn postsignojn de la dramaj okazaĵoj, kiuj disvolviĝis tie antaŭ nur du noktoj. La kadavroj de la viroj estis forigitaj, kaj ĉio preninda estis jam forportita. Ni vagis tra la senhomaj kabanoj kaj rigardis kun scivolo la malmultajn restintajn spurojn de la antaŭaj loĝantoj: unu-du rompitaĵojn, kelkajn kotajn ĉifonojn, pecon de ŝpinilo. Estis makulo antaŭ la pordo de unu el la kabanoj, kaj la pli junaj knabinoj insistis, ke temas pri sango, sed mi ne estis konvinkita. Cetere, ĝi povus same verŝajne montri la lokon, kie oni buĉis ŝafon, kiel tiun, kie oni mortigis homon.

Oni antaŭvidis, ke la Lugosanoj sendos duan rabobandon, por repagi nian kontraŭatakon. Dum la sekvantaj tagoj mi ofte rigardis suden al la montetoj, duonatendante ke mi vidos grupon de armitaj rajdantoj, kiuj subite aperos ĉe la horizonto. Ni ne maltrankviliĝis ĝis tiu grado, ke ni decidis konduki la brutojn al la vilaĝo, ĉar tion oni certe ne farus facilanime, sed la plenkreskuloj deĵoris laŭvice por gardostari dum la nokto. Tamen, la rabantoj ne revenis, kaj iom post iom oni rezignis pri la nokta gardado.

Mi vidis la kaptitinojn unu fojon, plurajn monatojn poste, kiam mi iris al la vilaĝo pro iu komisiono. En la momento kiam mi preterpasis, ŝi venis el unu el la grenejoj kun korbo en la mano. Ŝia aspekto havis nenion por aparte distingi ŝin de la aliaj junaj virinoj, krom eble la malkontenta mieno. Mi rigardis kun scivolo ŝian robon, kies desegno estis malsama ol tiu kiun ni normale uzis en nia vilaĝo, pro nekutima aranĝo de la koloraj strioj. Mi pensis, ke mi provos iam kopii ĝin.

Ŝi eskapis post nelonge. Ŝi forŝteliĝis el sia kabano en nokto plenluna, dum ĉiuj dormis, kaj grimpis trans la remparon; estis malfacile grimpi la remparon, sed certe ne maleble, eĉ por graveda virino. Ŝi estis tute ne plu trovebla kiam oni malkovris ŝian mankon. Kompreneble oni serĉis ŝin, sed verŝajne ŝi intertempe jam atingis la sekurecon de la propra vilaĝo.

* * *

La rabatako forigis el niaj mensoj la malpli urĝan minacon de Karatakos, kiu intertempe instaligis en la eksa reĝlando de Verika, tuj oriente de nia propra lando. Cetere, eĉ se li planis atakon, malverŝajne li ekmoviĝos ĝis post la printempa semado. Alvenis la printempo sen raportoj, ke li pretigas armeon por marŝi kontraŭ nia popolo. Post la unuaj konvulsioj sekve de la morto de ilia patro, la filoj de Kunobelinos iel sukcesis repaciĝi inter si. Ĉiu el ili jam elhakis sian propran teritorieton, kaj eĉ se nur provizore, ili ĉiuj trankvile okupiĝis pri la regado de siaj novaj reĝlandoj.

Antaŭ la somero alvenis la novaĵo, ke Verika efektive fuĝis al Romo. Ni atendis dum multaj monatoj eventualan reagon de la romanoj, sed okazis nenio. Ŝajnis, ke ili ne intencas provi reinstali lin kiel reĝon nek puni Karatakon, kiu forigis unu el iliaj aliancanoj.

“Malplenajn, pufitajn vezikojn ni timas, ne homojn,” mia onklo grumblis, dum li diskutis la novaĵon kun mia patro, “kaj mi scias la veron de la situacio jam de multaj jaroj. De la junaĝo de Kunobelinos ni atentis ĉiun paŝon pro timo inciti la romanojn. Nun Karatakos forbalais ilian malgrandan etan pendaĵon, tiun Verikan, kaj kion ili faris pri la afero? Nun mi diros al vi: ili faris nenion!”

Certe, mi ne memoris periodon en mia tuta vivo, kiam la minaco de Romo, se ĝi iam entute ekzistis, ŝajnis pli malproksima. Preskaŭ ĉiuj el la orientaj reĝlandoj estis nun en la manoj de la filoj de Kunobelinos, kaj malgraŭ ilia romea eduko, estis evidente, ke neniu el ili pretas akcepti ordonojn de trans la maro. Fakte, ili eĉ faris ion, kion Kunobelinos mem ne estus aŭdacinta fari dum sia vivo: ili ekspedis mesaĝiston al Romo por postuli ke oni resendu Verikan, por ke li submetiĝu al proceso. La viroj ridegis dum tuta vespero, kiam alvenis ĉi tiu informo. Kompreneble, la romanoj ne resendis Verikan, tamen estis klare al ĉiuj, ke kontraŭ tia rekta defio al ilia aŭtoritato, ili reagis nur per malplenaj bluoj. Tiuj imponegaj armeoj, pri kiuj ni tiom aŭdis, evidente ne kapablis organizi militekspedicion trans la maron.

Kiam la situacio iom post iom retranskviligis, mia patro kaj la aliaj viroj ne plu pasigis tiom da tempo ĉe la herbejo, kvankam la knaboj kaj junuloj ankoraŭ ŝatis iri tien en la posttagmezoj. Mi estis kontenta, ke la vivo renormaligis, kaj mi dediĉis min entuziasme al la ĉiutaga rutino. Sciante, ke post malmultaj jaroj mi devos mastrumi mian propran hejmon, mi faris konscian provon perfektigi miajn kapablojn. Mia patrino jam ekdonis al mi pli respondecan laboron, kiel hejti la fornon. Ankaŭ mia fratino Vinda estis kreskanta, kaj multaj el miaj antaŭaj taskoj estis transdonitaj al ŝi.

Mi pasigis multan tempon en la domaro de Svadva por lerni la sekretojn de ŝia metio. Kiel emas okazi en tiaj situacioj, nun kiam mi faris ĝin regule, la laboro iĝis pli postula. Svadva estis malpli indulga ol antaŭe, kaj mi vidis, ke ŝi havas de mi pli altajn atendojn ol kiam mi simple helpetis pro amuzo. Se Elvisa kaj mi ne koncentriĝis pri nia tasko, tiel ke la tinkturaĵo superbolis aŭ tro sekiĝis, ŝi kolere riproĉis nin. Unu-du fojojn ŝi eĉ ekkaptis maldikan vergon, kiun oni uzis por peli la bovinojn, kaj sukcesis faligi sur nin plurajn pikajn vundetojn antaŭ ol ni eskapis eksteren al la korto. Mi ne prenis tion tre serioze. Mia patrino ja farus same.

Malrapide Svadva ekmalkaŝis al mi siajn sekretajn sciojn. Ŝi jam komencis instrui al mi kelkajn el siaj malpli gravaj sorĉoj, kvankam mi suspektis, ke estas aliaj, kiujn ŝi retenas ankoraŭ. La sorĉoj estis en sia propra mistera lingvo, kun strangaj sensignifaj vortoj interplektitaj kun promesoj aŭ minacoj, per kiuj oni celis persvadi la plantojn elverŝi sian kaŝitan brilon en la tinkturon. Kelkajn sorĉojn oni devis flustri kiam oni plukis la planton, kaj aliajn oni ripetis dum la tinkturaĵo malrapide ekbolis.

La plej malfacila parto estis lerni rekoni la apartajn odorojn, kiujn eligis la tinkturaĵoj dum la fermentado. Svadva bezonis nur malkovri la puton kaj rapide flareti, por aserti, “Ĝi bezonas plian tagon,” aŭ “Necesas kirli ĉi tiun”. Mi kliniĝis super la puto kun profunda enspiro, en vana provo rekapti la apartajn signojn, kiuj tiklis ŝian senteman nazon. Vidante tion, Svadva ĉiam ridis kaj komentis, “La spiritoj defendu nin, ĉu vi volas tordi vian cerbon per la odoraĉo de tiu puto? Mi jam okupiĝis pri la tinkturoj en aĝo kiam mi ankoraŭ postĉasis mian patrinon por ŝia lakto, kaj vi ne lernos ĝin en unu tago - nek en unu monato.”

Dum ĉi tiu periodo, mi pli bone konatiĝis kun mia nova familio. Ĉiam plaĉis al mi mia estonta bopatro, Alaŭnos. Kiam li vizitis mian kabanon, li kutimis ŝerce inciti min kaj tiri miajn harplektaĵojn. Vidante lin en lia propra hejmo, tamen, mi konstatis ke kvankam li estas ĝenerale bonhumora, li traktas siajn proprajn infanojn sufiĉe severe. Ili ĉiam obeis lin tuje kaj senhezite.

Foje Belinos revenis dum mi ĉeestis, kaj en tiuj okazoj li ĉiam venis por saluti min. Sed ĝenerale ni iom embarasiĝis kiam ni renkontiĝis, kaj ne sciis, kion diri inter ni. Troviĝis ankaŭ konfuza aro da pli aĝaj fratoj, bofratinoj, geonkloj, gekuzoj, nevoj kaj nevinoj, por ne mencii la pli junan fratinnon de Elvisa, kiu naskiĝis ne longe post Tasgjos.

Ilia domaro estis pli granda ol la nia. Ĝi enhavis kvin kabanonj krom la bovinejo kaj aliaj konstruaĵoj. Mi kaj Belinos devis ricevi novan kabanon, sed mankis libera spaco. Alaŭnos intencis aldoni novan pecon ĉe unu fino de la korto. Tio postulos sufiĉe grandan laboron, ĉar necesos plilongigi la teraltaĵon ĉirkaŭ la domaro kaj planti sur ĝi novan heĝon. Tial Alaŭnos ŝerce riproĉis min: “Kial mi serĉas tiom da ĝenoj kaj ĝemado, tion mi demandas min, por ke mi akceptu novan bofilinon en ĉi tiu momento? Jen mi, tute trankvila kaj kontenta, kiu povis senstreĉiĝi apud la fajro kaj trinki mian bieron. Por ne mencii la pagon: mi ankoraŭ ne transdonis ĝin, kaj ĝi pli ol sufiĉas, laŭ mi, por juna knabino kia vi.” Sed mi sciis, ke li ne parolas serioze. Mia patrino jam diris al mi, ke Svadva estas tre kontenta pri mia laboro, eĉ se ŝi koleras de tempo al tempo.

Konsiderante ĉion, mi memoras tiun kaj la postan jaron kiel tre feliĉan periodon. Laŭŝajne forvoriĝis la obtuzaj minacoj, kiuj maltrankviligis nin de tiom da jaroj, kaj mi sentis min libera por koncentriĝi pri la aferoj, kiuj vere interesis min. La kaŝita sciaro de Svadva ĉiam pli entuziasmigis min, kaj vidante mian lernavidon, ŝi komencis malavare dividi kun mi siajn sekretojn.

Ankaŭ la amikeco kun Elvisa donis al mi grandan plezuron. Ŝi iĝis preskaŭ kiel fratino, kio iom kompensis la fakton, ke mi neniam rilatis aparte bone kun mia vera fratino. Kaj krome, pli malrapide mi konatiĝis kun mia estonta edzo, tiel ke mi povis atendi mian edziniĝon kun sento de plaĉa anticipado anstataŭ kun maltrankvilo.

Kiam ajn mi memoras tiun periodon, ĉiam revenas al mi difinita posttagmezo en la frua somero, kiam mi eliris sola por serĉi kuirherbojn sub la heĝoj. Mi vidas min, kia mi tiam estis, kun la longaj ruĝaj harplektaĵoj, la flikita robo kaj la nudaj kruroj sunbrunaj.

Estis tago de brila suno, kaj la aero kvazaŭ vibris pro la varmo. El la tuta ĉirkaŭaĵo atingis min la dormiga zumado de insektoj, dum mi promenis laŭ vojeto el sekiĝinta koto sub la alta heĝo. La longa herbo estis plena je floroj: flavaj gencianoj ([noto 7](#)), veronikoj, timiano kaj kloŝfloroj.

Ankaŭ en la kamparo apud Romo troviĝas floroj; multaj estas samaj kiel tiuj, kiujn mi kutimis vidi en mia propra lando. Sed ĉi tie la someroj estas pli longaj kaj varmaj; la suno ardas tagon post tago, kaj apenaŭ falas pluvo. Tiam malaperas la delikataj printempaj floroj, la herbo sekiĝas, kaj la verdo cedas al flavoj kaj brunoj. Kiam mi unue alvenis, mi sopiregis tiujn aliajn kolorojn: tiujn pli riĉajn, malhelajn verdojn, kiujn mi memoris el mia propra lando. Ili ne plu tiom mankas al mi kiom antaŭe, sed eĉ nun la memoro foje revenas, kaj en tiuj momentoj mi konstatas kun apenaŭ eltenebla intenseco, ke mi perdis ĉian esperon iam ajn revidi la montetojn kaj la herbejojn de mia infaneco.

DUA ĈAPITRO

Restis ankoraŭ unu jaro ĝis mia edziniĝo - mi jam preskaŭ atingis mian dekkvinan jaron - kiam alvenis la novaĵoj. Iun printempan posttagmezon, Kaljakos iris al la herbejo, sed tre baldaŭ li reaperis, anhelante supren laŭ la deklivo kiu kondukis al nia domaro. Li iĝis lastatempe iom peza junulo, kiu jam ekprovis kreskigi siajn lipharojn, kaj post la kruta marŝo supren al la domaro gutoj de ŝvito videblis sur lia vizaĝo.

“Kie estas mia patro?” li demandis min abrupte.

“Ĉe la longa paŝtejo,” mi respondis same abrupte. Mi ne demandis, pri kio temas. Kaljakos evidente ne intencis klarigi, do mi preferis atendi.

Nur kiam la tuta familio jam amasiĝis en la korto, Kaljakos anoncis la novaĵon. “La romanoj estas transirontaj la maron,” li informis nin. “Ili kunmetas grandegan ŝiparon en Gaŭlujo.”

Aŭdante tion, mi frostotremis. Sed mi vidis, ke mia patro ne prenas la novaĵon tre serioze. “Ĉu finfine? Se ili esperas forigi Karatakon, ili trovos la aferon malpli facila ol ili imagas.”

“Tamen, estos bela afero por ni,” mia onklo diris. “Kun la romanoj ĉe lia dorso, mankos al li tempo por ĝeni nin ceterajn. Ĉu ni iru malsupren al la herbejo por aŭdi la novaĵojn? Restas ankoraŭ tempo ĝis la sunsubiro.”

Sed la tagoj kaj la monatoj pasis, kaj ni aŭdis nenion pli pri la roma ŝiparo. Laŭdire ĝi ankoraŭ ne ekvelis de Gaŭlujo. Intertempe, Karatakos pretiĝis kontraŭ ĝia alveno. Li kunigis armeon, kiu jam staris preta, kaj observistoj deĵoris laŭlonge de la suda marbordo.

En la vesperoj, la viroj senĉese diskutis, kie la roma ŝiparo plej verŝajne albordiĝos. Estis eble, ke ĝi vidiĝos ie ajn laŭ la suda aŭ orienta bordoj, verŝajne tute malproksime de nia propra lando. Ili tamen estis en ĝenerala konsento, ke la ŝiparo verŝajne provos albordiĝi ĉe unu el la malpli grandaj reĝlandoj en la oriento. Tiuj frontis konstantan minacon pro la filoj de Kunobelinos, kaj sendube iliaj reĝoj kaj tribestroj bonvenigos la romanojn per entuziasma brakumo.

“Inter tiuj tribestroj estas kelkaj, kiuj atendas kaj tremas, atendante la tagon, kiam Karatakos turnos sian rigardon al iliaj teritorioj,” mia onklo diris. “Nun ili finfine vidas la okazon por liberiĝi de li, kaj se venos la romanoj por fari la aferon, tiun helpon ili ne rifuzos.”

La printempo alproksimiĝis al fino, sed ankoraŭ la viroj revenadis de la herbejo sen novaj informoj. “Ĉu mi ne jam diris tion?” mia onklo komentis. “Ne sufiĉas Verika por konvinki tiujn romanojn transiri la akvon. Kia bedaŭro por tiuj, kiuj atendadas de

monatoj por ekvidi tiun faman ŝiparegon, pri kiu ni tiom aŭdis. Ili maltrafis la semadon, kaj ankaŭ la naskadon de la ŝafidoj: ĉio pro nenio.”

Post la unua ŝoko pro la informo ke la romanoj planas transiri la maron, mi konstatis ke tute ne praviĝis tiom da timo. Morimanos ofte rakontis al ni pri la alia fojo, kiam roma ŝiparo albordiĝis en unu el la sudaj reĝlandoj. Tio okazis antaŭ multaj, multaj jaroj, tre longe eĉ antaŭ la naskiĝo de mia avino. Kaj temis pri tiel granda katastrofo por la romanoj, ke ili neniam plu revenis.

Grandega ŝiparo transiris el Gaŭlujo, gvidata de la roma komandanto en lia propra ŝipo. Tiuj miloj da ŝipoj estis terura vidindaĵo, Morimanos rakontis al ni, kiam unue ekvidis ilin la tribestroj, kiuj atendis por renkonti ilin ĉe la bordo. Jen larĝaj plataj ŝipoj, jen longaj maldikaj rapidaj ŝipoj, jen altaj ŝipoj kun rektaj flankoj, kun grandaj kvadrataj svingiĝantaj veloj, kaj vico post vico da longegaj poluritaj remiloj.

Kiam tiu ŝiparo ekaperis ĉe la horizonto, ĉiuj tribestroj sur la bordo malkuraĝiĝis; nek troviĝis militestro, kiu ne konsterniĝis kaj tremis. Vidante, ke ili ne sufiĉas por kontraŭstari tiel multenombrian soldataron, ili retiriĝis en la arbarojn, tiel ke tiu grandioza armeo povis trankvile albordiĝi. En la unua tago la roma armeo disvadis tra la kampoj; ĝi rabis kaj bruligis kaj detruis. Sed la romanoj kaptis neniun, nek ili trovis manĝaĵojn por tiu vasta armeo, ĉar la vilaĝanoj kaŝis sin kaj siajn brutarojn en la arbaroj.

Dum la romanoj okupis sin per ŝtelado kaj rabado, la druidoj vokis grandegan ŝtormon, kiu skuis kaj ĵetis iliajn ŝipojn sur la sablon kvazaŭ malplenajn konkajn. El tiuj miloj da ŝipoj, restis eĉ ne unu sendifekta. Iliaj tabuloj elsaltis, tordiĝis la boltoj, la veloj ŝiriĝis, la ŝnuroj implikiĝis, la ferdekoj pleniĝis per akvo, kaj ili estis tiom batitaj kaj draŝitaj kaj frakasitaj kaj rompitaĵoj, ke ŝajnis maleble trovi manieron reporti ĉiujn homojn trans la maron al Gaŭlujo.

La romanoj rapidis al la bordo por ripari siajn disrompitaĵojn, kaj intertempe la tribestroj de la sudaj reĝlandoj kunigis grandan armeon. Ili elektis unu solan gvidanton, kaj ĉiuj tribestroj konsentis sekvi lin. Tiu estis Kasivelaŭnos, kiu ne havis egalulon kiam temis pri heroaĵoj kaj ruzaj artifikaĵoj. Li estis la praavo de la reĝo Kunobelinos.

Kasivelaŭnos sendis gvatistojn por spioni la romanojn dum ili okupiĝis pri siaj ŝipoj, kaj por reporti sciigon pri ĉio kion ili faras. Tiam li konsultis siajn druidojn, kaj ili konsilis, ke li evitu fronti la romanojn rekte sur la batalkampoj. Ĉar kiam la romanoj marŝas al batalo sur vasta ebenaĵo, malmultaj estas la armeoj, kiuj kapablas rezisti ilin. Anstataŭe, la druidoj rekomendis al Kasivelaŭnos, ke li turmentu la romanojn dum ili tranĉas vojon tra la arbaroj kaj marĉoj. Ili ne konas la terenon, kaj krome, ili havas unu ĉefan malfortecon: en ĉiuj momentoj devas gvidi ilin ilia komandanto. Sen lia signalo, ili eĉ ne elingigos glavon. Sed se oni sukcesos trafi ilin per surprizatako, tiel ke ili ne havos tempon por alpreni siajn batalpoziciojn, ili diskuros en konfuzo kiel ŝafaro atakata de lupoj.

Tiel la druidoj konsilis Kasivelaŭnon, kaj tiel ili faris. Kiam li trovis bandon de romanoj, kiuj vagis tro malproksime de sia kompanio, liaj militistoj pikis kaj incitis ilin kiel vespoj kiuj ĝenas dormeman virbovon. Foje Kasivelaŭnos instigis siajn homojn al ruza trompo: kredigante, ke ili forkuras, ili kondukis la soldatojn al danĝeraj irejoj tra la marĉoj aŭ embuskis ilin en tiuj lokoj, kie la arboj dense kreskis apud la vojo. Konante ĉiujn sekretajn vojetojn tra la arbaroj, ili povis ataki la romajn trupojn subite de la flanko, tiel ke parto restu fortranĉita de siaj kamaradoj. Baldaŭ la romanoj timis moviĝi krom en grandaj grupoj.

Jam pasis la somermezo, kaj la roma komandanto vidis, ke li gajnis neniom per sia vojaĝo trans la maron, sed li multon perdis. Kaj la druidoj informis Kasivelaŭnon, ke se li sukcesos reteni la romanojn ĝis la aŭtuno, ili reiros kun malplenaj manoj al Gaŭlujo, ĉar eĉ detruinte ĉiujn vilaĝojn, ili ankoraŭ ne trovis sufiĉajn brutojn kaj grenon por nutri sian armeon dum la vintro. Ili diris al li, ke nur unu aferon li devas timi: la perfidon.

Kaj tiel estis. Kasivelaŭnos havis multajn malamikojn en la apudaj reĝlandoj, ĉar la aliaj tribestroj timis lin, kaj ne malmultaj estis tiuj, kiuj volonte liberiĝus de li. Kelkaj faris interkonsenton kun la roma armeo laŭ kiu ili provizos grenon, kaj eĉ pli: ili montris la sekretajn vojojn, kiuj kondukis tra la arbaroj kaj marĉoj al la fortikaĵo de Kasivelaŭnos. Tiel okazis, ke lia fortikaĵo estis kaptita, kun ĉiuj brutoj kiuj estis arigitaj interne.

Sed eĉ tiam Kasivelaŭnos sukcesis trompi la romanojn. Neniu povis egali lin, kiam temis pri ruzaĵoj kaj lerta mensogado. Li intertraktis kun ili kaj promesis sendi ostaĝojn kaj tributon al Romo. Tiu traktaĵo estis rapide preta, kaj la roma komandanto ne atendis por poluri la nodojn kaj nitojn. Li enŝtopis siajn homojn en la ŝipojn, kaj reportis la tutan bandon al Gaŭlujo en unu sola nokto. Kaj kiam temis pri la ostaĝoj kaj tributo: ili neniam estis senditaj, nek iam ajn revenis romano por postuli ilin.

Ĉi tiun rakonton ni ripetis kaj reripetis dum tiuj monatoj, kiam ni atendis sciigon pri la roma ŝiparo. Mia onklo laŭte esprimis sian malaltan opinion pri la afero: "Ĉu mi ne diris la tutan tempon, ke temas pri stultaĵo? La romanoj ja estas malsaĝaj, sed ne tiom malsaĝaj ke ili volas veni ĉi tien, sciante ke armeo atendas ĉe la bordo por bonvenigi ilin. Kaj cetere, ne vivas tiu reĝo, kiu posedas sufiĉajn ŝipojn por transporti tutan armeon en unu fojo."

Belteno estis longe pasinta, kiam ni finfine aŭdis, kio okazis. Mia onklo pravis: la roma ŝiparo efektive ne ekveturos. La soldatoj timis, kaj ili rifuzis eniri la ŝipojn. Komercestoj portis la novaĵojn el Gaŭlujo, kaj nun la armeo de Karatakos jam disiĝis. La armeanoj estis maltrankvilaj pro siaj neprizorgataj kampoj, kaj ili senpacience diskuris por reatingi siajn vilaĝojn kaj domarojn.

La greno jam staris alte en la kampoj, kiam ni aŭdis ke la roma armeo tamen transvenis la maron. Ĝi aperis tiel senaverte, ke Karatakos tute ne provis malhelpi ĝian albordiĝon. Li lasis la romanojn komplete liberaj, dum li haste rekunigis sian armeon. Intertempe, kelkaj el la malpli grandaj reĝlandoj en la oriento decidis intertrakti. Kiel mia patro antaŭvidis, iliaj tribestroj jam enuis pri Karatakos kaj liaj kverelemaj fratoj, kaj volonte malfermis al la roma armeo vojon tra sia teritorio.

Post nelonge ni aŭdis, ke la armeo de Karatakos renkontiĝis kun la romaj trupoj. Sed la batalo finiĝis malbone por li, kaj li estis devigata retreti. Tamen la afero ankoraŭ apenaŭ komenciĝis, kaj mi vidis, ke neniu taksas ĉi tiun unuan malvenkon tro serioza. Karatakos ankoraŭ ne havis tempon por kunmeti sian plenan armeon, kaj krome li ne povis renkonti la romanojn en loko, kiun li mem elektis. Ĉiuj viroj opiniis, ke kiam li estos retiriĝinta al pli taŭga ejo, li returnos sin por fronti la romanojn denove - kaj ĉi-foje li dishakegos ilin.

Nur kelkajn tagojn poste alvenis surpriza novaĵo. Ankaŭ la frato de Karatakos, Togodumnos, marŝas kontraŭ la romanoj. La du fratoj ne havis aparte bonan rilaton, sed ŝajne ili decidis, almenaŭ provizore, enterigi siajn kverelojn. La informo, ke Togodumnos planas elrampi el la mola kokono kiu ĉirkaŭvolvas lin de tiom da jaroj, instigis mian onklon al kelkaj el siaj plej mordaj komentoj. "Kio donis al li la ideon, ke li ekportu armilojn: tia homo, kia iĝis pli grasa kaj mola ol barelo da sebo? Li rompos la dorson de sia ĉevalo per sia pezo, aŭ eble krevos la radoj de lia batalĉaro." Kaj verŝajne mia onklo prave suspektis, ke Togodumnos ne senkoste ĝuis tiujn longajn jarojn de neniofarado, ĉar baldaŭ alvenis la novaĵo, ke ankaŭ li, kiel la frato, devis retreti.

Sed ĉiuj komprenis, ke ĝis nun temas nur pri enkonduka skermado. La du fratoj ankoraŭ batalis unuope. Kuniginte siajn fortojn, ili certe komandos duoble tiom da homoj, kiom la romanoj. Kaj konante pli bone la terenon, ili sen grandaj penoj sukcesos repeli la invadantojn al iliaj ŝipoj.

Dum tiu periodo, Katumandos kaj Rigandrika regule sendis homojn al la amikaj vilaĝoj ĉe nia sudo, kaj en preskaŭ ĉiu tria aŭ kvara tago unu el ili regalopis supren laŭ la rivero, por reporti al ni sciigojn pri tio kio okazis nur kelkajn tagojn pli frue. La novaĵoj vojaĝis laŭ nekutima rapideco en tiu periodo: ili vaste disflugis inter unu vilaĝo kaj la posta tra ĉiuj sudaj reĝlandoj. La konstanta alfluo de novaĵoj nervigis nin ĉiujn. Ni ne kutimis je tiom da ekscitaj okazaĵoj en tiel mallonga tempo. Apenaŭ la viroj komencis primaĉi unu raporton dum siaj vesperaj kunsidoj ĉe la fajro kiam alvenis la posta, kiu forpuŝis la unuan antaŭ ol oni havis tempon plene ensorbi ĝin.

Pro ekscito mi ne povis koncentriĝi je miaj taskoj, kaj dum mi laboris en la domaro mi konstante rigardis malsupren al la valo. Mi atendadis en ĉiu ajn momento vidi ĉevalon kun nova mesaĝisto. Finfine mia patrino perdis paciencon. "Kio estas al vi, ke vi strabas eksteren dudek fojojn tage, kvazaŭ vi vidus la reĝon Karatakos skuiĝi supren en batalĉaro, aŭ eble eĉ la romanojn mem, unu post la alia kiel marŝantajn arbojn? La viroj martelas truon en via kranio: ili parolas, parolas, la tutan tagon anstataŭ okupiĝi

pri la fojnado, kaj se ne temas pri Karatakos, temas pri Togodumnos. Okazas kruelaj aferoj en aliaj landoj, tio estas vera, sed ili ne koncernas nin, kaj ni esperu ke ili neniam venos pli proksimen ol ili troviĝas nun.”

En tiu periodo, ni ne plene komprenis kion volas la romanoj, sed ni ankoraŭ kredis, ke tio koncernas nur Karatakon. Ni supozis, ke la roma reĝo sendis siajn soldatojn por forigi lin kaj restarigi Verikan, aŭ, pli verŝajne, por anstataŭigi lin per alia amika reĝo. Tamen, estis maltrankviliga konstato, ke roma armeo nun troviĝas niaflanke de la maro, kiu ĝis nun ŝajnis netransirebla barilo protektanta la sudajn reĝlandojn kontraŭ ekstera atako. Estis vere, ke la romanoj estas tre malproksimaj de nia lando, sed tamen ni ĉiuj fartos pli trankvile kiam ili finos tion, kion ili volas fari, kaj reiros trans la akvon al sia ĝusta loko.

Konsternis nin ankaŭ tio, ke tiom da tribestroj en teritorioj proksimaj al la nia, decidis alianciĝi kun ili. Mi memoras la tagon, kiam alvenis la onidiro, ke la Dobonoj sendis sekretajn mesaĝojn al la roma generalo kun promeso subteni lin.

“Estas facile kompreni, kion ili havas en la menso,” mia patro diris, dum li sidis kun mia onklo kaj Alaŭnos en nia malluma kabano. Estis varmeta vespero, kaj ili lasis la fajron preskaŭ estingiĝi. “De kiam Karatakos distrancis ilian reĝlandon en du partojn, li ne plu serĉu tie siajn amikojn. Se li petos ilian helpon, ili sendos al li klingon por tranĉi la propran gorĝon.”

Mia onklo konsentis. “Ili scias, ke li estas tro okupata pro la romanoj por malŝpari tempon pri ili. Ili volas liberiĝi de Karatakos, kaj ili dankos iun ajn, kiu faros tion por ili.”

“En tiu kazo la venontan reĝon donos al ili la romanoj,” mia patro diris, “kaj jen malfeliĉa fino por homoj, kiuj fieris mem elekti sian reĝon antaŭ ne tiom da tempo.”

“Kaj kia reĝo estos tiu,” mia onklo aldonis, “kiu obeos ordonojn el trans la maro? Kion oni povus diri pri viro, kiu aĉetus sian reĝecon je tia prezo?”

“Estas nur ĝuste, ke reĝo intertraktu,” Alaŭnos diris. “Kaj sagaca reĝo faros tion kun alia pli forta ol li mem: kun iu kiu havas longan brakon por helpi lin kiam tio necesos. Tio estas saĝa, kaj tio estas ĝusta. Neniu malestimas reĝon aŭ tribestron, kiu rigardas ĉirkaŭe por trovi siajn amikojn.”

Mia onklo saltis de sia sidloko, frapante sian kapon kontraŭ bierfelo, kiu pendis de la trabo tuj supre. “Kio estas al vi,” li kriis, dum lia vizaĝo ruĝiĝis pro kolero, “ke vi sidas trankvile kaj komforte apud nia fajro por diri al ni, ke estas ĝuste kaj estas dece intertrakti kun bando da razitaj fremduloj?”

Mia patro, kiel la pli aĝa, repuŝis sian kolereman fraton al lia loko, kaj mem ekstaris por fronti Alaŭnon. “Jen, aŭskultu kion mi volas diri al vi. Estas unu afero intertrakti kun tribestro, kiun oni konas kaj respektas: kun iu, kiu subtenos onin en ĉiuj okazoj. Alia afero estas trakti kun fremduloj: kun homoj, kiujn oni ne konas, kiujn oni ne povas fidi, kiuj eniris la aferon pro siaj propraj motivoj, kaj pri kiuj oni ne certas, ke ili ne

rompos sian vorton en iu ajn momento. Kaj kiom valoras tia helpo, kian oni ricevas kontraŭ pago de feloj kaj seka viando, kvazaŭ oni marĉandaĉus pri varoj ĉe la vosto de ĉarego? Prefere la ĉielo falu, antaŭ ol ni vidu Katumandon fari tian traktaĵon.”

* * *

Ne longe antaŭ la rikoltado, ni aŭdis pri granda batalo ĉe rivero. Karatakos kaj Togodumnos finfine unuigis siajn armeojn, kaj renkontis la romanojn en batalo kiu daŭris du tagojn. La raportoj, kiuj atingis nin, ne estis tre klaraj. Ŝajne la du fratoj volis alfronti la romanojn ĉe larĝa rivero ie en unu el la orientaj reĝlandoj. Sed la romanoj sukcesis transiri, kaj nun impetadis antaŭen al la interno de la teritorio regata de Togodumnos. Laŭdire ili trompis Karatakon kaj Togodumnon per tio, ke ili kontraŭbatalis ilian armeon en unu loko, dum iliaj trupoj sekrete svarmis trans la riveron ĉe alia punkto pli supre.

Tiu novaĵo sufiĉe konsternis nin. Ĝis tiu momento, ni ĉiam kredis, ke la unuiĝintaj fortoj de la Kunobelinidoj sufiĉos por haltigi la romanojn. Ilia armeo estis pli granda kaj ili konis la terenon. Cetere, ili luktis por defendi la proprajn landojn, dum la romanoj troviĝis malproksime de sia hejmo en fremda lando, kiu signifis al ili neniom. Kaj tamen sukcesis la romanoj, dum Karatakos kaj Togodumnos retretis.

“Nur per trompo ili transiris tiun riveron,” mia onklo diris, “kaj per trompo, kiun bezonus neniu vera militisto, kiu fidus la forton de siaj propraj brakoj. Se ili havus verajn batalantojn, ili estus frontintaj la armeon de Karatakos vizaĝ-al-vizaĝe. Ili ne bezonus ŝteliri malantaŭ iliaj dorsoj.”

“Nu, ili rekte frontos ilin la venontan fojon,” mia patro diris, “kaj tiam ni vidos, kiel ili fartos, kun siaj ordonoj kaj siaj trumpetosignaloj. Ili devos transiri ankoraŭ unu riveron por atingi la fortikaĵon de Kamulos, kaj ili ne povos uzi la saman ruzaĵon duafoje.”

“Ĝuste tiel,” mia onklo konsentis, “kaj temas pri timiga loko, laŭ tio kion mi aŭdis, kun koto kaj marĉoj ĉie en la du flankoj, kaj la profunda malhela akvo kiu kirliĝas ĉirkaŭe. Se la romanoj ne scios kiel alparoli la riveron per la ĝustaj vortoj, ili enmarĉiĝos ĝis la kolo, kaj la homoj de Karatakos ne bezonos eĉ tuŝi ilin.”

Do ni atendis maltrankvile dum la tagoj pasis. Certe la Kunobelinidoj ne estis aparte ŝatataj de mia popolo, kaj neniu en nia teritorio estis sendinta al ili helpon kontraŭ la invadintoj. Tamen, vekis malagrablan senton la konstato, ke la romanoj puŝiĝas ĉiam pli internen. Ŝajnis, ke ili celas la fortikaĵon de Kamulos, la plej grandan urbon en la reĝlando de Togodumnos. Mi ofte aŭdis grandiozajn priskribojn pri tiu fortikaĵo: ĝi estis preskaŭ nevenkebla, ĉar protektis ĝin parte masivaj remparoj, parte akvo kaj marĉoj.

Baldaŭ alvenis la novaĵo, ke la roma armeo transiris ankaŭ la duan riveron, kaj nun

restis neniŭ malhelpo, por ke ĝi marŝu rekte al la fortikaĵo de Kamulos. Togodumnos estis morta, kaj Karatakos mem fuĝis. Multaj el liaj tribestroj kaj militistoj akompanis lin, kaj venis sciigoj, ke ili nun moviĝas okcidenten. Oni diris, ke Karatakos planas kunmeti novan armeon en la okcidentaj reĝlandoj. La druido estis tre potenca en tiu regiono, kaj se ili konsentus subteni lin, li ricevus tiom da batalantoj, kiom li bezonas. Kiam temis pri la homoj, kiuj konsistigis la plej grandan parton de lia batalforto en la oriento, la plejmulto el ili jam fuĝis kun siaj familioj al la marĉoj aŭ la arbaroj. Neniŭ restis por kontraŭstari la romanojn, kiuj trankvile povis forporti la grenon kaj venĝi sin kontraŭ la senhomaj vilaĝoj.

Sed evidente, ĉio ĉi okazis en landoj malproksimaj, kaj intertempe okupis nin pli urĝaj aferoj. Pro la fojnado kaj la rikoltado, tiu estis la plej laborplena periodo de la jaro, kaj estis senutile tro multe pensi pri tio, kio okazas en aliaj landoj. Mia patrino naskis novan bebon en la fino de la antaŭa vintro, kaj ŝi pli ol kutime bezonis mian helpon. Sed mi ankoraŭ kuradis al la domaro de Svadva, kiam ajn tio eblis, por kunlabori ĉe la farado de tinkturoj. Pripensante la aferon nun, ŝajnas strange rakonti, ke ni pluokupiĝis pri la tinkturoj en tia situacio. Sed ni ne povis antaŭvidi la finon, do intertempe ni daŭrigis nian kutiman laboron, same kiel ni farus, se la romanoj restus trankvile ĉe sia propra flanko de la maro.

Estis familio en la vilaĝo, kiu interesiĝis pri Elvisa por sia dua filo. Alaŭnos amikiĝis kun la patro dum sia posttagmeza ekzerciĝado ĉe la herbejo. Mi sciis, ke Elvisa havas miksitajn sentojn. Efektive venis la momento ekpensi pri la geedziĝo, kaj kiam junulino en nia vilaĝo atingis sian dekkvinan aŭ deksekan jaron, ŝi komencis maltrankviliĝi, se ne aperis propono. Aliflanke, neniŭ volas adiaŭi siajn hejmon kaj familion por ekloĝi ĉe homoj, kiujn oni apenaŭ konas. Tamen, la anoj de la alia familio ne jam alvenis por diskuti la kondiĉojn. Dum la romanoj ankoraŭ vagis libere tra la sudaj reĝlandoj, estis malfacile koncentriĝi pri planoj por la estonteco.

Nia tuja zorgo estis la rikolto. La lasta duonmonato estis ĉiam nerviga tempo, kiam ni atendis la maturiĝon de la greno kaj rigardadis la ĉielon, timante ŝtormojn. Sufiĉus peza pluvo en tiu periodo por detrui grandan parton de la grenoprovizo por la venonta jaro en unu sola mateno. Bonŝance la vetero restis bona, krom fojaj pluvetoj, kaj dum multaj tagoj komplete okupis nin la tasko rikolti la milojn kaj milegojn da maturaj spikoj. Ĉiu en la domaro partoprenis, eĉ mia frateto Makaros, kiu estis nun proksimume kvarjara. Miaj patrino kaj onklino laboris ĉiu kun bebo pendanta en ŝalo de la ŝultro, aŭ kelkfoje ili sternis tukon sur la grundo kaj lasis tie la du infanojn por ruliĝeti nudaj sub la varmeta suno.

Enportinte la tritikon ni povis iom senstreĉiĝi, kvankam la pajlo ankoraŭ staris en la kampoj. Tion ni intencis prizorgi poste. Intertempe, ni ekokupiĝis pri la hordeo. Kaj ĝuste en tiu periodo, ne longe antaŭ la somerfino, ni vidis mesaĝiston pene supreniri la krutan deklivon al la vilaĝo.

Poste en tiu sama tago, nevo de Isarninos venis al nia domaro. Tuj kiam ni vidis lin transsalti la riveron per la ŝtonegoj, ni sciis, ke temas pri urĝa novaĵo. Nur tial

Isarninos sendus lin. La lasta fojo, kiam li sendis al ni apartan sciigon, estis post la atako de tiuj brutorabistoj, kiuj venis riversupren de Lugos-kresto antaŭ tri vintroj.

Mia patro malsupreniris la deklivon por renkonti la junulon. Ni ĉiuj staris ekster la heĝo kaj maltrankvile rigardis ilin interparoli. Ni vidis la palan vizaĝon de la junulo, dum li respondis la demandojn de mia patro. La interparolo ŝajnis tre longa, sed finfine li turnis sin por reiri, dum mia patro venis supren al la domaro.

“Tiu mesaĝisto estis el Lugos-kresto,” li informis nin. “Romanoj eniris nian teritorion.”

Do, jen ĝi okazis. Jen la novaĵoj, kiujn ni atendadis de tiom da monatoj, samtempe insistante, ke ĉi tio ne koncernas nin. Strange, mi ne sentis timon, nur grandan internan kvieton, kvazaŭ mi estus senigita je ĉia emocio. Efektive, ŝajnis al mi pli rimarkinde, ke la mesaĝiston sendis al ni la Lugosanoj, kiuj neniam redonis la homojn, kiujn ili kaptis dum la rabekspedicio. Sed dum mi pripensis ĉion ĉi, mia patro klarigis la situacion. Granda kompanio da romaj soldatoj alvenis senaverte en la teritorion de nia popolo, kaj jam ruinigis plurajn urbojn kaj vilaĝojn proksime al la marbordo. Ili venis de la maro, kaj marŝis sufiĉan distancon al la interno antaŭ ol la loĝantoj eĉ konstatis kio okazas. Plurajn vilaĝojn ili trafis per surpriza atako, kaj tiuj falis post sovaĝa sed mallongedaŭra provo defendi sin.

La romanoj intertempe konstruis por si fortikaĵon en la sudo, kaj pasigis sian tempon serĉante provizojn kaj rabante la lokajn kamparanojn. Oni atendis, ke ili baldaŭ provos translokiĝi riversupren. Tio signifis, ke ili verŝajne alvenos post nelonge ĉe la malgranda grupo de vilaĝoj arigitaj ĉirkaŭ Lugos-kresto. Kaj post Lugos-kresto sekvos niaj kvar vilaĝoj. La popolo de Lugos jam haste preparis sin kontraŭ atako, kaj sendis al ni sian mesaĝiston kun pacpropono kaj promeso kompensi la lastan rabatakon. La detalojn necesos pritrakti poste, ĉar la situacio estis tro urĝa por perdi tempon. La Lugosanoj petis nin sendi kiel eble plej multe da homoj por helpi ilin defendi sian vilaĝon.

La viroj dediĉis la ceteran parton de la tago al la necesaj preparoj, kaj la postan matenon ili ekiris. Ni virinoj akompanis ilin trans la riveron, kie grandega kompanio amasiĝis sur la malpli altaj deklivoj sub la vilaĝo. Pro la aliĝo de la viroj el la aliaj tri komunumoj, troviĝis tie pluraj centoj da homoj. Neniam antaŭe mi vidis tiel grandan batalantaron kuniĝintan en unu sola loko, kaj imponegis min la vido de tiuj centoj da armitaj viroj, ĉiuj portantaj siajn plej brilkolorajn vestojn. Multaj el ili havis tinkturitan hararon, hirtigitan kiel la pikiloj sur erinaco. Estis malfacile imagi, ke la romanoj ne estos same imponataj, kiam ili vidos alproksimiĝi tiel grandiozan kaj multekoloran kompanion.

Dum ioma tempo ĉiuj ĉirkaŭvagis en konfuzo, kaj neniu ŝajnis tute certa, kio devas okazi. La afero iom similis Beltenon pro la homoj kiuj serĉis siajn parencojn kaj geamikojn inter la amaso, kvankam en ĉi tiu okazo, evidente, ĉeestis malmultaj virinoj el la aliaj tri vilaĝoj. Finfine la kompanio iel sukcesis organiziĝi kiel longa, malregula kolumno kaj pretigis sin por ekmarŝi malsupren laŭ la rivero. Estis gvidontaj ĝin

surĉevale Dumnovalos kaj du aliaj druidoĵoj. Post ili venis Katumandos kaj la tribestroj de la aliaj vilaĝoj sekvataj de siaj militistoj. Troviĝis ankaŭ Kunignos en sia batalĉaro, kaj ni sentis fieron, kiam ni vidis Atepilon, kiu staris apud li kiel unu el la plej antaŭaj anoj de la kolumno. Unu viro portis altan trumpeton kun longa kolo, kiu serpentis supren kaj finiĝis per bronza kapo en la formo de gapanta apro. Sed tio, kio vere entuziasmigis min, estis vidi du virinojn, kiuj prenis sian lokon inter la militistoj. Ili estis fratinoj: ambaŭ estis filinoj de la tribestro en unu el la aliaj vilaĝoj. Mi ofte aŭdis, ke ili scias batali kiel viroj, sed neniam antaŭe mi havis okazon vidi ilin en ilia armilaro. Ili portis glavojn kaj ŝildojn, kaj iliaj longaj haroj pendis malplektitaj, precize kiel tiuj de la reĝino en mia preferata rakonto. Malantaŭ la militistoj sekvis la restantaj viroj, aŭ surĉevale se ili posedis ĉevalon, aŭ piede. La virinoj kaj infanoj el nia vilaĝo marŝis apude. Antaŭ ĉiuj, kiel kutime, venis Dumna, kiu gestadis kaj babiletis al si mem.

La viroj el niaj du domaroj trovis sian lokon en la ĉefa parto de la kolumno. Estis miaj patro kaj onklo, Kaljakos, Alaŭnos kun siaj fratoj kaj filoj, kaj kompreneble, Belinos. Ni akompanis ilin ĝis la kurbo de la rivero, kie la plejmulto de la virinoj returnis sin. Niaj viroj brakumis nin, kaj tiam fiermiene plumarŝis; ili aspektis kvazaŭ ili jam pensas nur pri la venonta batalo. Ni staris por rigardi ilin ankoraŭ unu momenton antaŭ ol malrapide reiri kun la aliaj virinoj.

De la pli alta grundo de nia domaro, oni povis vidi la vojeton kiu trairis la valon apud la rivero. Alveninte hejmen, ni iris ĉirkaŭ la ekstera flanko de la heĝo por rigardi lastan fojon la kompanion, ankoraŭ gvidatan de unuopa malgranda figuro.

“Tiu Dumna,” mia patrino komentis. “Ĉu ŝi iros kun ili la tutan vojon ĝis Lugos-kresto?”

“Mi neniam aŭdis, ke ŝi kaŭzas malbonon,” mia onklino respondis. Tiam ni reiris al nia laboro.

En tiu sama nokto vekis nin la hundoj, kiuj bojegis en la korto. “Aŭskultu ilin,” mia patrino diris. “Venis iu, kiun ili konas.” Mi vidis ŝian malhelan figuron leviĝi kaj transiri la ĉambron al la ardantaj restaĵoj de la fajro. Dum ŝi ankoraŭ klopodis spire revigliĝi la flamojn, iu tiris flanken la felon, kiu kovris la pordon.

“Estas mi,” diris la voĉo de mia patro.

“Ĉu vi revenas tiel malfrue?” mia patrino kriis. “Certe temis pri grandega batalo hodiaŭ.” Ankaŭ Vinda nun vekigis, sed Makaros kaj la bebo ankoraŭ dormis trankvile.

Mia patro brakumis nin. “La batalo jam finiĝis eĉ antaŭ ol ni atingis Lugos-kreston,” li diris. “Donu al mi kelkajn buŝoplenojn por manĝi.”

Mi palpe serĉis per la malforta lumo, kaj sukcesis trovi iom da pano kaj fromaĝo. Nur finmanĝinte, mia patro rakontis, kio okazis.

“Ni marŝis laŭ la rivero kun tiu frenezulino, Dumna, kiu saltis kaj saltetis la tutan vojon antaŭ ni, kiel muŝo ĉe fadeno. Ĉiu homo povas vidi la nigran malbonŝancon, kiu

rikanas ĉirkaŭ ŝia kapo, kaj estis ŝi, kiu misigis nin. Se mi nur scius, kial Dumnovalos eltenas ŝiajn stultaĵojn, anstataŭ platigi ŝin kiel ranon sub radego. Nu, ni marŝis ĝis post la tagmezo, kaj ni preskaŭ atingis Lugos-kreston, kiam revenis tiu mesaĝisto galope.”

“Kiu mesaĝisto?” mia patrino demandis. “Ĉu tiu ulo, kiu venis hieraŭ?”

“Mi ne aŭdis, ke troviĝas aliaj mesaĝistoj en ĉi tiu regiono. Pli frue en la tago li galopis antaŭen, sed nun li revenis kun vizaĝo pli griza ol la dorso de maljuna ŝafino. Kiam li vidis nin, li svingis siajn brakojn kiel frenezulo kaj kriis, ‘Estas tro malfrue! Reiru! La romanoj jam detruis la vilaĝon!’

“Do, la druidoj kaj tribestroj ekmurmuris inter si, kaj ili decidis sendi iun por kontroli, ĉu estas vero en la afero. Kvankam estis evidente al ĉiuj ke la ulo ne mensogis, precipe se oni vidis lian vizaĝon. Kaj cetere, ne havus sencon, porti nin la tutan vojon por nenio. Do jen ni devis kaŝi nin en la arbaretoj kaj fosaĵoj preskaŭ ĝis la suno subiris. Finfine revenis Kunignos - lin oni sendis - sed li ne havis multon por aldoni. La remparo ĉirkaŭ tiu vilaĝo superrigardas la tutan valon, kaj apenaŭ hundo povus ĉasi leporon laŭ la monteto, sen ke oni vidu ĝin de supre. Do li havis problemon por alproksimiĝi, kaj li devis rampi inter la arbustoj kaj la rokoj - tion li diris - atendente ĉiumomente aŭdi alarmkrion en la vilaĝo. Sed unu aferon li vidis klare kaj certe: li diris ke parto de la remparo estis faligita ĉe la suda flanko.”

“Sed kiel eblas?” mia patrino demandis. “Remparo estas grandega, masiva aĵo. Oni ne povas simple faligi ĝin tiel, kvazaŭ pajlan tegmenton kiun forblovus la vento.”

“Povas esti, sed li diris, ke ĝi estis tute malkonstruita, kun grandegaj ŝtonoj rulitaj laŭ la monteto. Certe necesis duoncento da homoj por fari tion. Tiam li vidis aron da fremdaj homoj, kiuj marŝis supren ĝis la pordego, trankvilaj kvazaŭ ĉe la propra hejmo. Li diris, ke iliaj armiloj similis nenion, kion li iam ajn vidis. Kaj li trovis bruligitan domaron.”

“Bruligitan domaron?” mia patrino interrompis. “Mankis tie la homoj, laŭ mia imago.”

“Certe mankis la homoj, kaj la cindroj estis ankoraŭ varmaj, kun la vento kiu disblovis ilin ĉirkaŭ la korto. Ankaŭ la brutaro mankis. Do li revenis al ni. Kaj tiam... nu, estas malfacile scii, kion fari en tia situacio: kun la romanoj ĉe la pinto, dum ni devis ŝteliĝi inter la montetoj sub la luno. Do ni reiris. Ni trovis unu-du aliajn homojn laŭ la vojo, kiuj vagis tra la kampoj kiel perditaj ŝafoj. Ili diris, ke ili estis ekster la remparo, kiam la romanoj atakis. La mesaĝisto estas unu. Li gastas nun en la vilaĝo.”

“Kio okazos nun?” mia patrino demandis. “Baldaŭ ni vidos ĉi tie la romanojn, supozeble.”

“Ĉiuj diras, ke ili alvenos post nelonge,” mia patro respondis. “Morgaŭ ni transloĝiĝos al la vilaĝo.”

Tuj je la sunleviĝo ni komencis malplenigi la domaron. Ĉiujn niajn posedaĵojn ni devis porti al la vilaĝo, kie ni estis gastontaj ĉe Isarninos. Ni sciis, ke tre verŝajne oni bruligos la domaron, precize kiel okazis en la tempo de mia praavino. Sed ni povis almenaŭ savi niajn havaĵojn. Ankaŭ la tutan brutaron ni devis forkonduki. Ni povos paŝti la bovinojn kaj la ŝafojn en la spaco inter la du remparoj, kaj kiam la romanoj aperos, estos eble movi ilin internen en la vilaĝon, almenaŭ por mallonga tempo.

Ni jam rikoltis la plej grandan parton de la hordeo, sed nenio estis farebla pri la faboj. Mankis tempo por rikolti ilin, krom la malgranda kvanto necesa por certigi la venontjaran semadon. Sed ni ne volis lasi ilin en la kampoj por la romanoj; la sola solvo estis bruligi ilin. Ni iom hezitis pri la linplantoj, kiuj ne multe utilos al invadanta armeo. Sed, kiel komentis mia patrino, se ni mem ne bruligos ilin, sendube tion faros por ni la romanoj. Do ni malvarmsange flamigis tiujn ame prizorgitajn kampojn kaj rigardis dum la venontjara provizo de faboj kaj linsemoj ŝrumpis inter fajro kaj fumo. Ne tiom ĝenis nin la penso pri la venonta vintro - en tiu milda aŭtuna mateno estis malfacile kredi je la ekzisto de frosto kaj malsato - kiom la memoro pri tiuj tagoj kaj monatoj da ŝvita laboro, ĉiuj perditaj en unu momento.

Nia ĉefa zorgo estis la greno. Kiel kutime, ni jam subterigis ĝin en sigelitaj putoj interne de la domaro. Ferminte la putojn, ni ne devis remalfermi ilin ĝis venos la momento por uzi la enhavon. Sed se ni lasus ilin, tio tre verŝajne signifus cedi ilin al la roma armeo. Mia patrino opiniis, ke ni prefere malfermu la putojn kaj portu la grenon per ĉarego al la vilaĝo. "Ni ne okupiĝas de tiom da monatoj pri la sarkado kaj la rikoltado, nur por lasi la grenon ĉi tie, kie tiuj romaj rabistoj povos akapari ĝin," ŝi diris. "Ni ŝarĝu la ĉaron kaj portu ĝin al la vilaĝo."

Mia patro ne konsentis. "Tie troviĝas greno por unu jaro kaj plie, kaj mi nepre ne vidos ĝin putri ekster la tero pro la vintra malseko. Kaj kio pri la semado? Ĝi detruigis antaŭ ol venos la ĝusta sezono."

Fine, ili decidis malfermi nur unu puton kaj kaŝi la aliajn, kovrante ilin per tero. Ili kondukis la bovinojn super la loko por refirmigi la grundon. Mi vidis la lokon poste, kaj oni neniam imagus, ke sube troviĝas putoj. Fakte, mi eĉ demandis min, ĉu ni mem retrovos ilin post la foriro de la romanoj. Mia patro solene atentigis min kaj Kaljakon pri la indikoj per kiuj ni retrovos la kaŝitajn putojn - por la okazo se trafos lin ia malbonŝanco, laŭ lia klarigo. Ankoraŭ nun mi foje pensas pri tiuj putoj, en ilia sekreta malluma ejo sub la tero, atendantaj ĝis ni revenos por repreni la grenon. Mi estas certa, ke la romanoj ne trovis ilin. Mi scivolas, kio okazis al la greno; verŝajne ĝi simple putris en la grundo.

Ni trovis la vilaĝon en plena ĥaoso, kiam ni alvenis. Homoj kaj bestoj vagis ĉie, tretante kaj retretante la malsekan teron ĝis ĝi iĝis koto, kaj la vojetoj inter la kabanoj estis blokitaj de ĉaregoj kaj puŝĉaretoj. Ne nur mia familio, sed ĉiuj kiuj loĝis en la ĉirkaŭaj domaroj venis por serĉi sekurecon interne de la remparo. Bonŝance la brutojn oni povis ankoraŭ paŝti ekstere, almenaŭ provizore. Sufiĉos la tempo por reporti ilin internen, kiam ekaperos la unuaj romanoj. [\(Vidu la noton.\)](#) Kelkaj el la kamparanoj jam okupiĝis pri hasta muntado de palisaroj sur la deklivoj ekster la remparo, por ke la bestoj ne intertempe forvagu.

La loĝantojn de la tri najbaraj vilaĝoj ni atendis pli malfrue en tiu sama tago. Estis interkonsentite, ke ni kunigos niajn fortojn. Ili estos pli protektataj en nia vilaĝo, kiu estis la plej granda el la kvar, en bona pozicio kun fortaj, altaj remparoj. Kaj estis evidente konsilinde ke ni frontu la romanojn kune, prefere ol dise en etaj grupoj.

Mankis spaco eĉ por spiri en la kabano de Isarninos. Krom li, lia edzino Lavenja, kaj ilia plej juna filino (la aliaj kvar gefiloj estis jam plenkreskaj), troviĝis miaj gepatroj, mi mem, Vinda, mia frateto Makaros, kaj la bebo. La familio de mia onklo gastis ĉe mia frato Atepilos, kiu estis nun edziĝinta kaj havis propran kabanon.

Ŝajnis absolute maleble ŝtopi pli da homoj en la kabanon de Isarninos, sed dum la posttagmezo ekaperis la unuaj loĝantoj de la aliaj vilaĝoj, kiuj vagis dise supren laŭ la flankoj de la monteto kun siaj ĉaregoj kaj brutoj. Lavenja konis unu el la familioj, ĉar temis pri parencoj de ŝia patrino, kaj ŝi invitis ankaŭ ilin gasti ĉe ŝi. Ne estis alia solvo: alie ili devus dormi ekstere. Ĉiu kabano en la vilaĝo jam servis kiel rifuĝejo por tri aŭ kvar familioj, kaj eĉ ĉiuj staloj kaj aliaj malgrandaj ejoj estis plenŝtopitaj. Kaj tamen kelkaj homoj devis dormi sub renversitaj ĉaregoj aŭ en la mallarĝa spaco sub la altaj plankoj de la grenejoj.

Eĉ kiam oni preparas sin kontraŭ atako, ankoraŭ necesas melki la bovinojn kaj pretigi manĝaĵojn. Tiuvespere mi devis iri malsupren al la paŝtejo ekster la remparoj por melki la bovinojn sub la ĉielo. Ĉiuj niaj posedaĵoj kuŝis en granda konfuzo ĉe la muro de la kabano, kaj mi ne povis trovi la sitelon. Mia patrino kaj Lavenja kuris tien kaj reen, pretigante vespermanĝon por la tri familioj. Ili jam buĉis junan kapron kaj nun turnis ĝin per rostostango super la fajro.

“Malaperis la sitelo,” mi diris al mia patrino.

“Ĉu vi blindiĝis en ambaŭ okuloj, knabino, ke vi devu demandi min? Ĝi estas tie inter tiuj aliaj aĵoj, do kliniĝu kaj serĉu ĝin, antaŭ ol la luno leviĝos kaj vi devos fini la melkadon en la mallumo.” Lavenja ridetis al mi kaj proponis unu el siaj siteloj. Ĝi estis pli granda ol tiu kiun mi kutime uzis, kaj maloportune portebla.

Irinte eksteren, mi trovis ke la tago malvarmiĝas antaŭ la vespero kaj ekblovas malmilda vento. Ŝajnis kvazaŭ baldaŭ ekpluvos. Mi tremetis pro la malvarmo kaj haste reeniris por serĉi ŝalon.

Antaŭ ol mi finmelkis la bovinojn kaj pene retrenis la pezan sitelon al la kabano, venis krepusko. Interne de la kabano jam regis mallumo, krom la ruĝa ardo de la fajro, kaj ĉie vidiĝis vizaĝoj. Estis preskaŭ kvazaŭ mi ĵus alvenis al festo. La tri viroj - Isarninos, mia patro, kaj tiu el la alia vilaĝo - sidis sur makula bovofoleto apud la fajro. Ekscititaj infanoj ludis kaj ridis ekster la cirklo de la fajrolumo.

Troviĝis alia junulino, proksimume samaĝa kiel mi; ŝi estis iom maldika kun pala haŭto kaj zorge plektitaj blondaj haroj. Ŝi havis iom malĉeestan esprimon, kvazaŭ ŝiaj pensoj vagus malproksime, sed ŝi ridetis kiam ŝi vidis min, kaj mi transiris por sidiĝi apud ŝi. Ŝi diris, ke ŝia nomo estas Kintila. Ŝi estis edziniĝonta en pli-malpli ĉi tiu periodo, sed nun ĉiuj atendis por vidi kion portos la estonteco, antaŭ ol transdoni la edzinopagon. Mi rakontis pri Belinos. “Ni geedziĝos venontan jaron,” mi diris. “Kiam la romanoj estos for.”

“La romanoj flamigos nian vilaĝon,” ŝi diris. “Ili promenos tra la pordego sen eĉ unu homo por malhelpi tion, kaj ili trovos la tutan ejon pli silenta ol malgranda roko sur la monto, kaj la vulpojn kaj la leporojn kiuj kuretas kaj saltetas inter la domoj.”

“Ankaŭ nian domaron,” mi respondis. “Se morgaŭ vi iros supren al la remparo, vi belege vidos ĝin trans la rivero. Ĝi troviĝas sur la monteto, kiu frontas la vilaĝon.”

Kiam ĉiuj finmanĝis, Lavenja alportis la bieron kaj la viroj komencis drinki.

“Ni staras antaŭ glora batalo,” Isarninos kriis, “ĉar niaj militistoj estas la plej kuraĝaj kaj la plej aŭdacaj en ĉiuj sudaj reĝlandoj kaj ankaŭ en la okcidentaj, kaj Karatakos ne havas viron en sia tuta armeo, kiu egalus iun ajn el la niaj.”

La patro de Kintila aŭdigis ankaŭ sian voĉon. “Ne estas viro inter nia popolo, kiu ne kapablas mortigi tri plenkreskajn romanojn per unu bona, tranĉa svingo. Tiuj romanoj havas nur mallongajn glavojn, tion mi aŭdis, kaj ili apenaŭ pli utilas en batalo ol tranĉileto, kiun oni uzus por dispecigi mortan ŝafon.”

“Vi pravas,” mia patro diris, “kaj baldaŭ ni vidos niajn militistojn reveni de la batalo kun siaj vizaĝoj tute ruĝaj kaj ŝvelaj pro sia milita furiozo kaj kun dudeko da romaj kapoj en ĉiu mano.”

“Ĉu vi celas insulton al niaj militistoj,” diris la patro de Kintila, “ke vi volas sendi ilin por batali kontraŭ tiuj kokinkoraj kaŭremuloj? Ni elsendu niajn junulinojn por pritrakti ilin, kaj ankaŭ niajn infanojn, ĉar mi bedaŭrus vidi niajn militistojn malpurigi siajn armilojn ĉe tiaj kanajloj.”

Ili verŝis al si pli da biero. “Nun Atepilos havos la ŝancon elmontri siajn kapablojn,” mia patro diris, “kaj ĉiuj homoj vidos kiel lerte li stiras la batalĉaron, eĉ kiam li devas turni ĝin subite aŭ iri rekte malantaŭen. Neniu homo diros, Isarninos, ke vi ne instruis al li ĉiujn viajn lertojn, kaj kiam mi vidas lin stari apud Kunignos kun longa vergo en la mano, li pensigas min pri la grandaj ĉampionoj de la antikva epoko.”

Isarninos diris, “La druidoj de Karatakos konsilis lin mise, ne sendante lin al ni por peti helpon, kaj nun lia frato estas morta kaj li almozas kiel batita hundo ĉe la okcidentaj reĝlandoj. Se li estus petinta la subtenon de nia popolo, li sidus en ĉi tiu momento en sia propra halo por festeni ĝis satiĝo kaj trinki sian bieron el romaj kranioj.”

Mi sentis dormemon. Tiom estis okazinta post la mateno, kiam mi vekigis en mia propra kabano. Se nur troviĝus pli trankvila loko por kuŝi! Mi malproksimiĝis de la fajro por serĉi iom da libera pajlo. Dormantaj infanoj kuŝis ĉie. Makaros dormis surdorse, kun la brakoj disĵetitaj super la kapo. Li sufiĉe kreskis lastatempe kaj jam preskaŭ perdis tiun diketan, rondetan aspekton de beba infano. Baldaŭ li ne plu memorigos min pri Tasgjos. Mi enpremis min en la mallarĝan spacon apud li, kaj endormiĝis ĉirkaŭbrakante lin.

Mi estis profunde dormanta, kiam vekis min mia patrino. Mi saltis pro ŝoko. “Leviĝu,” ŝi diris. “Ni iras al la arbaro.”

Mi rigardis ŝin el dormoplenaj okuloj, kaj provis kompreni kio okazas. Ĉie en mia ĉirkaŭaĵo, videblaj nur per la ruĝa ardo de la fajro, homoj hastis tien kaj reen en la duonmallumo, kvazaŭ ili pretiĝus por eliri. “Ĉu estas mateno?” mi demandis.

“Tute ne,” ŝi diris. “Leviĝu, knabino; ni iras al la Malbona Loko. La viroj jam ekiris.”

Mi estis absolute konsternita, sed mia patrino diris senpacience, “Ne gapu tiel, kvazaŭ vi volus engluti la lunon, kaj ankaŭ la sunon. Moviĝu iomete kaj helpu min, se vi ne volas resti ĉi tie tute sola kun la strigoj kaj la spiritoj. Serĉu la mantelon de Makaros, dum mi okupiĝos pri la bebo.”

En stato de konfuzo mi iris al la loko, kie niaj posedaĵoj ankoraŭ kuŝis en senorda amaso, kaj komencis disŝovi ilin. Miaj pensoj flugis inter unu ideo kaj alia, tiel ke mi apenaŭ sciis, kion mi serĉas. La Malbona Loko! Plenigis min antaŭtimo miksitita kun tikla sento de anticipo. Pasis jam tiom da jaroj post mia antaŭa vizito. Mi estis tute malgranda en tiuj aliaj okazoj, kaj tio kion mi vidis tie teruris kaj naŭzis min, sed samtempe iel logis min kvazaŭ per nerezistebla fascino. Mi timis, kaj tamen deziregis, revidi tiun lokon.

“Pro la amo de ĉiuj spiritoj!” mia patrino kriis, “ĉu vi ankoraŭ staras kaj revas? Mi demandas vin, kie estas la mantelo de Makaros?”

Senhelpe mi rigardis la konfuzan amason ĉe miaj piedoj, kaj penis memori, kion mi serĉas. Kun malentuziasmo mi turnis la diversajn objektojn, kaj finfine rimarkis malhelan formon, kiu povus esti mantelo. Ĝi estis kaptita sub la peza muelŝtono, kaj kiam mi provis eltiri ĝin, ĝi ŝiriĝis. Mi ĵetis ŝtelan rigardon al mia patrino, sed bonŝance ŝi rimarkis nenion.

Makaros estis staranta, sed liaj okuloj estis nebulaj pro dormo. Li aspektis kvazaŭ li en iu ajn momento povus refali sur la pajlon. Mi ĵetis la ŝiritan mantelon sur liajn ŝultrojn, kaj tiris lin eksteren al la freŝa aero. “Estas malvarme,” li diris ekploretante. “Mi volas

reeniri.”

Certe estis tre malbela nokto. La vento estis nun pli forta kaj blovis per abruptaj batoj, portante polvon kaj foje mallongan ekpluveton. La luno estis nur duonplena, kaj ĝia pala lumo aperis jen kaj jen inter la nuboj kiuj kuregis tra la ĉielo. Ĉie en nia ĉirkaŭaĵo la homoj fluis malsupren el siaj kabanoj ĝis la pordegoj. Kelkaj tenis flamantajn torĉojn. Mi volis serĉi Elvisan, sed mi sciis, ke malverŝajne mi trovos ŝin inter la homamaso. Sed anstataŭe aperis Kintila, kiu ĵus elvenis el la kabano kaj firme streĉis sian ŝalon kontraŭ la malvarma nokta aero. Vidante min kaj Makaron, ŝi transiris al ni, do mi prenis la manon de Makaros kaj ni aliĝis al la homamaso, kiu moviĝis malrapide en la direkto de la pordegoj.

“Venu, rapide,” mi diris al Makaros. “Tiel vi ne sentos la venton tiel malvarma.”

Senpacience ni puŝis nin tra la homamaso kaj el la pordegoj, ĝis ni trovis la krutan vojeton, kiu kondukis malsupren al la rivero. Sur la senarba monteto ni havis neniun protekton kontraŭ la subitaj alblovoj de vento kaj pluvo. Ni duonglitis malsupren mizere kaj silente kun mallevitaj kapoj. Baldaŭ miaj fingroj estis sensentaj, kaj mia nazo gutis pro la malvarmo. Unu fojon mi falis kaj eksidis peze sur la malmola kalko, makulante la randon de mia ŝalo per koto.

La vojo iĝis pli facila kiam ni atingis la ebenaĵon. Nun la vento blovis de malantaŭe kaj helpis nin plu iri.

“Kien ni iras?” Makaros demandis anhelante, dum li kuretis ĉe mia flanko.

“Al la arbaro.”

“Mi ne volas iri al la arbaro. Ĝi estas malluma. Vinda diras, ke tie estas spiritoj. Ĝi estas plena je spiritoj, kiuj ĝemas kaj kriĉas inter la arboj, kaj se oni perdiĝas, ili... ili...”

“Ili kias?”

“Ŝi ne diris. Ŝi diris, ke frostigus la sangon nur aŭdi pri tio.”

Antaŭ kaj malantaŭ ni, grupoj de homoj marŝis. Estis maleble rekoni iliajn vizaĝojn per la intermita lunlumo, sed mi sciis, ke eĉ se mi vidus ilin, mi verŝajne ne rekonus la plejmulton. Neniam antaŭe mi troviĝis inter tiom da nekonatoj.

Pro la malkomforto de mia malseka, kotoŝmirita ŝalo, mi preskaŭ ĉesis pensi pri la Malbona Loko, sed kiam ni alproksimiĝis al la arbaro, revenis miaj antaŭtimoj refortigite. Efektive mi ja ofte demandis min, kiel estus reiri tien, sed nun kiam alvenis la momento, mi deziregis, ke tio ne necesu.

Enirinte la arbaron, ni havis iom da ŝirmo kontraŭ vento kaj pluvo, sed la arboj skuiĝis kaj knaris, kaj la tero estis molaĉa kaj glita pro falintaj folioj. La maldensejoj similis grizajn lagojn kie timigaj formoj fantomis, dum en tiuj partoj kie la vojeto zigzagis sub

la arboj, la luno apenaŭ penetris la folian tegaĵon. Ni estus baldaŭ komplete perdiĝintaj, se ne troviĝus de tempo al tempo torĉoj laŭ la flanko de la vojeto, tro malproksimaj inter si por vere lumigi la vojon, nur sufiĉe oftaj por ke ni videtu la venontan solecan lumon kiu flagris je ioma distanco antaŭ ni. Ĉe la flankoj, la arboj formis solidan nigran muron, preter kiu videblis nenio.

Kvankam pasis jam multaj jaroj de post mia lasta vizito al la Malbona Loko, mi sciis precize kien iri. Troviĝis je la dekstro difinita vojeto, kiun Elvisa kaj mi ĉiam haste preteriris kiam ni venis al la arbaro por rikolti plantojn aŭ nuksojn. Nun mi eniris ĝin kun Kintila kaj Makaros, sekvante la grupon de homoj kiuj marŝis antaŭ ni. Pro malofta uzado, la vojeto estis preskaŭ tute superkreskita, kaj estis tre malagrabla sekvi ĝin en la mallumo. Ni devis puŝiĝi preter rubusarbustoj, kies dornetoj kaptis niajn vestojn, dum gutantaj branĉoj superŝutis nin per pluveroj.

Makaros komencis ploreti. “Ni reiru. La akvo eniras sub mian kolumon. Mi volas reiri kaj atendi panjon.”

“Venu!” mi flustris sovaĝe. “Se ni restos tro malantaŭe, ni ne plu vidos la aliajn. Ĉu vi volas perdiĝi ĉi tie en la arbaro, kun la spiritoj kiuj vokas vian nomon kaj tiras viajn vestojn?”

Ni baraktis antaŭen preter dornoj kaj urtikoj, sed Makaros apenaŭ plu sukcesis movi siajn piedojn, kaj ni komencis postresti. Mi konsciis pri kreskanta sento de maltrankvilo. “Eble li ne tute malpravas,” mi diris al Kintila. “Estas malbela afero, marŝi ĉi tiel tute solaj en la mallumo, kiam ni povus havi kunulojn. Ni reiru nun iomete, por vidi ĉu ne venos aliaj, kiuj marŝos apud ni.”

“Ne, ni scias, ke la vojo estas ĝusta, ĉar ni vidis tiujn aliajn antaŭ ni. Rapidu nun, kaj ni provos atingi ilin.”

Ni foje aŭdis de Morimanos rakontojn pri tro aŭdacaj homoj, kiuj havis pli da scivolo ol da prudento. Ili venis por malkovri, kio estas videbla en la arbaro en difinitaj tagoj, kiam pli saĝaj homoj restas hejme. Sed ne estas tiel facile trovi la malpermesatan lokon, por tiuj kiujn gvidas nur la scivolo. Vojoj kiuj komenciĝis tute klare kaj invite subite forvaperiĝis, lasante la aŭdaculon profunde perdita inter la arboj. Tiaj homoj povis vagi dum tagoj, ĉiam revenante al la sama punkto, ĝis ili falis mortaj pro manko de manĝoj kaj de forto. Foje ili neintence stumblis tra unu el la enirejoj al la Alia Mondo. Estis rakonto pri viro kiu malaperis, rajdinte en la arbaron por ĉasi gigantan apron. Kiam li reaperis post multaj jaroj, li ŝajnis ne pli aĝa ol kiam li eniris, sed liaj okuloj estis fiksitaj je ia malĉeesta vidaĵo kaj li komplete perdis sian parolkapablon.

Mi rigardis malantaŭen kaj konstatis kun kontento, ke aliaj homoj nun sekvas post ni, dum antaŭ ni staras brulanta torĉo ĉe la flanko de la vojo. Iom pli antaŭe, la vojeto daŭris inter du fostoj, ambaŭ same altaj kiel homo. Kuraĝigis nin tiuj indikoj, ke ni iras ĝuste, kaj ni rapidigis niajn paŝojn. Alproksimiĝante al la fostoj, mi ekhavis obtuzan senton pri io ne tute en ordo. Mia menso ankoraŭ ne plene ensorbis tiun penson, kiam

mi konstatis kun ŝoko ke la fostojn kronas du homaj kranioj. Makaros ne volis pluiri, sed mi kaj Kintila tiris lin haste antaŭen inter la fostojn. Tuj poste, la vojeto plilarĝiĝis por fariĝi granda spaco ĉirkaŭata de majestaj kverkoj.

Mia unua reago estis de malstreĉo, pro la konstato ke la loko estas plena je homoj. Mi ne povis vidi iliajn vizaĝojn, sed la murmurado de voĉoj en ĉiuj flankoj donis agrablan senton de sekureco. Ensorbinte la situacion, mi ĉirkaŭrigardis scivole. Troviĝis linio de fajroj en la centra spaco. Ilia lumo elstarigis kolosan kverkon, kiu kreskis tute sola en la mezo de la maldensejo. Ĝian grandiozan krustiĝintan trunkon sulkis sennombraj fendoj kaj kavoj, kaj ĝi estis parte morta, sed jen kaj jen kelkaj velkintaj folioj montris, ke almenaŭ iuj branĉoj ankoraŭ vivas. Verŝajne la kverko estis same aĝa kiel la arbaro mem. Ĝi kliniĝis danĝere al unu flanko kaj nur la apogo de pluraj fostoj malhelpis, ke ĝi falegu.

Neniu staris en la centra areo, kies angulojn markis kvar masivaj formoj, same altaj kiel la ĉirkaŭaj arboj. En la mallumo ili similis monstrajn duonformitajn estaĵojn genuiĝantajn sur la grundo. En iuj momentoj mi havis la impreson, ke ili estas turnitaj al la granda kverko, sed tuj poste ili ŝajnis direkti sian minacan rigardon eksteren. Kiam la fajrolumo flagris super iliaj rompitaĵoj ŝeloj, mi vidis, ke temas pri la putrintaj stumpoj de arboj antikvegaj. Sed verŝajne ili iam havis vizaĝojn. La trajtoj estis forkonsumitaj, sed ankoraŭ eblis distingi la kavojn, kie iam troviĝis la okuloj. Neniu el la vilaĝanoj kuraĝis preterpasi ilin, kaj ĉiuj restis je sekura distanco, premite kontraŭ la muro de arboj kiu ĉirkaŭis la maldensejon.

Kintila kaj mi puŝis flanke tra la homamaso kun Makaros, provante vidi kiel eble plej multe. Unu afero elstaris aparte klare en mia menso de tiuj pli fruaj vizitoj antaŭ tiom da jaroj. Miaj okuloj sin turnis avide al la kverko, kaj tie apude sur la grundo mi trovis tion, kion mi serĉis: monteton da rondformaj objektoj, orde aranĝitaj unu sur la alia. Mi signis al Kintila kaj Makaros kaj gvidis ilin al loko de kie eblis bone vidi. Mi sentis Makaron salteti pro ŝoko, kiam li komprenis, kion ni rigardas. Kaj tiam ni tri staris gapante kvazaŭ sorĉite. Ĉar la monteto konsistis tute el homaj kranioj. Ili estis aranĝitaj tiel ke ĉiuj frontu samdirekte, kaj de nia starloko ŝajnis ke rikanas al ni ĉiu unuopa kranio.

Antaŭ la kverko estis granda plata ŝtonego, iom levita super la grundo sur malaltaj apogiloj. Sure troviĝis la plej antikva kaj valora objekto posedata de la loĝantoj de niaj kvar vilaĝoj: grandioza pelvo el arĝento. La fajrolumo brilis super ĝia eksteraĵo kaj flagris sur la desegnoj kaj simboloj, kiuj enkrustis ĝiajn flankojn. Tio estis la Oferokaldrono. Ĝi restis ĉiam en la Malbona Loko, kie gardis ĝin pli sekure la kvar genuiĝantaj figuregoj ol povus tuta batalpreta armeo.

Ni atendis tre longe, dum la malvarma aero iom post iom trapenetris niajn vestojn kaj la felajn volvaĵojn ĉirkaŭ niaj piedoj. Makaros komencis frostotremi kaj mi tiris lin sub mian ŝalon por protekti lin de la malvarmo. Estis preskaŭ tute mallume, sed de tempo al tempo la flamoj eksaltis kaj reliefigis jen unu grupon de vizaĝoj, jen alian. Mi sentis, ke la homamaso konstante densiĝas. Ĉiuflanke aŭdiĝis murmurado kaj susurado de

voĉoj, kiuj ŝajnis krei solidan muron ĉirkaŭ ni. La murmurado iom post iom iĝis pli laŭta kaj ritma; kaj tiam mi konstatis, ke denove mi aŭskultas tiun malrapidan tamburadon, kiun mi aŭdas en ĉiu Belteno, dum la Suno subiras.

Ie en la malproksimo eksonis sola voĉo, kiu eligis plendan krion. Ŝajnis, ke ĝi venas de iu fora loko profunde en la arbaro. Ĝi plilaŭtiĝis; ĝi estis proksimiĝanta al la maldensejo. Kelkaj infanoj komencis plori. Aldoniĝis al ĝi aliaj sonoj: estis teruraj krioj kaj metalecaj tintegoj. La bruo jam atingis preskaŭ netolereblan intensecon, kiam subite procesio aperis en la maldensejo.

Gvidis ĝin la estroj de la kvar vilaĝoj kun siaj militistoj, kiuj kriis bataalkriojn kaj tintigis lancojn kontraŭ siaj ŝildoj. Kelkaj havis enmane torĉojn, per kies lumo oni vidis, ke ili estas vestitaj por milito, kun plena armilaro kaj kun haroj farbitaj kaj tiel rigide krispigitaj ke ili elstaras kiel pikiloj. Kaj jen denove la du militistinoj, kun ondiĝantaj, malligitaj hararoj. Sekvis ilin viro, portante tiun altan serpentecan trumpeton, kiun mi jam vidis kiam la kompanio de Katumandos ekiris malsupren laŭ la rivero por la malsukcesa provo ataki Lugos-kreston. Je tiu okazo la trumpeto silentis, sed nun el la apra kapo ĉe la pinto eliĝis raŭka voko.

Post tiuj venis stranga grupo, kiel malgranda aro da marŝantaj kverkoj. Kiam ĝi alproksimiĝis, mi vidis, ke fakte temas pri homoj, kiuj portas altajn kapvestojn el branĉoj kaj folioj. Je tiu momento mi konstatis, ke mi ankoraŭ ne vidis Dumnovalon kaj liajn lernantojn, nek la malpli gravajn druidojn kiuj foje akompanas lin por apartaj ceremonioj.

Mi estis komplete mirigita, kiam apud la plej alta kaj impona el tiuj kverkuloj, mi rekonis la frenezan Dumnan. Ŝi marŝis kun firma kaj digna paŝo, kvazaŭ almenaŭ ĉi-foje ŝi sciis, ke ŝi trovis sian ĝustan lokon kaj ke ĉi-nokte neniu provos forsendi ŝin. Ankaŭ ŝi portis ion sur la kapo: ĝi aspektis kiel fasko de torditaj branĉetoj - ĉu eble temas pri viska krono ([noto 8](#))? Sed kiel povas esti, ke oni elektis ŝin, duonfrenezan maljunulinaĉon, por rolo tiel grava? Ĉiuj scias, ke ŝi estas tute malfidinda en ĉi tiaj okazoj, kaj ke ne malverŝajne ŝi hontigos nin ĉiujn per ia malkonvena gesto je la kulmina momento de la ceremonio.

Ĉi tiu procesio marŝis unu fojon ĉirkaŭ la maldensejo ekster la centra areo markita de la kvar gigantaj figuroj. Sekvis ĝin amaso da vilaĝanoj, kiuj portis oferaĵojn kiel manmuelilojn, potojn, pioĉojn kaj kortobestojn. Mi kredis distingi la ostecan kapon de mia patro inter la aliaj, kaj eble la pli peza figuro apud li estis Isarninos. Rigandrika marŝis iomete antaŭ la aliaj, gvidante blankan ĉevalinon, kiu ŝajnis preskaŭ brili en la mallumo. Akompanis ŝin la tribestrinoj de la aliaj tri vilaĝoj. Unu portis glavon, dum alia tenis objekton, kiu aspektis kiel tordita kolringo.

La druidoj en siaj foliaj kapvestoj eniris la centran areon kaj klinis sin ĝistere antaŭ la sankta kverko. Tiam ili prenis la manon de Dumna kaj gvidis ŝin ĉirkaŭ ĉiu el la naŭ fajroj antaŭ ol sidigi ŝin sur la grundo apud la Oferokaldrono. Kiam mi vidis, ke ili plenigas la kaldronon per akvo, malagrabra sensaĵo ekpiketis la haŭton de mia brusto.

Sed ŝajnis, ke je la nuna momento okazos nenio, ĉar nun ili kolektis la oferaĵojn de la vilaĝanoj kaj amasigis ilin apud la kraniomonteto. Estis ioma problemo pri la vivaj bestoj, kiuj tute ne intencis kuŝi trankvile sur la tero apud la aliaj oferaĵoj. La druidoj solvis tion, duonsvenigante ilin per kelkaj malceremoniaj batoj alkape.

Precipe la blanka ĉevalino rifuzis pasi inter la minacaj formoj de la kvar gardantoj de la Malbona Loko. Ŝi permesis, ke oni gvidu ŝin ĝis la rando de la centra areo, sed kiam ŝi atingis la limon kies angulojn markis la kvar figuroj, ŝi subite haltis kvazaŭ ĉe nevidebla barilo. Pluraj vilaĝanoj kaptis la ŝnuron ĉirkaŭ ŝia kolo kaj provis tratiri ŝin per forto, sed tio igis ŝin baŭmi kaj hufbati laŭ tre danĝera maniero. Finfine Dumnovalos aliris ŝin, flustris kelkajn vortojn en ŝian orelon, kaj kovris ŝian kapon per sako. Post tio ŝi permesis, ke li gvidu ŝin antaŭen, kaj trankvile pasigis la ceteran parton de la nokto apud la aliaj bestoj.

Dum ĉi tiu tuta sceno daŭris la mallaŭta tamburado, kune kun la lamentado de la alta trumpeto, tintegoj de lancoj kaj ŝildoj, kaj batakrioj de la militistoj. Sed nun tiuj aliaj sonoj eksilentis, tiel ke aŭdiĝis nur la obtuza batado de la tamburoj. Kaj tiam la kverkuloj komencis mallaŭte, ritme parolkantadi per longaj, malrapidaj, misharmoniaj sonoj, kiuj ŝajnis interplektiĝi inter si, disiĝante kaj kuniĝante kiel kuntorditaj harfadenoj. Tiel mallaŭta estis ilia kanto, ke mi devis reteni la spiron por aŭdi ĝin. Kaj sube, la tutan tempon, pludaŭris la basa, regula batado de la tamburoj. Kelkfoje ŝajnis al mi, ke ne la tamburojn mi aŭdas, sed la tamburadon de mia propra koro. Baldaŭ mia tuta memo koncentriĝis ĉirkaŭ tiu stranga parolkantado.

Mi ne povas diri, kiel longe ĝi daŭris, sed iom post iom dum la nokto profundiĝis ĉirkaŭ ni, ĝi plilaŭtiĝis kaj plirapidiĝis, kaj la tamburado plilaŭtigis kaj plirapidiĝis sampaŝe. Ŝajnis kvazaŭ ĝi eniras mian korpon kaj resonoras tra mia karno. Nun ĝi similas la hufojn de grandega galopanta ĉevalo, kaj la batado de ĝiaj hufoj estas la batado de mia koro.

Subite mi sciis, ke mi estas tro laca por ĉi tio. Mi ja dormis tre malmulte, kaj la longa timiga marŝo en la mallumo tute elĉerpis miajn fortojn. Mi deziregis ekkuŝi sur la grundo kaj dormi, sed la herbo estis malseka, kaj ĉiuj aliaj ankoraŭ staris. Do mi restis staranta. Mi estis tratrempita kaj ŝanceliĝis iomete pro lacego. Mi ne povis fermi miajn orelojn kontraŭ la potenca tamburado, do ekzistis nur unu alia ebleco: mi fermis miajn okulojn kaj fordonis min al ĝi komplete.

Ŝajnis kvazaŭ la sono eniris sub mia haŭto. Mi sentis pulson en mia frunto, kiu spasmis samtakte. Tre baldaŭ mia tuta konscio centriĝis ĉirkaŭ tiu pulso en mia frunto, kiu kuntiriĝis pli kaj pli forte je ĉiu bato. La afero iĝis neeltenebla. Subite mi sciis, ke se mi ne tuj reagos, je la venonta bato ĝi rompiĝos. Senhelpe mi cedis la regon de mia vizaĝo, kaj sentis kiel la tuta dekstra flanko komencas spasmi laŭ la takto de la senĉesa tamburado. Baldaŭ la sento disvastiĝis de mia vizaĝo al miaj kapo kaj kolo. Mi sciis, ke mi devos rezigni ankaŭ pri tiuj, do malvolonte mi cedis, kaj permesis ke mia kapo libere moviĝu laŭ la ritmo de la tamburoj.

Mi estis tiom perdita en miaj internaj sensaĵoj, ke mi delonge forgesis pri la ĉirkaŭaj homoj. Sed ie apude ekploris infano, kaj tiu sono revokis min al la estanteco. Per superhoma fortostreĉo mi levis miajn pezajn palpebrojn kaj ĉirkaŭrigardis. La malforta lunlumo nun brilis rekte en la maldensejon, kaj mi vidis la nigrajn formojn de la vilaĝanoj ĉe la alia flanko de la senarbejo. Multaj balanciĝis ritme laŭ la takto de la tamburoj, kaj kelkaj spasmis per la kapo, precize kiel mi. Ĉe la centro de la ejo, la fajroj preskaŭ estingiĝis, kaj ĉirkaŭ ili la kverkuloj paŝegis kaj parolkantadis. Tie staris ankaŭ Dumna, kiu jam komplete cedis al la ritmo, kaj nehaltigeble alproksimiĝis al la unuaj stadioj de senbrida danco.

Tiam miaj palpebroj refalis, kaj mi transdonis min al la seninterrompa sonriverso kiu verŝiĝis el la tamburoj. Ĝi estis solida ondo; mi povis apogi min sure kaj permesi al mi lule balanciĝi sur ĝia pinto.

Subite mi konstatis, ke mi flosas je la alteco de la arboj. Mi ŝvebis apud la foliecaj branĉoj de juna kverko. Super mi estis cirklo de nigra ĉielo kun la vualiĝinta luno. Sube estis la maldensejo kun la ardo de siaj naŭ fajroj, kaj ĉirkaŭ la rando estis amasego da homoj. Mi rigardis la mondon el ĉi tiu nova perspektivo trankvile kaj kun ioma scivolo. Mi eĉ vidis tie malsupre mian propran korpon, kun la longaj harplektaĵoj kiuj disflugis pro la spasmaj movoj de mia kapo.

La ritmo de la tamburoj intertempe ŝanĝiĝis. Ŝajnis al mi, ke mi povos paŝi supren laŭ la batoj, kvazaŭ mi suprenmarŝus la flankon de monteto. Kaj jen la vojeto antaŭ mi, kiu brilis kiel sunradio kondukanta min en la ĉielon. Mi ŝvebis supren sen malfacilo. Ĉe la pinto mi trovis min ĉe la rando de vasta, sunplena ebenaĵo - kvankam, strange, mi ankoraŭ konsciis pri la nigra ĉielo ĉirkaŭ mi. Mi vidis riveretojn, kiuj briletis inter kampoj de flava tritiko, kaj verdajn paŝtejojn, kie gigantaj gregoj da bovinoj kaj ŝafoj pace vagis. Pli proksime estis aliaj bestoj kaj homoj, pli grandaj kaj perfektaj ol mi iam ajn vidis. Estis alta virino kun sendifekta, ŝvelronda haŭto kaj dikaj harplektaĵoj blondaj kiel matura tritiko. Ŝia robo estis krustita de brodaĵoj, kaj la sunlumo rebrilis de la oraj desegnoj sur ŝia mantelo. Estis krome grandega ĉevalino, komplete blanka sen makulo aŭ difekto en iu ajn punkto de sia korpo. Kaj jen ankaŭ la kverko mem, grandioza kaj majesta, kun branĉoj ŝarĝitaj de sennombraj glanoj.

Mi ne kuraĝis alproksimiĝi al tiuj pompaj estaĵoj, kiuj staris ĉe la rando de la ebenaĵo, tiel ke mi ne povis antaŭeniri. Antaŭ ili estis Dumnovalos en la formo de malgranda kverkido, kiu interkonsiliĝis kun la kverkego mem, la generinto kaj protektanto de nia popolo. Kaj apud li estis Dumna, kiu ne plu similis tiun distaŭzitan, sendentan avinaĉon, sed nun aspektis alte kaj fiere kun blondaj haroj kiuj ondegis ĝis ŝia talio. Ŝi estis reĝine vestita en ruĝa robo kun brodita mantelo fermita per broĉego. Ĉirkaŭ la kolo ŝi portis pezan ringon el tordita oro, kies rondaj ekstremaĵoj estis grandaj kiel du pugnoj.

Nun finfine mi komprenis. Kompreneble Dumnovalos havis siajn motivojn. Jen la kialo, ke Dumna tiom pozis kaj trudis sin, kiam ajn ni faris oferadon. Ŝi estis markita; ŝi sciis de ĉiam, ke ŝi naskiĝis por ĉi tiu momento. Kaj ankaŭ Dumnovalos rekonis tion, sed li

retenis ŝin ĝis nun, kiam ni frontis la plej grandan danĝeron iam ajn minacintan niajn kvar vilaĝojn.

Dum mi imponate rigardis la transformitan Dumnan, mi aŭdis, ke la ritmo de la tamburoj denove ŝanĝiĝis. Ĝi iĝis pli mallaŭta kaj rapida; ĝi revokis min. Kaj do malvolonte mi lasis min retiriĝi malantaŭen laŭ la brilanta vojeto, for de la vizio kiun mi ĵus vidis, de sur la arbopintoj sub la maldensiĝanta mallumo. Sube mi vidis mian korpon kiel malplenan poton. Mi permesis min enverŝiĝi en ĝin, kvazaŭ mi plenigus ĝin per klara akvo el fonto. Kaj jen mi, denove konscia pri mia doloranta korpo kaj la streĉita haŭto ĉe mia vizaĝo. Mi ĉirkaŭrigardis en la griza lumo, kaj vidis ke ankaŭ aliaj homoj ĉirkaŭrigardas, ĉiuj kun mira esprimo, kvazaŭ ili ĵus vekiĝis.

La ĉielo estis preskaŭ hela nun kaj nur du steloj estis ankoraŭ videblaj. Baldaŭ la unua sunradio ekbrilos en la maldensejon. La tamburoj ne plu batis. Nun la plej impona el la kverkuloj, pri kiu mi sciis ke li estas Dumnovalos, prenis la manon de Dumna por konduki ŝin antaŭen. Ŝi moviĝis kvazaŭ en dormo. Ŝiaj okuloj estis larĝe malfermitaj, kun fiksa malĉeesta esprimo kvazaŭ ŝi rigardus ian foran vidaĵon. Ŝajnis, ke ŝi lasis sian spiriton ĉe la sojlo de la Alia Mondo, por ke ĝi atendu tie la lastan agon, kiu liberigos ŝin de ŝia korpo. Tio ebligos al ŝi transiri por aliĝi al la aliaj potencaj estaĵoj, kiujn mi videtis dum mia vojaĝo.

Dumnovalos starigis Dumnan kie ŝi frontu la kverkon, kaj elbuŝigis kelkajn vortojn en fremda lingvo. Nun du el la aliaj druidoj alproksimiĝis kun rimeno, kiun ili tordis ĉirkaŭ ŝia kolo. Ili staris ambaŭflanke de ŝi, tenante la ekstremaĵojn de la rimeno, kaj ambaŭ komencis tiri. Ĝis tiu momento Dumna restis tute pasiva, kaj akceptis ĉion kion oni faris al ŝi, sed nun ŝajnis, ke ŝi subite vekiĝis. Ŝi luktis freneze per siaj ungoj ĉe la rimeno kiu premis ŝian gorĝon, ŝia buŝo gapis kvankam ne aŭdiĝis sono, ŝiaj okuloj elstaris, ŝia tuta korpo spasmis kaj tordiĝis. Ŝia luktado etendiĝis dum agonie longaj, malrapidaj minutoj, ĝis finfine ŝiaj senesperaj klopodoj malpliĝis kaj ŝia korpo komencis malstreĉiĝi. Antaŭ ol ŝi iĝis komplete senmova, tamen, Dumnovalos signis al la aliaj du, kaj ili faligis la ekstremaĵojn de la rimeno. Dumna tuj falegis al la grundo.

Mi konstatis, ke mi retenas mian spiron, kaj sammomente mi aŭdis longan elspiron de ĉiuj en mia ĉirkaŭaĵo. Dumna komencis spasme anhelegi, kaj roza koloro malrapide revenis al ŝiaj vangoj. Tamen, antaŭ ol ŝi sukcesis plene rekapti sian forton, la du druidoj prenis ŝin kaj portis ŝin al la kaldrono. Ili levis ŝin kaj plonĝigis ŝian kapon en la akvon. Dumnovalos alproksimiĝis kaj firme tenis ŝiajn krurojn. La supra parto de ŝia korpo restis libera, kaj denove ni estis devigataj rigardi dum ŝiaj brakoj senhelpe baraktis kaj ŝi preskaŭ faldiĝis pro la provo levi sian kapon el la akvo. Ĉi-foje, bonŝance, ŝia luktado daŭris malpli longe, kaj baldaŭ la kverkuloj remetis ŝin sur la teron. Kvankam ŝi estis senkonscia, ŝia brusto konvulsie moviĝis.

Nun venis la momento por la tria kaj lasta morto. La druidoj trenis ŝin al la kverko kaj surgenuigis ŝin kontraŭ elstaranta parto de la trunko. Dumnovalos staris malantaŭ ŝi, alte tenante kurban tranĉilon. Li elkriis kelkajn strangajn vortojn, kaj tiam abrupte ŝovis ĝin en ŝian dorson. Ŝia korpo skuiĝis du-tri fojojn kaj falis spasmante. Sed la ofero

ankoraŭ ne estis kompleta. Li forhakis ŝian kapon kaj zorge aranĝis ĝin sur la kraniomonteto. Tiam oni mallevis ŝian kadavron en puton, jam pretigitan ĉe la rando de la centra areo.

Sekvis nun la vico de la bestoj. Ilin oni mortigis iom malpli ceremonie. Oni tranĉis iliajn gorĝojn super la elstaraĵo ĉe la trunko de la granda kverko, kaj poste ŝovis ilin en la puton. Laste venis la aliaj objektoj. Ĉiun oni frakasis per unu sola frapego kaj tiam ankaŭ ĝin oni sendis subteren. Kiam la ofero estis kompleta, la puto estis plenigita.

La kverkuloj sekvis unu la alian laŭvice el la maldensejo, lasante sur la plata ŝtonego la sanktajn objektojn, kiujn ili uzis dum la ceremonio. Mi aŭdis frustradon inter la apudaj homoj; venis la momento por reiri. Kintila, Makaros kaj mi aliĝis al la homamaso kiu silente fluis el la maldensejo. Mi subite rimarkis, ke mi malsategas. Ni restis sendormaj la tutan nokton, sed laste manĝis nur la antaŭan vesperon.

Dum ni reiris laŭ la vojeto, mi pripensis kaj repripensis la eksterordinarajn spertojn de la nokto: la momenton, kiam mi ekfloris ĝis la arbopintoj; la brilantan vojeton kiu kondukis en la ĉielon; kaj precipe tiun verdan fekundan landon, kie bovinoj kaj ŝafoj vagis libere tra la montetoj. Sed sub ĉio estis sento de perturbo: estis ia malagrabraĵo, kiun mi ne volis pripensi, sed kiu konstante trudis sin al mia menso. Mi ne povis forgesi la manieron, laŭ kiu Dumna luktis por levi sian kapon el la kaldrono. Tio trafis min kiel malplaĉa subgusto je la aliaj okazaĵoj de la nokto. Mi volis forgesi ĝin, sed mi sciis, ke la memoro revenados al mia menso ĝis konstanta ripetado malakrigos ĝin.

Ni eliris el la arbaro kaj jam remarŝis laŭ la riverbordo, kiam finfine Makaros rompis la silenton. “Binjo,” li komencis. Mi ne sentis parolemon, sed mi sciis, ke estos maleble devojigi lin. “Kion?” mi demandis.

“Binjo... kial Dumna tiom saltigis siajn brakojn kaj krurojn laŭ tia maniero?”

“Ĉar ŝi ne povis enspiri.”

“Ĉu ŝi ne sentis grandan doloron, kiam oni tiris tiun rimenon ĉirkaŭ ŝia kolo?”

“Kiel mi sciu, por diri tion al vi?”

“Mi estas certa ke ja doloris ŝin, ĉar ŝi tordiĝis kiel tiun fojon kiam ni trovis serpenton sub ŝtono kaj bategis ĝin per bastono kaj bategis ĝin ĝis ĝi mortis.”

“Do verŝajne ja doloris ŝin.”

“Sed Dumna ne deziris, ĉu ne, ke oni mortigu ŝin tiel?” li persistis.

“La afero ŝajnis pli malbona, ol ĝi vere estis, eble,” mi diris. “Nun ŝi sidas apud la dioj de nia popolo, bele kaj bone sur ora ŝafofelo, kaj manĝas mielkukojn, kaj petas, ke ili helpu nin forsendi la romanojn el nia lando.”

“Tion vi diras nun, sed kiam ŝi sentis tiun rimenon ĉirkaŭ sia kolo, mi ne kredas ke ŝi volis foriri de nia vilaĝo kaj la rivero, kaj iri al fremdaj lokoj, de kie ŝi neniam povos reveni, neniam ajn.”

Pacience mi klarigis: “Ĉu vi volas, ke la romanoj venu ĉi tien por bruligi nian domaron kaj la vilaĝon, kaj forporti nin ĉiujn por loĝi inter la rokoj kaj la ŝtonoj en ilia urbo, kiu ne havas arbojn? Sed nun Dumna iris al niaj dioj, kaj ŝi petas ilin helpi nin forpeli la romanojn.”

“Sed mi pensas, ke Dumna ne volis, ke Dumnovalos sendu ŝin al niaj dioj: precipe kiam ŝi sentis tiun doloron, kiu estis en ŝia kolo.”

“Kiel mi sciu, ĉu ŝi sentis doloron aŭ ne?” mi kriis ĝenate. “Dumnovalos estas tiu, kiu scias pri tiaj aferoj. Iru demandi lin, se vi tiom deziregas scii. Li diros al vi, ĉu dolorigas aŭ ne.”

Ni plumarŝis al la vilaĝo sen plia vorto.

* * *

Unu el la plej grandaj ĝenoj, kiam oni loĝis en la vilaĝo, estis la neceso regrimpi la krutan monteton por atingi ĝin, precipe kiam ni jam estis tute elĉerpitaj post la okazaĵoj de la nokto. La kalka vojeto estis danĝere glita, kaj mi kaj Kintila devis treni Makaron supren. Li marŝis kun fermiĝantaj okuloj, kaj kiam temis pri mi mem, mia menso estis en stato de konfuzo kaj miaj kruroj apenaŭ plu ŝajnis aparteni al mi. Mia sola deziro estis reatingi la kabanon de Isarninos, trovi trankvilan angulon, se tia afero entute ekzistus, kaj endormiĝi. Sed dum la suno altiĝis en la ĉielo, la nebulo interne de mia kapo malpliĝis kaj mi eksentis min mirige freŝa. Estis mateno, kaj malgraŭ ĉio kio okazis dum la nokto, mi sentis min preta por la nova tago.

Reveninte al la kabano mi trovis Lavenjan, kiu varmigis supon. “Manĝetu rapide,” ŝi diris, “kaj poste iru al via melkado. Ne pasos nun longa tempo ĝis ni vidos la romanojn marŝi tra la montetoj kun siaj ĉevaloj kaj trumpetoj, kaj ni havas amason por fari antaŭ tiu tago. Ni devas helpi konstrui novan remparon, tion mi aŭdis, ekster la du aliaj.”

Kiam mi iris eksteren, mi trovis ke la tuta loĝantaro freneze laboregas. Ĉiu vilaĝo havis sian propran forĝiston, kaj nun ĉiuj kvar diligentis en malsamaj anguloj de la vilaĝo kun siaj filoj apude. Unu riparis armilojn, alia produktis centojn da lancopintoj, dum iliaj filoj prizorgis la fajrojn kaj fandis malnovajn kuirpotojn por rehavi la metalon. La aliaj du okupiĝis pri la pordegoj, kiujn ili volis fortikigi per feraj stangoj.

La travivintoj el la alia urbo estis rakontintaj, ke la romanoj disbatis la ĉefan pordegon per arbotrunko. Kaj se tio ne sufiĉus, ili ankaŭ havis manieron flugigi centojn da

lancoj, kiuj siblis tra la aero tiel rapide kaj kun tia forto, ke eĉ la plej kuraĝaj defendantoj estis devigataj cedi. Tre malmultaj militistoj sukcesus ĵeti lancon supren laŭ la montoflanko kaj rekte trans la remparon, sed laŭŝajne la romanoj posedis ian strangan aparaton, kiu povis atingi celojn ekster la kapablo de normala homo.

Ĉi tiuj rakontoj estus povintaj malkuraĝigi nin, se ne temus pri la rapida rebato de maljuna Morimanos. “Troviĝas viroj ĉi tie apud mi en ĉi tiu loko, kiuj scias ĵeti lancon de la remparo ĝis la rivero, tiel ke ĝi trapikus homon de la gorĝo ĝis la nuko kaj mortigus tiun, kiu starus malantaŭe. Kaj ili povas fari tion per la forto de la propra brako kaj la lerto de la propra okulo. Ĉu tiuj romanoj estas eble musoj, ke ili bezonas helpilon por ĵeti lancon?” La komento de Morimanos vojaĝis rapide ĉirkaŭ la vilaĝo kaj gajigis ĉiujn. Ja, la romanoj konis multajn ruzojn, sed tiaj artifikoj atingos nenion kontraŭ firmaj forto kaj kuraĝo.

Kaj krome, Lugos-kresto havis nur unuopan remparon. Eĉ se la romanoj ja kunportis iajn strangajn helpilojn, ŝajnis apenaŭ eble ke ili sukcesos ĵeti lancon trans la larĝon de la duobla remparo, kiu ĉirkaŭas nian propran vilaĝon. Sed por esti absolute certaj, ni decidis ekkonstrui trian remparon ekster la aliaj du. La plej fortaj viroj de la kvar vilaĝoj jam diligente elkavigis novan fosaĵon ekster la duobla pordego. Ni ne povis esti certaj, ke ĝi estos preta antaŭ la alveno de la romanoj, sed almenaŭ ĝi konsistigos unu plian ŝildon ĉe la plej malforta punkto de nia defendosistemo.

Dum la viroj fosis, dekoj da virinoj kaj infanoj forportadis en korboj la teron kaj rompitaĵojn kalkopecojn, kaj elverŝis ilin sur la grundon je difinita loko, ne tre malproksima. Tie estis leviĝonta la tria remparo. En tiu momento, ĝi estis ankoraŭ nur malalta elstaraĵo, sed pro la nombro da homoj kiuj partoprenis la laboron, ĝi devos rapide kreski.

Elirante el la pordegoj survoje al la bovinoj, mi rigardis la laboron kun intereso. Fininte la melkadon, mi reiris kaj prenis mian lokon apud la aliaj junulinoj. Ni plenigis korbon post korbo per tero el la nova fosaĵo, kaj kvankam ĉiu unuopa korbopleno estis malgranda en si mem, estis kuraĝige vidi kiel la remparo malrapide kreskas. En la komenco ĝi estis apenaŭ pli ol ŝvelaĵo sur la flanko de la monteto, sed nun ĝi komencis simili malaltan muron.

Tia laboro estus ekstreme laciga en iu ajn okazo, kaj dum la mateno pludaŭris, mi iĝis ĉiam pli konscia, ke mi tute ne dormis la antaŭan nokton. Cetere, pezis sur mi la ĉeesto de tiuj centoj da homoj, kiuj ŝajnis svari ĉie. Jam mi neniam sukcesis kompreni, kiel la homoj eltenas loĝi tute kunpremite en la vilaĝo, kiel abeloj en abelujo. Nun estis tri- aŭ kvar-oble tiom da homoj ol kutime, el kiuj la plejmulto estis nekonataj. Ĉirkaŭis min dekoj da vizaĝoj, kiujn mi neniam vidis antaŭe.

Mi rigardis sopire al mia propra eta domaro, kiu estis klare videbla sur la kontraŭa monteto. Kiom mi deziris iri hejmen kaj kuŝiĝi! Sed nun necesis reiri al la kabano de Isarninos, kaj ankaŭ tiu estos plenŝtopita, sen iu ajn ebleco trovi trankvilan angulon. Se mi povus nur mallonge foriri al iu loko, kie mi estus sola! Sed ne eblis fuĝi, do mi

plustumbladis tien kaj reen kun mia korbo, kaj tagmeze mi reiris al la kabano de Isarninos por manĝi. Ne estis tiel malbone, kiel mi timis. Mi trovis mian patrinon kaj Lavenjan, sed la viroj jam forportis siajn manĝaĵojn al la nova fosaĵo, do estis iom malpli da homoj ol antaŭe. Dum mi manĝis fabojn el ligna bovlo, Vinda venis sidiĝi apud mi. “Ĉu vi povas diveni, kion Alisa montris al mi hieraŭ?” ŝi diris. Alisa estis la plej juna filino de Lavenja kaj Isarninos.

“Kion?”

“Estas truo sub la remparo, kie eblas enrampi.”

“Kie?” mi demandis, mirigite.

“Malantaŭ la grenejoj. Ĉu vi povas bildigi al vi la grenejon kun mankanta ŝtupeto antaŭ la pordo?”

Mi ne povis imagi, pri kiu el la grenejoj temas. Mi ne havis kialon viziti ilin, kaj apenaŭ iam ajn iris al tiu flanko de la vilaĝo.

“Do, mi diras al vi: se vi trovos tiun grenejon, ĝi estas tiel proksima al la remparo, ke oni devas premiĝi preter ĝi kiel muso aŭ leporo. Mi ludis tie hieraŭ kun Alisa en la longa herbo, kiu kreskas malantaŭe. Kaj ŝi montris al mi, kie troviĝas truo sub la remparo, sed ĝi estas tiel malvasta, ke oni devas rampi kun la kapo premita al la koto, kaj la ŝtonoj, kiuj skrapas la genuojn. Sed en la fino ĝi plilarĝiĝas, kaj estas tie sufiĉa spaco por tri homoj, aŭ eble kvar, se oni pretas sidi kun la mentono puŝita kontraŭ la dorso de iu alia. Ĝi estas belega kaŝloko, se iam vi bezonos tion.”

“Kaj kial mi bezonus ĝin?” mi demandis ĝenate. “Vi estas tro granda nun por ludi kaŝludon kaj rampi en ratotruojn, dum ĉiuj aliaj detruas siajn fingrojn pro la fosado kaj forportadas la rompitan teron.”

Finmanĝinte, mi kliniĝis sur la pajlo kaj tuj endormiĝis. Preskaŭ en la sama momento, laŭ mia impresoj, iu senindulge skuis min. “Ĉu ĉi tiu estas la momento por dormi,” demandis la voĉo de mia patro, “kiam la romanoj alvenos tra la montoj en iu ajn tago? Knabinoj kaj virinoj okupiĝas pri la lancofarado. Iru vidi ĉu vi povas helpi ilin.”

Kontente ke mi almenaŭ povos eviti la pezegan laboron ĉe la nova remparo, mi iris tra la vilaĝo ĝis mi trovis kie aro da junulinoj sidis kalkane sur la grundo por fiksi lancopintojn sur stangojn. Ankaŭ Elvisa estis tie, kaj mi sidis apud ŝi kun plezuro. Tamen ni interŝanĝis malmultajn vortojn dum tiu posttagmezo. Kiam grupo de junulinoj laboris kune, ĉiuj kutime ridadis kaj ŝercadis. Mi ne scias, ĉu pro lacego, ĉu pro prema sento de maltrankvilo, sed hodiaŭ ni apenaŭ interparolis. Eĉ Kanda, kiu normale volis superregi ĉie, estis malpli parolema ol kutime.

Mi ĵetis rigardon al Elvisa unu-du fojojn dum la posttagmezo. Ŝi aspektis terure. Ŝiaj vizaĝoj kaj robo estis ŝmiritaj de tero kaj kalko, ŝiaj krispaj haroj eskapis el la plektaĵoj, kaj ŝiaj manoj estis kovritaj de skrapvundoj pro la portado de la malglataj ŝtonoj. Mi

konstatis, ke sendube mi aspektas ne tre malsimile, sed eĉ kiam Belinos venis portante al ni brakoplenon da novaj lancostangoj, mi tute ne provis ordigi min. Lacego igis min komplete indiferenta.

Kiam mi memoris, ke mi ankoraŭ devos peli la bovinojn al la rivero kaj poste melki ilin, mi sentis svenemon. Mia kapo turniĝis kaj miaj kruroj tremis, dum mi reiris al la kabano por preni la sitelon. Mia patrino devis apenaŭ rigardeti min por tuj sendi min kuŝi. "Vinda prizorgos la bovinojn ĉi-vespere," ŝi diris. "Ni almenaŭ ne bezonos ĉerpi akvon, jen unu bona afero, ĉar oni suprenportis barelojn per ĉarego." Danke, mi ekkuŝis sur la pajlo kaj endormiĝis. Unu-du fojojn mi duone vekigis, kaj videtis homojn manĝi aŭ babili. Tiam mi kontente redrivis en miajn sonĝojn.

Kiam mi denove vekigis, estis profunda nokto. La kabano estis nigre malluma, kaj mi vidis nenion. Estis neniua diferenco, ĉu mi malfermis la okulojn aŭ tenis ilin fermitaj. Ĉirkaŭ mi, mi sentis la ĉeeston de la aliaj dormantoj kaj aŭdis ilian regulan spiradon. Mi kuŝis surdorse rigardante supren el larĝe malfermitaj okuloj. Lastatempe mi ĉiam evitis pensi pri la estonteco, kiu ŝajnis enteni ian obtuzan minacon tro monstran por esti reala. Nun, la unuan fojon mi rigardis ĝin rekte, kaj vidis ke la minaco ja estas reala, kaj krome ke ĝi alproksimiĝas je senspiriga rapideco. Apenaŭ eblis konvinki min, ke temas pri io vera, kaj tamen mi sciis, ke ĉi tion mi ne povos ignori. Ankaŭ se ŝajnas maleble, ĉi tio efektive okazas.

En mia fantazio, mi imagis nepriskribeblajn scenojn: miajn patrinojn kaj patron mortajn, soldatojn kiuj frakasas la kranion de la bebo aŭ minacas Makaron antaŭ miaj okuloj, dum li eĉ ne kuraĝas plori pro teruro. Mi provis imagi metalon, kiu tratanĉas karnon: ĉu ĝi en- kaj el-glitus tute glate, aŭ ĉu ĝi implikiĝus kaj ŝirus? Sed mia menso forturnis sin de tiu penso. Eble tio povus okazi, sendube ĝi jam okazis al miloj da aliaj junulinoj precize kiel mi. Sed mi neniam sukcesos prepari min al io tia. Se ĝi okazos, necesos iel fronti ĝin. Sed ĝis la momento mem, mi rifuzos kredi je ĝi.

* * *

Kiam mi eliris al la melkado la postan matenon, mi vidis, ke la nova fosaĵo sufiĉe progresis de post la antaŭa tagmezo. Ĝi nun etendiĝis laŭ preskaŭ la tuta flanko de la monteto kiu frontis la riveron, kaj ĝia ekstera bordo krute leviĝis por renkonti la novan remparon. La remparo ankoraŭ ne estis tre alta ĉe la interna flanko, sed kompreneble, estus pli malfacile aliri ĝin de ekstere, kie al ĝia alteco aldoniĝis la deklivo de la monteto. La laboro estis malrapidiĝanta dum la remparo kreskis, ĉar nun necesis porti ĉiun korbon da rubo ĝis la pinto. La virinoj uzis ĉevalojn kaj bovojn por suprenporti la pezajn korbojn.

Kiam mi estis preta, mi marŝis laŭ la kresto de la remparo por serĉi Elvisan, kaj finfine

trovis ŝin, kiu pakis ŝtonojn en korbon. Ŝi salutis min per mansvingo, kaj mi glitgrimpis malsupren al ŝi. La laboro ne lasis al ni multan spiron por interparoli, kaj tre baldaŭ ni ambaŭ estis kovritaj de polvo kaj ŝvito. Kiam ni ne plu sukcesis daŭrigi, ni grimpis trans la pinton de la remparo, kaj kuŝiĝis en kaveto iom pli malsupre sur la montoflanko. Sub ni etendiĝis la valo kun siaj malkrutaj deklivoj, siaj arbaretoj kaj domaroj, kaj malpli proksime vidiĝis la tranĉa konturo de la Kresto, kie ni kutimis festi Beltenon. Sed nun la kontraŭajn deklivojn makulis pluraj nigraj areoj jen kaj jen inter la brunaj kaj verdaj, montrante kie la domaranoj bruligis siajn kampojn pro manko de tempo por fari la rikolton. Eĉ antaŭ sia alveno, la romanoj jam metis sian markon sur nian teritorion; ne plu eblis elrigardi super la konata pejzaĝo sen ricevi malagrablan memorigon pri venontaj okazaĵoj. Kaj mi ekkomprenis, ke kiam la romanoj estos foririntaj, ili postlasos multajn aliajn nigrajn areojn.

“Elvisa,” mi diris, “ĉu vi opinias, ke ni konos unu la alian en nia venonta vivo?”

“He, kio instigas vin ekparoli ĝuste nun pri la venonta vivo?” ŝi demandis.

“Ne estas kialo, sed venis al mia menso, ke estos bedaŭrinde, se ni ne konos nin.”

“Kiu scias, ĉu ni estos ankoraŭ samaj? Mi estos birdo, eble, kaj vi leporo. Aŭ lumbriko kaj skarabo,” ŝi aldonis ridante.

“Sed, ĉu vi scias, iam mia patro vidis hundeton, kiu sidis pli senmove ol bloko da blanka kreto, dum bruna muso pasis antaŭ ĝiaj okuloj, same proksime kiel via buŝo al via nazo. Tiu hundo devis rekoni la muson, certe devis esti tiel.”

“Eble tiel estis,” diris Elvisa. “Sed kiel ni rekonos nin? Se vi sufiĉe ripozis, ni reiru.” Ni komencis regrimpiti silente, kaj tiam ŝi aldonis, “Mi diros al vi kiel estos: mi konos vin per viaj ruĝaj haroj.”

“Sed se mi estos ŝafo, aŭ eble hundo, mi ne havos ruĝajn harojn.”

“Ne, sed vi povus iĝi ruĝgorĝulo aŭ sciuro. Kaj vidu, ankaŭ mi portas ruĝan robon hodiaŭ. Tiel ni konos nin, ĉar ni ambaŭ surhavas ian ruĝan strion.”

Ni rigardis unu la alian per grandaj okuloj. Elvisa parolis sufiĉe senĝene, eble preskaŭ senpripense, sed tuj kiam la vortoj estis diritaj, ni sciis, ke temas pri interkonsento nerompebla, eĉ trans la barilo kiu apartigas nin de la venonta vivo. Ĝi estis tia interkonsento, kian farus tribestroj aŭ la grandaj herooj en la rakontoj de Morimanos. Neniam mi antaŭvidis, ke iun tagon mi mem eniros tiel simple kontrakton tiel profunde solenan.

“Ni devus signi la interkonsenton,” mi murmuris finfine, kaj ĉirkaŭrigardis, serĉante iun akran objekton.

“Estas senutile; ni ne kunportis tranĉilon. Kiam ni reiros, ni faros ĝin.”

Kaj do ni regrimpis trans la remparon kaj kuris malsupren por repreni niajn korbojn, kiuj atendis nin rande de la fosaĵo.

La unua el niaj gvatistoj revenis tiun posttagmezon, por raporti ke oni vidis roman esplorpatrolon, kiu iris supren laŭ la rivero. Rapide formiĝis kompanio por renkonti ĝin. Niaj homoj revenis sekure antaŭ la noktiĝo kun kuraĝiga informo. La romanoj estas timemuloj, laŭ ilia raporto. Kompreninte, ke ili estas embuskataj, ili tuj fuĝegis. Ili eĉ ne haltis por helpi anon de sia kompanio, kiu estis ĉirkaŭita. Forlasite de siaj kunuloj, li estis facile superita kaj mortigita. Se la ceteraj romanoj similus ĉi tiujn, certe mankus al ili kuraĝo por ataki fortikigitan vilaĝon ĉe monteta pinto. Trankviligis min aŭdi ĉi tion kaj ankaŭ vidi, kiel la remparo kreskadas, dum faskoj da lancoj ekhirtiĝas je diversaj punktoj ĉe la interna muro.

La postan matenon, ĉiuj el niaj gvatistoj revenis krom unu. Ni neniam malkovris, kio okazis al li.

Ĉiuj en la vilaĝo staris ĉe la pinto de la interna remparo por rigardi dum la romanoj orde paradis tra la valo laŭ la rivero. Neniam mi vidis tiel eksterordinaran vidaĵon. Ili marŝis flank-al-flanke en vicoj, unu vicon malantaŭ la alia, por formi longan kolumnon. Mi ofte aŭdis, ke ilia armeo similas formikaron, sed formikoj diskuras laŭ sensenca maniero, ĉiu sekvante sian unuopan vojon. Nenio en mia tuta sperto estus povinta pretigi min vidi tiujn centojn da viroj, ĉiuj moviĝantaj kune en la sama direkto je la sama rapideco. Ili ŝajnis tute malhomaj. Mi memoris la priskribon de Morimanos pri ilia urbego, kie ĉio estis farita el ŝtono. Ofte mi demandis min, kiaj homoj eltenus vivi en tia malvarma, morta loko, sen arboj aŭ herbo aŭ floroj. Nun mi komprenis.

Ankaŭ mirigis min vidi tiom da homoj moviĝi en tiel granda akordo, kvazaŭ mankus al ili ĉiuj propraj sentoj kaj deziroj. Ĉiuj ŝajnis parto de pli granda tuto, en kiu ili estis komplete ensorbitaj. Mi scivolis, kiel ili povas ekbatali laŭ tia senemocia maniero, pelite ne de sia interna pasio sed, laŭ tio kion mi aŭdis, de la sono de trumpeto.

La kolumno de viroj daŭris kaj pludaŭris. Troviĝis en ĝi ne nur ĉevaloj kaj piedsoldatoj, sed eĉ ĉaregoj. Sed ankoraŭ senĉese aperis novaj homoj. Rapide iĝis klare, ke laŭnombre ili facile superas nin. Devis esti tie po unu soldato por ĉiu viro, virino kaj infano en ĉiu el la kvar vilaĝoj.

“Ĉu vi rigardas ilin marŝi tiel, kiel granda ŝafaro,” komentis viro, kiu staris en mia proksimeco. “Mi ŝatus vidi ilin, kiam falos inter ilin kelkaj el niaj lancoj.”

“Nekredeble, ĉu ne?” diris alia. “Kaj ili imagas, ke ili suprenvenos tiel tiun ĉi monton, dum la lancoj kaj ĵetilpafaĵoj pluvos sur ilin kiel poleno en printempa tago.”

Ili komencis kalkuli la nombron de la soldatoj. “Ili estas facile nombreblaj, tiel bele aranĝitaj en vicoj,” komentis la unua.

“Nur ke tiel, ili ŝajnas malpli ol sia vera nombro,” respondis la alia.

Unue mi sentis timon, vidante la grandecon de la malamika forto, sed dum la du viroj pludiskutis la situacion, mi komencis kompreni, ke ĝi ne estas tiel malbona kiel ĝi ŝajnis unuavide. Finfine, ja estis vere, ke ni havos avantaĝon pro la deklivo kaj la grandioza duobla remparo, kiu kostos al la romanoj multajn vivojn, se ili provos kapti ĝin per sturmatako. Estis bedaŭrinde, ke mankis tempo por fini la novajn fosaĵojn kaj remparon - neniu imagis, ke la romanoj alvenos tiel baldaŭ - sed ili almenaŭ provizos kroman protekton antaŭ la pordegoj, kiuj ĉiam estis nia plej malforta punkto. Tamen, estis klare, ke la ĉefa defendagado devos koncentriĝi ĉe la pli ekstera el niaj du malnovaj remparoj.

La kolumno plumarŝis laŭ la alia bordo de la rivero ĝis ĝi atingis punkton rekte kontraŭ nia vilaĝo. En tiu momento eksonoris alta, ŝira krio, kaj la tuta kompanio - viroj, ĉevaloj, ĉaregoj, ĉio - tuj haltegis, precize sub la monteto kie troviĝis mia propra domaro. La domaro estis videbla pli supre. Ĝi aspektis tre malgranda kaj sendefenda. Mi demandis min, ĉu ankaŭ la romanoj vidis ĝin.

Nun, kiam ili troviĝis pli proksime, mi vidis ke gvidas ilin pluraj rajdantoj, ĉiu portante altan stangon kun strangaj enmuntitaj objektoj. La ĉevaloj aspektis sufiĉe pli altaj ol la niaj, sed ankaŭ malpli fortikaj. Ili ŝajnis tro malpezaj por serioza laboro, sed aliflanke ili evidente estos tre rapidaj. Ĉiaokaze, ili ne multe utilos por ataki vilaĝon sur montopinto.

Ŝajnis, ke la gvidantoj interkonsiliĝas. "Ili ne plu aspektos tiel gajaj, vidinte nun, kio frontas ilin," diris la viro apud mi. Sed tre baldaŭ la akra krio sonis duan fojon, kaj la tuta kolumno denove ekmoviĝis kvazaŭ unuopa homo. La gvidantoj sur siaj ĉevaloj direktiĝis for de la rivero, kaj nun marŝis rekte supren laŭ la monteto ĝis nia domaro. La cetero de la kolumno tiriĝis poste kiel la vosto de serpento. Mia koro bategis dum ili ĉiam pli alproksimiĝis al nia domaro.

Subite, kelkaj rajdantoj apartigis sin de la aliaj kaj galopis antaŭen. Senhelpe mi rigardis dum ili trotis ĝis la domaro, faligis la barilon kaj indiferente surtretis ĝin. Mi streĉis miajn okulojn por vidi, kion ili faras en nia korto. Mi sciis, kompreneble, ke ni jam forportis ĉiujn valoraĵojn, sed ĉiam restis la timo, ke ili trovos la grenoputojn. Tamen ne nur pro la putoj mi tiom agitiĝis: temis ĉefe pri la konstato, ke tiuj fremduloj eniras nian domaron, dum ĝi kuŝas malfermita kaj nuda, por ke ili misuzu ĝin laŭ sia deziro.

Post kelkaj minutoj, iuj el ili elvenis kaj iris al la heĝo. Unue mi ne sukcesis kompreni, kion ili faras. Ŝajnis, kvazaŭ ili skuas la heĝon. Tiam mi konstatis: ili dehakas ĝin. Flamo eksaltis ĉe la tegmento de la kabano de mia onklo. Paraliziĝinte mi rigardis, kun miaj manoj kroĉitaj al la malalta muro. Ne eblis plori, aŭ eĉ pensi. Aliaj flamoj leviĝis de la kokinejo kaj la malplena grenejo. Momente mi esperis ke tamen nia propra kabano eskapos, sed tiam flamanta strio kuris supren laŭ la pajlo. Mi staris ĉe la alia flanko de la valo kaj rigardis ĝin bruli. Mi apenaŭ povis kredi, ke ĉi tio vere okazas. En malpli da tempo ol necesus por fortimigi birdon el la tritiko, la hejmo kie mi loĝis dum mia tuta vivo estis detruita.

Kiam de nia domaro restis nur cindroj, mi stumblis malsupren laŭ la kruta deklivo ĝis la grundo. Mi vagis sencele, ne sciante kion fari. Ĉiuj aliaj ankoraŭ staris sur la remparo.

Iom post iom la homoj komencis drivi malsupren. Kelkaj laŭte disputis, aliaj estis maltrankvilaj kaj silentemaj. Ŝajne, la romanoj starigas sian tendejon ĉe la pinto de la monteto: de mia monteto. Mi ne reiris por rigardi. Dum ne eblis vidi la karbiĝintajn restaĵojn de nia domaro, mi povis preskaŭ imagi, ke ĝi ankoraŭ staras.

Pluraj viroj estis diskutantaj, ĉu oni ne tuj ataku la romanojn dum ili starigas sian tendejon, sed la ĝenerala opinio estis, ke oni prefere atendu. Dum ni restos interne de nia remparo, nia pozicio estos preskaŭ nekaptebla, dum por la romanoj, ĉiu paŝo antaŭen faligos lavangon da pafaĵoj, kiuj impetegos malsupren sur iliajn kapojn. Aliflanke se ni eliros el la vilaĝo por renkonti ilin, ili havos pli da tempo ol ili bezonos por ekpreni siajn batalpoziciojn, kaj ĉiuj scias, ke en la batalkampo la romanoj estas praktike nevenkeblaj.

La militistoj malaperis en la kabanon de Katumandos, dum la aliaj viroj staris en disaj grupetoj kaj laŭte interparolis. Ne havis sencon daŭrigi la laboron pri la nova remparo, kaj malmulte estis farebla nun krom atendi la matenon. Kelkaj el la vilaĝanoj eliris por porti internen la brutojn el la provizoraj palisaroj sur la montetoflanko. Eĉ la bovinoj, kiujn oni paŝtis inter la du remparoj, devis veni internen. Estis pluraj grandaj herbejoj en la vilaĝo, kaj la bestoj povos resti tie unu-du tagojn. Ili estos tre kunpremitaj, sed jam la morgaŭan vesperon la afero devos esti findecidita iamaniere.

Sed estis ĝena penso en la fundo de mia menso: io kio jam obtuze maltrankviligis min de iom da tempo, sed kion mi ĝis nun ĉiam puŝis flanken. Kompreneble mi sciis, ke iu ajn rekta atako kontraŭ nia vilaĝo nepre malsukcesos, same kiel ankaŭ niaj homoj malsukcesis, kiam ili atakis Lugos-kreston. La sola serioza malutilo, kiun la romanoj povos kaŭzi al ni, estos bruligi kampojn kaj domarojn, kaj kapti homojn aŭ bestojn kiuj vagas ekstere. Sed kio okazos poste? Ĉar ili ja ne povos reiri al sia propra vilaĝo. Ĉu ili simple preterpasos nian monteton kaj plumarŝos supren laŭ la rivero? Aŭ eĉ pli malbone - sed tio trafis kiel la plej verŝajna perspektivo - kio, se ili simple decidis resti, kie ili estas? En tiu kazo, niaj viroj ne havos alian elekton ol eliri por renkonti ilin en batalo. Ni ne povos resti tiel la tutan vintron, kun bandaĉo da romanoj kiuj frontas nin trans la rivero. Kaj krome, neniel ni povos tiel longe resti enfermitaj interne de la remparoj. Estas vere, ke ne mankos al ni manĝaĵoj: la grenejoj estas plenaj, kaj ĉiuj bovinoj kaj aliaj bestoj estas arigitaj interne. Sed kion ni trinkos? Eĉ se ni lasos ĉiujn bovinojn morti pro soifo, niaj akvoputoj certe estos malplenaj post kelkaj tagoj. Neniam antaŭe mi permesis al mi okupiĝi pri tia demando, nek mi aŭdis aliajn homojn diskuti ĝin. Nia tuta atento ĝis nun fokusiĝis je la roma atako, kaj antaŭ ol fronti tion, ne havis multan sencon rigardi pli foren en la estonteco.

Reveninte al la kabano, mi trovis ke ĉiuj viroj pretigas sin por eliri. Katumandos intencis regali siajn militistojn per festeno, kaj ankaŭ Isarninos devis partopreni. Kiel decis, li invitis siajn du virajn gastojn akompani lin. Ĉiuj tri vestis sin kiel por batalo: ili

krispigis siajn harojn kaj kombis siajn longajn lipharojn. Sed oni vidis, ke mia patro ne ricevos grandan plezuron ĉe la festeno. Lia vizaĝo estis blanka pro enpremita kolerego. Mi tre atente evitis lin. Mi ne volis doni al li pretekston por malŝarĝi sian furiozon kontraŭ mi.

Por ni ceteraj mia patrino kaj la aliaj du virinoj pretigis manĝaĵojn. Ili laboris kiel eble plej senbrue, nerve rigardante mian patron de tempo al tempo. Mia patrino ne kutime timis lin kaj normale ne hezitus alfronti lin, sed ĉi-vespere eĉ ŝi laŭŝajne konsterniĝis. Kiam la viroj foriris, ni ĉiuj spiris pli trankvile, kaj mia patrino tuj mem eksplodis pro ĉagreno.

“Kiaj krimuloj! Kiaj monstroj!” ŝi kriis. “Ĉu ili ne havas proprajn teritoriojn, por ke ili venu trans la maron por detrui la hejmojn de senkulpuloj, kiuj neniam ĉesis lukti kaj laboregi ekde la momento kiam ili lasis la ventron de la patrino? Ĉiun trabon en tiu domo tranĉis la manoj de mia edzo mem; ĉiun pajleron en tiu tegmento mi mem alportis de la kampo kun miaj beboj alkroĉitaj al mia dorso! Ni mem konstruis tiun domaron per nia propra ŝvito kaj zorgo dum la lastaj dudek jaroj, kaj mi neniam imagis, ke mi vivos por vidi ĝin detrui en la spaceto inter tagmezo kaj nokto! Kaj estis ankaŭ la nova grenejo, kiun ni starigis nur la pasintan jaron, kaj la staplo, kie ni retegis la vandojn la pasintan vintron. Ni ne faris ĉion ĉi por ke ĝin detruu homoj, kiuj ne havas la proprajn kampojn, kaj anstataŭe diskuras tra la teritorio de aliuloj por disrompi kion tiuj konstruis!”

La patrino de Kintila ekploris; sendube ŝi pensis pri sia propra vilaĝo, kiun plej verŝajne trafos la sama sorto kiel nian domaron. Ankaŭ Makaros kaj la bebo aldonis laŭtajn plendojn, sed mia patrino tro agitiĝis por atenti ilin. Intertempe Lavenja provis konsoli ĉiujn, kaj memorigis mian patrinon ke jam unu fojon nia domaro estis bruligita kaj tamen mia praavino rekonstruis ĝin tiel ke ĝi iĝis unu el la plej prosperaj ĉe nia flanko de la rivero. Sed evidente mia patrino ne aŭskultis, ĉar subite ŝi elkriis:

“Kial ili dehakis la heĝon, nur tion mi volas scii? Kian ĝenon tiu heĝo entute povis kaŭzi al ili? Eĉ se ni starigos novajn domojn, pasos jaroj antaŭ ol rekreskos tiu heĝo, densa kaj folioriĉa, kiel ĝi estis antaŭe!”

Finfine la aliaj virinoj sukcesis trankviligi ŝin, kaj ni sidiĝis, silentaj kaj malĝojaj, por nia vespermanĝo.

Mi konstatis, ke mi havas fortan kapdoloron, kiun pliigas la fumoplena, tro ŝtopita medio en la kabano. Kintila venis sidi apud mi, sed mi ne sentis parolemon. Finfine mi tiris ŝalon ĉirkaŭ miaj ŝultroj kaj eliris en la freŝan noktan aeron, kie tremigis min malvarma venteto. La ĉielo estis absolute klara, kaj brilis en ĝi densa amaso da steloj. La luno, jam preter la duono, elstarigis kontraŭ la ĉielo la akre tranĉitan konturon de la interna remparo. Mi grimpis ĝis la kresto, kaj elrigardis super la malhela valo. Flagretis fajroj ĉe la pinto de la kontraŭa monteto, sed krom tio, ĉio estis trankvila. Diversaj noktobruoj atingis miajn orelojn: la longe eltirata bojado de hundo, de ie la hu-huo de strigo, ĉevalo kiu henas. Ĉu de la roma tendejo, aŭ ĉu unu el niaj el la troŝtopita

paŝtejo aliflanke de la vilaĝo? Mi enspiris la malmildan aeron ankoraŭ kelkajn minutojn, kaj poste reeniris la varman kabanon.

* * *

Mi kuŝis kun fermitaj okuloj, ĝuante la varmon generitan de mia korpo kie ĝi premiĝis kontraŭ la pajlo. Mi estus absolute kontenta, se ne temus pri sento de naŭzo en mia stomako. Mi sciis, ke estas io, kion mi ne volas pripensi: io kio trudos sin al mia malvolonta menso tuj kiam mi liberigos ĝin. Mi ignoris ĝin tiom longe kiom eblis, sed nerezisteble la memoro formiĝis en mia cerbo. La romanoj tendumas trans la rivero. Kaj hodiaŭ...?

Ne havis sencon plukuŝi en la pajlo. Lavenja jam diligentis. Ŝi revivigis la restaĵojn de la fajro, dum mia patrino verŝis supon en poton. Tute ne vidiĝis la viroj; evidente ĉiuj jam eliris.

Mi sidiĝis kaj tiris ĉirkaŭ mi mian ŝalon. Sammomente Vinda kaj Alisa aperis ĉe la pordo. Lavenja turnis sin al ili. "Ĉu estas novaĵoj?" ŝi demandis.

"Ne videblas multo en ĉi tiu horo," diris Alisa. "Tiu romanoj ankoraŭ ne leviĝis de siaj litoj, ĉar estas neniu movo de ili, krom unu-du, kiuj iris al la rivero por ĉerpi akvon. Paĉjo diris, ke ni iru manĝi. Li diris, ke eble ni ne sukcesos poste."

"Do, ĉu vi vekiĝis, finfine?" diris mia patrino, rimarkante min. "Kaj ne tro frue, ĉar mi komencis kredi, ke oni reĉasos la romanojn trans la riveron kaj reen al Gaŭlujo, dum vi plukuŝos kaj ronkos tie, kiel porko sub kverko. Iru nun okupiĝi pri la bovinoj, ĉar la supo ankoraŭ ne varmiĝis, kaj estas senutile malŝpari tempon, atendante ĝis la romanoj venos frapi ĉe niaj pordegoj."

Mi prenis la melkositelon kaj eliris. Mi ne avidis la supon, male la nura penso naŭzis min. Marŝante al la granda herbejo ĉe la alia flanko de la vilaĝo, mi rimarkis, ke kelkaj el la porkoj iel sukcesis eliri kaj nun fosumas en la kota grundo inter la kabanaj. Denove mi demandis min, kiel longe ni povos teni ĉiujn bestojn interne de la remparo.

Ĉe la paŝtejo mi salutis kelkajn aliajn junulinojn, kiuj jam diligentis pri la melkado. Mi estis ankoraŭ okupata ĉe la bovinoj, kiam subite aŭdiĝis konfuza bruo ĉe la kabanaj. Mi ĉesis melki por aŭskulti. Mi aŭdis homojn, kiuj kriis inter si, kaj vokegojn de la remparoj. Mi kaj la aliaj junulinoj ĉiuj ekstaris, streĉante niajn orelojn, por kompreni kio okazas. Ŝajnis, ke la bruo venas de tiu flanko, kiu frontas la riveron. Kiam eksplodis novaj krioj, ni forgesis niajn sitelojn kaj kuregis el la paŝtejo en la direkto de la pordegoj.

Alproksimiĝante al la remparoj, ni vidis ke laŭlonge de la tuta kresto staras homoj. La

viroj amasiĝis apud la pordegoj, do ni suprengrimpis je malpli proksima punkto por aliĝi al la virinoj kaj infanoj. La unua afero kiu trafis miajn okulojn, kiam mi rigardis al la kontraŭa monteto, estis la nigraj restaĵoj de nia domaro. Nur tiam mi vidis la kolumnon de soldatoj, kiuj progresis en rigora ordo malsupren laŭ la deklivo. Post kelkaj minutoj ili transiros la riveron.

De mia pozicio sur la plej alta remparo, mi ekzamenis la flankon de la monteto, kiu etendiĝis sub mi. La plejmulto el niaj viroj staris jen kaj jen laŭlonge de la ekstera remparo, iom malpli alte sur la monteto. Ankoraŭ pli malalte troviĝis la tria, nefinita remparo, kun amasetoj da rubo ankoraŭ videblaj ĉe la ekstremaĵoj. Tie lokiĝis la tribestroj kaj militistoj. Ili kiel unuaj devis renkonti la romanojn, kvankam pro la senŝirma pozicio, ili riskis esti fortranĉitaj. Plej verŝajne ili devos haste retiriĝi al la dua remparo, kiam la romanoj tro alproksimiĝos.

La romanoj atingis la riveron kaj komencis travadi ĝin ĉe la plej malprofunda punkto. Evidente ili jam malkovris, kie plej bone transiri. Alveninte al nia bordo, la gvidantoj ne ekiris supren, sed atendis ĝis atingos ilin la cetero de la kolumno. Ili ŝajnis tre malrapidaj kaj singardaj, kvazaŭ pli interesas ilin la sekureco ol gajnado de persona gloro. Ili donis impreson de malentuziasmo.

Finfine ĉiuj regrupiĝis ĉe nia bordo, kaj komencis marŝi supren. Ili ankoraŭ estis en preciza ordo, kaj laŭŝajne neniu hastis por puŝi sin antaŭen. Je mia miro, ili ne sekvis la mallongan vojeton rekte supren, sed anstataŭe ekmarŝis laŭ la pli malkruta vojo por la ĉaregoj, kiu zigzagis kun malhasto ĉirkaŭ la flankoj de la montetoj. Pluraj voĉoj aŭdiĝis laŭlonge de la remparo: "Ili povus veni de malantaŭe!" "Kiu rigardas ĉe la alia flanko?" "Disiĝu! Faru pli da spaco! Ĉirkaŭu la vilaĝon!"

La viroj komencis interspacigi sin laŭ la malpli alta remparo, por esti pretaj fronti atakon de iu ajn flanko. La virinoj faris same laŭ la interna remparo, tuj malantaŭ la malalta muro kiu kronis ĝian pinton. De ĉi tie ni vidos, se en iu ajn punkto oni lasos la eksteran remparon sendefenda, kaj ni povus averti la virojn se la romanoj trarompus. La infanoj deziregis resti kun ni sur la kresto, sed ni resendis ilin malsupren kun severaj admonoj, ke ili reiru al la kabanoj. Kompreneble, tuj kiam eblis, la plejmulto reŝteliĝis supren.

Kaj nun restis nenio por fari krom atendi. Mi ne sentis timon, sed ja iom da malvarmo, devante stari tiel longe senmove dum la vento tiritis mian ŝalon. Miaj manoj estis ŝvitaj, kaj mi devis konstante viŝi ilin sur mia jupo. Mi ne povis vidi la romanojn, kiuj verŝajne estis ĉe la alia flanko de la monteto. Cetere, la suba remparo sufiĉe limigis mian superrigardon de la situacio. Mi frontis nun al malsama direkto, kie la valo etendiĝis al la flanko kaj la rivero forserpentumis ĝis ĝi malaperis inter la malproksimaj montetoj.

Ni restis tie en silento dum neelteneble longa tempo. Mi ne havis ideon kiom la afero jam daŭris: verŝajne ne tre longe, sed ĝi ŝajnis senfina. Mi eksentis kapturiniĝon, kaj devis apogi min ĉe la muro por ne ŝanceliĝi.

Kaj finfine, kiam mi jam komencis pensi, ke nenio iam ajn okazos, aŭdiĝis laŭtaj krioj de iu malproksima punkto sur la remparo. Estis klare, ke la romanoj alproksimiĝas en tiu flanko, kaj la defendantoj ekkriegas kontraŭ ili la kutimajn fanfaronojn kaj insultojn. Ĝis la romanoj estos pretaj por la atako, niaj homoj estos atingintaj staton de senbrida furiozo, dum la romanoj, espereble, estos komplete malkuraĝigitaj. De mia nuna starloko, tamen, nenio estis videbla, kaj mi sentis min iom distanca de tio, kio okazas ĉe la alia flanko de la monteto.

La krioj plusonis dum iom da tempo ĝis venis la reago: vokego, kian mi neniam antaŭe aŭdis. Ĝi ŝajnis trafi min rekte en la brusto, kaj pro ŝoko mi ekkaptis la malaltan muron antaŭ mi. Mi sciis, pri kio temas: ĝi estis la batalkrio de la romanoj. Ankaŭ la batalkrion de niaj propraj homoj mi aŭdis. Mi jam ofte aŭdis la knabojn eligi ĝin lude, sed nun la unuan fojon mi aŭdis ĝin en la realeco. Neniam ĝis tiam mi konstatis, kiel terurega povas esti krio.

Momente mi demandis min, ĉu resti ĉe mia loko, sed ĉiuj aliaj virinoj kuregis por vidi kio okazas, kaj mi permesis al mi kaptiĝi en la amaso. Antaŭ ni sur la remparo staris grandega grupo da virinoj, kiuj kriadis kuraĝige al niaj viroj kaj malbenadis la romanojn. Sur la ekstera remparo sube, la viroj svingegis siajn ĵetilojn, pafante unu ŝtonon post alia malsupren en la fosaĵon. De nia starpunkto la romanoj ne estis videblaj, sed estis klare, ke niaj viroj bonege defendas sian pozicion.

Sed tiam aŭdiĝis krio de la flanko: "Ili atingis la supron!" Kune kun la aliaj virinoj, mi rekuris al la punkto kie mi staris antaŭe. Malsupre mi vidis virojn, kiuj batalis sur la ekstera remparo. Jen niaj homoj en siaj multekoloraj vestoj, kiuj svingegis siajn longajn glavojn per larĝaj gestoj. Sed troviĝis ankaŭ aliaj homoj sur la remparo, strangaj viroj, malpli altestaturaj ol la niaj, kaj iliaj korpoj ŝajnis kovritaj de metalo.

Mi rigardis senhelpe dum la defendantoj retiriĝis paŝon post paŝo malsupren de la remparo en la internan fosaĵon. Nun la deklivo favoris la romanojn, kaj finfine niaj homoj cedis sian pozicion kaj kuregis al la interna remparo. La romanoj ĉasis ilin ĝis la fosaĵo, evidente kun la espero malhelpi ilin atingi la pli altan grundon. La fosaĵon tuj plenigis amaso da luktantaj viroj. Ili estis tiel kunpremitaj, ke estis malfacile kompreni, kio okazas. Mi vidis unu viron apartigi sin de la grupo kaj stumbli plurajn paŝojn dum sango ŝprucis el lia ventro. Tiam li falegis al la grundo. Mi rekonis lian vizaĝon: li estis el unu el la aliaj vilaĝoj. Mi ricevis impreson de korpoj distretitaj sub la piedoj de la batalantoj.

Mi estis tiel ensorbata de tio, kio okazas malsupre, ke mi perdis konscion pri ĉio alia. Kiel la aliaj virinoj, mi malbenis, mi ŝiris la aeron per miaj krioj, eble eĉ en frenezo mi eltiris miajn proprajn harojn. Kaj kiam niaj viroj komencis fuĝi el la fosaĵo kaj grimpegi supren al ni laŭ ĝia kruta flanko, ni virinoj furioze atakis ilin, gratante iliajn vizaĝojn kaj postulante ke ili turnu sin por fronti la romanojn denove. Sed estis tro malfrue: ĉiuj niaj viroj, sekvate de la romanoj, jam kuregis al la pinto de la interna remparo.

Subita konscio pri mia propra danĝero revekis en mi senton de prudento, kaj je la

lasta momento mi glitis malsupren laŭ la tera deklivo en la vilaĝon. Super mia kapo, jam aŭdiĝis glavoj kiuj tintis sur la remparo. Dum mi rigardis, romano en sia stranga armilaro glitegis kaj ruliĝis malsupren kiel granda skarabo. Tuj ĉirkaŭis lin la virinoj. Mi ne vidis, kio okazis al li, ĉar en tiu momento iu tiregis min de malantaŭe. Estis Elvisa, kun blanka vizaĝo kaj haroj kiuj disflugis en ĉiuj direktoj. "Ili envenas en alia loko!"

Ni kuris kiel frenezuloj laŭ la bazo de la remparo por serĉi helpon. Ni vidis grupon de niaj viroj sur la kresto, kiuj laŭŝajne klopodis repeli homojn, kiuj provis algrimpi de la alia flanko. Elvisa kriegis al ili: "Ili envenas! Hastu! Apud la grenejoj!"

Kun ĝojo ni vidis, ke pluraj el la viroj venas tuj, duonkure, duonglite, malsupren al ni laŭ la kruta deklivo. "Ĉu ili transvenas?" ili demandis. "Kie?"

"Ĉe la alia flanko! Preter la grenejoj!" Ili tuj forflugis, dum Elvisa kaj mi restis anhelante, kun sento, ke ni forturnis la danĝeron.

Subite mi memoris ion. "Elvisa!" mi kriis. "La interkonsento, kiun ni faris hieraŭ: ni neniam signis ĝin! Kiu scias, ĉu ni havos alian eblecon, se ni ne faros ĝin nun!"

Elvisa ĉirkaŭrigardis senespere. "Vi diras ĝuste, sed estas nenio ĉi tie, kion ni povos uzi."

"Simple ŝiru ĝin!" mi kriis, kaj tiregis miajn proprajn harojn. En mia ekscito, mi eĉ sukcesis eltiri tufon, dum ŝi kun malfacilo penis forŝiri strion de la orlo de sia robo. Ni ambaŭ ŝovis nian donaĵon en la manon de la alia, kaj mi formetis la ŝian sub mian zonon. Mi ankoraŭ posedas tiun makulitan, misŝiritan peceton da ruĝa ŝtofo, apenaŭ pli grandan ol kverkofolio. Ĝi estas la sola aĵo, kiu restas al mi el mia propra vilaĝo.

"Hej, vi knabinoj malsupre!" kriis voĉo super niaj kapoj. "Mankas al ni lancoj! Hastu!" Ni rigardis ĉirkaŭe, kaj vidis en la proksimeco faskon da ili ĉe la bazo de la tera deklivo. Kurante por preni ilin, mi sentis zumadon tra la aero, kaj subite estis objekto kiu elstaris el la grundo rekte antaŭ miaj piedoj. Mi preskaŭ stumblis kontraŭ ĝi. Mi aŭtomate haltis kaj rigardis supren al la remparo, por malkovri kiu ĵetis ĝin, sed tie vidiĝis neniu. Ĝi similis tre mallongan lancon. Ĝi devis esti ĵetita per nekredibla forto, ĉar la ligna stango vibris ankoraŭ kaj la metala pinto estis firme fiksita en la tero. "Kial vi ne venas?" Elvisa vokis antaŭ mi. "Rapidu!"

Ni plenigis niajn brakojn per lancoj kaj malfacile ekgrimpis supren laŭ la kruta, mallarĝa vojeto, kiu kondukis ĝis la pinto de la remparo. Aliaj mallongaj lancoj pretersiblis dum ni grimpis. Ili venis en larĝega arko super la pinto de la remparo, sed bonŝance falis sufiĉe for de la interna deklivo en la suban spacon. Mi ne povis imagi, kia homo havus la necesan fortegon, por ĵeti tiel malproksimen.

Ne estis facile grimpi supren, ŝarĝite de la lancoj, sed la tera deklivo ne estis tiel alta ĉe la interna flanko, kaj kun peno ni atingis la pinton, de kie eblis rigardi malsupren trans la malalta muro. Mi ricevis fulman impreson pri centoj da soldatoj, kiuj svarmegis en la fosaĵo. Grupeto de niaj propraj homoj ankoraŭ rezistis sur la dua remparo. Ili ne

plu havis esperon reatingi la internan remparon; ili estis komplete fortranĉitaj.

Iom pli malproksime, taĉmento de romaj soldatoj jam marŝis supren ĝis la pinto de la interna remparo. Estis neniu por kontraŭstari ilin. Post momento ili transvenos. Antaŭ mi, Elvisa eligis krion. Mi malaltigis mian kapon apenaŭ ĝustatempe por eviti unu el la mallongaj lancoj, kiu siblis malsupren. “Ĉu vi havas truon en la cerbo, aŭ kion?” ŝi kriis. “Simple stari tie por atendi ĝin!”

“Mi ne vidis ĝin,” mi klarigis, konfuzite.

Mi levis la kapon, kaj vidis ke la romanoj jam komencas transgrimpi la mureton. Mi staris dum momento kvazaŭ fiksita al la tero, ankoraŭ tenante la faskon de lancoj. Subite, el nenie, aperis sanga kavo en la frunto de la plej antaŭa homo. Mi vidis lian buŝon gapegi, lian vizaĝon tordiĝi, kaj freneze baraktante li ŝanceliĝis malantaŭen kaj ruliĝis malsupren laŭ la tera deklivo en la vilaĝon. Falis alia homo, kaj alia. Pluraj el niaj propraj militistoj aperis apud ni, ŝovis nin flanken, kaj ekĵetegis lancojn laŭlonge de la remparo. Elvisa kaj mi glitgrimpis malsupren al la tero. Ni ambaŭ estis tremantaj.

Aliaj krioj ekaŭdiĝis de inter la kabanoj, kaj pluraj teruritaj porkoj galopis en nia direkto. Mi ricevis konfuzan impreson pri homoj, kiuj kuras tra la kabanoj, pri krioj kaj kriegoj, pri la tinto de armiloj. Preskaŭ sammomente mi konstatis, ke rivero da romanoj fluas malsupren laŭ la tera deklivo ĉe nia dorso. Elvisa kaj mi kuregis blinde ĉirkaŭ la bazo de la remparo. Pli da romanoj estis alproksimiĝantaj de la kontraŭa direkto. Ni haltis kaj ĉirkaŭrigardis kiel frenezuloj, serĉante elirvojon. Mi vidis la malfermitan pordon de apuda kabano. Alkurante ĝin, ni preskaŭ stumblis super homa kadavro: temis pri unu el la filoj de la forĝisto Eburos. Elvisa ekkaptis la glavon, kiu kuŝis apud li.

Ni haltis, anhelante, tuj interne de la kabanpordo. Apenaŭ estis lumo, kaj la aeron plenigis fumo de la mortanta fajro. Ne estis kaŝejo, krom se ni enŝovus nin sub la pajlon kiel bestoj. En mia paniko, ĝuste tion mi ekfaris. “Ĉu rato vi kredas esti, aŭ serpento?” Elvisa kriis. “Ne estas kaŝloko! Ili vidos vin, certe!” Efektive la romanoj estis jam ĉe la pordo. Mi kuŝis absolute senmova, retenante la spiron. Mi estis angore konscia, ke duono de mia korpo restas malkovrita, sed mi ne povis riski moviĝi por kaŝi ĝin. Mi sciis, eĉ ne vidante ilin, ke la romanoj staras en la pordo kaj ĉirkaŭrigardas. Tiu mallonga momento ŝajnis daŭri senfine. Mi havis nenion en la menso, krom la neeltenebla dezirego iel tiri la pajlon super la alian parton de mia korpo, kaj la scio, ke tuj kiam mi moviĝos, ili saltos sur min.

Eksonis terura krio meze de la kabano. Mi eksaltegis pro ŝoko. Tiam mi komprenis, ke dum almenaŭ kelkaj pliaj minutoj, mi estos sekura, ĉar la batalkrio de Elvisa altiris al ŝi ilian tutan atenton. Aŭdiĝis la tintado de metalo kontraŭ metalo, estis gruntoj kaj krioj, kaj intertempe mi sukcesis enrampi pli profunde en la pajlon. Harstariga gargarado atingis miajn orelojn, kaj tuj poste, silento. Agonia doloro eksentiĝis en mia brusto. Mi sciis, ke la soldatoj ne foriris: ili ankoraŭ paŝegas interne de la kabano. Ili alproksimiĝas. Baldaŭ ili trovos mian kaŝlokon. Ĉu ili trapikos la pajlon per glavo?

Paro da piedoj haltis rekte antaŭ miaj okuloj. Kovris ilin ia stranga piedvesto, kian mi neniam antaŭe vidis, kun rimenoj. Ial mi subite memoris, ke mi lasis la sitelon en la paŝtejo. Ĝenis min la penso, ke mi ne finis la melkadon.

Parolis voĉo super mia kapo. Ĝi ŝajnis tre malproksima. La tranĉa doloro disvastiĝis el mia brusto, tra miaj ŝultroj, mia ventro, miaj intestoj... Susurado plenigis miajn orelojn. Nigraj kaj oraj desegnoj dancis antaŭ miaj okuloj. Kaj tiam mi sentis, ke mi falas, falas, glitas kaj ruliĝas, malantaŭen, malsupren, laŭ longa, longa tunelo en mallumon.

AL ROMO

TRIA ĈAPITRO

La sola afero, pri kiu mi plene konsciis dum la sekvaj tagoj, estis la doloro en mia brusto. Ĉio alia paliĝis ĝis griza ombro kompare kun tiu dolorego, kiu disradiis tra ĉiu parto de mia korpo. Mi povis senti eĉ la konturojn de miaj pulmoj, kiuj ŝajnis ardi en mia brusto. La ĉeno ĉirkaŭ mia kolo frotadis ĝissange, sed fronte al tiu alia doloro, mi apenaŭ rimarkis ĝin. Mi sciis, ke la ĉeno dolorigas, sed la ĝeno ŝajnis koncerni alian personon, kiu tute ne rilatis al mi mem.

Pri tio, kio okazis post la falo de nia vilaĝo, jam restis nur nebula memoro. Mi sciis, ke oni metis min en grupon kun la aliaj junulinoj de mia aĝo, kaj ke oni kondukis nin malsupren laŭ la monteto kaj suden direkte al la maro. Sed estis kvazaŭ mi kuŝus funde de rivero, rigardante la disvolviĝon de duonkomprenataj okazaĵoj ĉe la malproksima supraĵo. Konstanta susurado plenigis miajn orelojn, tiel ke eksteraj sonoj nur malfacile atingis min.

Ni dormis sub la nuboj la unuan nokton, interne de speco de vilaĝo kiun la romanoj konstruis por si, ĉirkaŭata de longa ligna palisaro. Ili portis al ni manĝaĵojn kaj akvon, kaj mi gustumis kelkajn buŝoplenojn. Sed kvankam mi ja manĝis neniom la tutan tagon, mi neniel deziris manĝi. Estis kvazaŭ la manĝaĵoj perdis ĉian guston, kaj eĉ maĉi postulis tro grandan penon. Ĉiu mordaĵo restis kiel bulo en mia buŝo, ĝis finfine mi sukcesis streĉi min sufiĉe por engluti ĝin.

Mi vekiĝis la postan matenon por retrovi la doloron en mia brusto kaj la susuradon en miaj oreloj. Mi neniel provis reipensi tion, kio okazis la antaŭan tagon, nek mi demandis min, kiel mi kaj la aliaj junulinoj atingis ĉi tiun lokon. Mi vekiĝis kaj troviĝis tie. Tio sufiĉis.

La vojaĝo daŭris kiel antaŭe. Mi obtuze konsciis, ke la montetoj cedas al vasta malfekunda ebenaĵo, ke estas nova freŝa odoro en la aero, kaj ke en la malproksimo aŭdiĝas la raŭkaj vokoj de mevoj. Mallarĝa blua strio aperis ĉe la horizonto. Mi sciis, kvankam neniu diris tion al mi, ke temas pri la maro. Sed la penso ne tuŝis min.

Kiam la maro proksimiĝis, ni vidis sur ĝi lignajn ŝipojn. Neniam antaŭe mi vidis ŝipon, sed mi rigardis ilin nun tra densa nubo de indiferento. Liberigite de la kateno, ni ne kontraŭstaris, ke oni portu nin plurope en malgranda remboato al unu el la ŝipoj. Tie ni devis grimpi supren laŭ ĝia flanko. Normale mi estus timinta pro la profunda akvo sub miaj piedoj, sed nun mi sciis, ke nenio kio iam ajn okazos, povos kaŭzi al mi pli grandan suferon ol tiu, kiun mi jam spertis. Se mi glitus malsupren en la verdan-grizan akvon, ĝi fermiĝus super mia kapo, kaj la susurado plenigus mian tutan korpon dum la doloro en mia brusto fandiĝus ĝis nenieco. Sed mi ne glitis.

La maro signis la randon de la sudaj reĝlandoj. Ĝi donis limon al niaj teritorioj kaj protektis nin kontraŭ atako. Limojn oni devus pasi kun atento, kaj nur post plenumo de la ĝustaj ceremonioj. Ĉi tiun limon ni estis transirontaj kontraŭvole, sen ebleco fari

la necesajn oferojn. Tio signifis, ke ni neniam povos reveni. Sed ne gravis. Restis nenio, al kio reveni. Nia vilaĝo estis for.

Se ne estus envolvinta min densa nebulo de indiferento, tio estus terura vojaĝo. Ni kuŝis sen ŝirmo, protektate nur de kovrilo el feloj etenditaj sur ligna apogaĝo. Ŝira vento blovegis trans la flankoj de la ŝipo, larmigante niajn okulojn, kaj ĉifante niajn hararojn ĝis ili similis malnovajn distaŭzitajn nestojn. La sola maniero fuĝi el la vento, estis kuŝi surdorse sub la fela kovraĝo. Dum la unuaj tagoj, mi ne sukcesis alkitimiĝi al la balanciĝado de la ŝipo. Mi kuŝis kun fermitaj okuloj, luktante por ne vomi, dum la tabuloj daŭre leviĝis-malleviĝis sub mia dorso. Oni proponis al ni manĝaĵojn, sed mi akceptis nenion.

Tagon post tago mi restis tie, dum la mateno malrapide cedis al posttagmezo kaj posttagmezo al nokto, kaj la maro balance aperadis kaj malaperadis trans la flanko de la ŝipo. Mi kuŝis surdorse, fikse rigardante la felajn striojn super mia kapo, kaj pensis pri nenio. Kelkaj el la aliaj junulinoj jam komencis paroleti inter si kaj ankaŭ plori, sed la plejmulto, kiel mi, nur kuŝis senmove horon post horo kun senesprimaj mienoj. Foje venis du-tri el la soldatoj por taksi nin per avida rigardo, sed post mallonga diskutado inter si, ili lasis nin en paco.

Dum la plej granda parto de ĉiu tago, mi dormis. Nur tion mi volis fari: fermi la okulojn kaj forgliti en neniecon. Sed eĉ songante, mi ne povis forgesi. Ŝajnis al mi, ke denove mi impetegas ĉirkaŭ la bazo de la remparo, freneze serĉante kaŝlokon, dum ĉe mia dorso aŭdiĝas tiuj regulaj paŝoj, senhastaj sed neniam postrestantaj. En vana provo forskui ilin, mi zigzagas inter la kabanoj, kaj tiam, en la preciza momento kiam mi estas cedonta al kompleta malespero, mi subite rimarkas truon, kiun mi neniam antaŭe vidis, ĉe la bazo de la tera remparo. Mi premiĝas internen, apenaŭ ĝustatempe, kaj kuŝas anhelante el krevanta brusto. La paŝoj alproksimiĝas. Kaj tiam, tuj ekster mia kaŝejo, ili haltas. Pro teruro mia tuta korpo fandiĝas en glacian ŝviton. Mano palpas internen. Ĝi serĉas min...

Unu fojon mi songis pri mia patrino kaj Makaros. Mi iris kun ili al la arbaro kaj ni vagis inter la maldensejoj. Mi havis malklaran impreson, ke ankaŭ Elvisa troviĝas tie, kaj ke ni venis por rikolti plantojn. Ni volis reiri al la vilaĝo, ĉar ni sciis, ke tie estas mia patro. Sed ni ne trovis la vojon. Plurfoje ni ekiris laŭ vojeto, kiu ŝajnis ĝusta, sed kiam ni denove rigardis, ĝi estis transformiĝinta al herbo aŭ arbustoj. Makaros ekploris, do mi diris, "Ĉu vi ploras dum ĉeestas mi por prizorgi vin?" kaj levis lin al mia brusto.

Mi vekiĝis kun la sento de Makaros en miaj brakoj. Mi ne tuj malfermis la okulojn, sed kuŝis senmove dum ioma tempo, retenante la sensaĵon de lia eta korpo premita kontraŭ la mia. En la songo, Makaros rigardis min flanke kun difinita esprimo, kiun mi neniam pripensis antaŭe, sed kiu nun revokis lin al mi tiel kvazaŭtuŝeble, ke mi povis preskaŭ imagi, ke li staras antaŭ mi. La doloro en mia brusto estis reveninta same tranĉe kiel dum la unuaj tagoj. La unuan fojon de post mia forrabo, mi povis plori.

Mi ploris kaj dormis, ploris kaj dormis, alterne dum tiu tuta tago. Kelkaj el la aliaj

junulinoj rigardis min kvazaŭ ili komprenas miajn sentojn, sed ili ne ĝenis min per senutilaj konsoloj. Aliaj ankoraŭ kuŝis kun fiksjaj okuloj, obtuze rigardante al la maro aŭ al la fela kovraĵo super niaj kapoj. Antaŭ ol venis la vespero, mi havis fortan kapdoloron pro tioma plorado, kaj la unuan fojon mi atendis senpacience, ke oni alportu la manĝon. Certe, la manĝaĵoj ne allogis: kutime temis pri glua amaso da trokuirita hordeo kun stranga gusto. Per tiu gusto, kiel mi nun konstatis, estis tratrempita ĉio, kion ni ricevis de la romanoj. Sed mi estis tro malsata por esti elektema, kaj kiam la hordeo alvenis, mi manĝis ĝin kun bona apetito.

Kun agrable plena stomako, mi rekuŝis kaj pensis pri miaj familianoj. Mi havis neniun ideon, kiu sorto trafis iun ajn el ili. Mi ja vidis la romanojn peli grupojn de homoj al diversaj partoj de la vilaĝo, sed krom tio mi sciis nenion. Ĉu eble la pli aĝajn virinojn, kiel mian patrinon kaj mian onklinon, ili lasis netuŝitaj? Se mi nur havus ian manieron sciigi mian patrinon, ke mi estas en ordo. Sed ŝi neniam scios, kaj pensante tion, mi denove ekploris.

Mi troviĝis en grupo, kiu konsistis nur el needziniĝintaj junulinoj. Estis en ĝi miaj kuzinoj kaj Kintila, sed de Vinda kaj Alisa ne estis spuro. Multe konsolis min tiu konstato: ĝi certe signifis, ke ili enrampis en la kaŝejon, kiun ili malkovris. Mi demandis min, kiel longe ili devos resti tie, ĝis eblos eliri sen danĝero. Sed kion ili faros, tamen, kiam ili trovos sin tute solaj en tiu neniigita vilaĝo?

Kaj nun, la unuan fojon, mi ekfrontis la demandon pri mia propra estonteco. Mi diris al mi, ke la romanoj evidente ne intencas mortigi nin; alie ili certe ne ĝenus sin manĝigi nin kaj porti nin en ĉi tiu longa vojaĝo. Almenaŭ plaĉis al mi kredi tion, kvankam mi sciis, ke ili ja povus havi la proprajn kialojn por porti nin al Romo: kaj al Romo, laŭ mia supozo, ni nun vojaĝas. Estis ankaŭ tiuj rakontoj de Morimanos: tiuj pri la monstraj bestoj kun longaj nazoj aŭ kun ses kruroj. Ili nutras sin per homa karno. Sed antaŭ ol tiu penso plene formiĝis, mi tuj forpuŝis ĝin. Cetere, estis malfacile konvinki min, ke tiaj malverŝajnaj bestoj vere ekzistas.

Dum la sekvantaj tagoj, mi komencis paroli kun la aliaj junulinoj. Neniu el ni volis reipensi tiun finan buĉegadon, sed estis aferoj, kiujn ni ĉiuj bezonis scii. Kaj do delikate, kun doloro, ni komencis kunfliki la informerojn, kiujn ĉiu el ni povis alporti. Unu junulino estis vidinta Kaljakon, kiu kuŝis en la koto; alia kredis, ke Atepilos falis defendante la eksteran remparon. Alaŭnon iu vidis sur la interna remparo, kiam la romanoj transgrimpis ĝin; verŝajne li estis mortigita dum la posta batalado. Sed la sorto de la plejmulto el la viroj restis neklarigita. Kio okazis al mia patro, mia onklo, Belinos? Ĉu ili ĉiuj plubatalis ĝis la fino, aŭ ĉu kelkaj forĵetis siajn armilojn? Kelkaj el la junulinoj vidis grupon de viroj, kiujn oni kondukis ekster la pordegojn. Sed kio okazis al ili poste? Neniu sciis.

La sorto de la virinoj estis same necerta. Kelkaj el la edzinoj kaj filinoj de la tribestroj partoprenis la batalon de la komenco. Ĉiuj estis mortigitaj. Aliaj, kiel Elvisa, ekkaptis armilojn en la lastaj momentoj kaj mortis apud la viroj. La restintajn virinojn oni arigis en grupojn. Unu junulino vidis miajn patrinon kaj onklinon forkondukataj de soldato.

Preter tio, ni ne havis informojn. Kiam temis pri la infanoj, la pli junaj knabinoj diris al ni, ke ĉiuj reiris al la kabanoj, kiam la batalo komenciĝis. La romanoj poste forkondukis la pli grandajn knabinojn por aldoni ilin al nia grupo, sed neniu sciis, kion ili faris pri la ceteraj.

Kintila rakontis al ni, ke ŝi kaŝis sin en unu el la kabanoj, kiam enkuris du junaj virinoj en stato de teruro, sekvate de kvin-ses romanoj. Kintila kaŝis tremante sub bovofelo. Unue ŝi aŭdis kriojn, kiuj ŝanĝiĝis al hororaj gruntoj kaj ĝemoj. Kiam ŝi kuraĝis ŝtelrigardi la scenon, la soldatoj estis for kaj la du virinoj kuŝis mortaj. Ŝi ne konis iliajn nomojn; ili ne estis de ŝia vilaĝo. Ni konstatis, ke almenaŭ pri unu afero ni estis bonŝancaj. Laŭ nia scio, neniu alia virino estis perfortita.

Alkutimiĝinte al la restado sur la ŝipo, ni komencis iomete esplori kaj ŝtelrigardi tra pordoj kiam neniu ĉeestis. Foje ni rimarkis virojn, kiuj rigardis nin kun intereso, kaj ni haste retiriĝis al la sekureco de nia grupo. Ni ne deziris logi ilian atenton.

Kvankam jam estis plena aŭtuno, la vetero malrapide iĝis pli varma. Kelkaj tagoj estis eĉ agrable varmaj, kvankam la noktoj estis longaj kaj malfacile elteneblaj sen vera ŝirmo. La maro, kiu estis griza je la komenco de nia vojaĝo, estis nun blua kaj serena.

Unu el la plej strangaj aspektoj de la restado sur la ŝipo estis la fakto, ke la unuan fojon en mia vivo mi havis absolute nenion por fari. Ĝis tiu plej lasta mateno, ne estis momento en la tago kiam mi ne estis okupata, ĉu por ĉerpi akvon, por melki la bovinojn, ĉu por sarki la hordeon, serĉi kuirherbojn aŭ plantojn, mueli grenon, tranĉi legomojn, kolekti brullignon, ŝpini - kaj nun, subite, mi havis nenion por fari krom sidi kun krucitaj manoj, rigardante la maron. Sento de timo pendis super mi la tutan tempon, sed kondiĉe ke mi ne tro detale esploris ĝin, mi povis permesi al mi imagi, ke nenio plu ŝanĝiĝos, ke ni restos ĉiam ĉi tie, lulate de la balanciĝado de la ŝipo kaj de la milda aŭtuna vetero.

Mia ĉefa konsolo dum tiu stranga periodo estis la kunestado de la aliaj junulinoj. Surprizis min malkovri, ke mi apenaŭ konis la plejmulton el ili, eĉ tiujn, kiuj estis miaj amikinoj ekde la infaneco. Kelkaj el ili malkaŝis neimagitan talenton, kiam necesis konsoli aliajn aŭ gajigi ilin en la plej malfacilaj momentoj. Ĝenerale, tamen, ni parolis tre malmulte. La pasinteco kaj la estonteco estis temoj, kiujn neniu volis aludi pli ol necese, kaj forprenite de niaj normalaj okupoj, ni havis nenion plu por preparoli. Tio, kio kunigis nin, estis la scio, ke ni ĉiuj partoprenis la saman aflikton, ke ni ĉiuj trapasis la saman abismon de suferado kaj senespero. Kiam temis pri la venonta tempo, ni povis fari nenion por protekti nin kontraŭ ĝi. Sed ĉirkaŭate de la aliaj, ni almenaŭ ne devis fronti ĝin solaj.

Malrapide, unuope, ni ĉiuj elgrimpis el la glacia ekstremo de ŝoko kaj dolorego, en kiu oni portis nin al la ŝipo. Kelkaj el miaj amikinoj estis pli afliktitaj ol aliaj. Kanda, ekzemple, estis aparte forte trafita. Iu, kiu ne konus ŝin, estus povinta imagi, ke ŝi renormaliĝis; ŝi ja rekomencis manĝi kaj respondi demandojn. Sed mi ricevis la impreson, ke ŝi faras tiujn aferojn pro kutimo, ĉar ŝi scias, ke necesas fari ilin. Ŝajnis,

kvazaŭ ŝi restas komplete sen emocioj. Mi neniam vidis ŝin plori.

Unu junulino tute ne sukcesis restariĝi. Dum ni ceteraj malrapide reviviĝis, ŝi ankoraŭ kuŝis surdorse gapante supren kun vaka esprimo. Se ŝi ne palpebrumus de tempo al tempo aŭ farus etan movon, mi estus povinta supozi ŝin morta. Ŝiaj amikinoj el la sama vilaĝo sidis ĉe ŝia flanko; ili karesis ŝian vizaĝon kaj strebis reporti ŝin al konscio pri tio, kio okazas en la ĉirkaŭaĵo. Unu-du fojojn ili persvadis ŝin eksidi kaj gluti kelkajn buŝoplenojn da akvo, antaŭ ol ŝi refalis al inerteco. Mi ne miris, kiam oni informis min je mia vekiĝo iun matenon, ke ŝi mortis dum la nokto. Ŝi aspektis precize kiel antaŭe, kun la okuloj fikse malfermitaj. Ni ne povis decidi, kion fari pri ŝi. Ni ne volis peti helpon de la romanoj, sed apenaŭ eblus resti dum tagoj kun kadavro inter ni. La romanoj rimarkis nenion ĝis la vespero. Sen eĉ minimuma intereso, ili ekprenis la rigidiĝintan korpon kaj ĵetis ĝin en la maron.

Mi ekamikiĝis kun junulino kiu nomiĝis Albila. Ŝi devenis de la vilaĝo, kie loĝis la fratino de mia patrino. Nia amikeco baziĝis ĉefe sur sento de simpatio, ĉar ni apenaŭ interparolis. La malmultaj pensoj en mia kapo estis tro doloraj, por ke mi dividu ilin kun alia homo, kaj mi faris mian eblon por subpremi ilin entute. Sed konsolis min scii, ke ŝi sidas apude.

Kelkfoje alia ŝipo pasis, kaj ni rigardis en fascino. La rivero sub nia vilaĝo estis malprofunda, kaj neniu el ni vidis ŝipon, antaŭ ol oni portis nin al la maro. Mi ja ĉiam esperis iam vidi ŝipon, neniam imaginte ke mi realigos tiun deziron nur kiel kaptito.

Dum la tagoj pasis kaj la ĉielo iĝis pli blua, la ŝipoj plioftiĝis. En difinita suna mateno ni vidis plurajn, unu post alia. La soldatoj kaj maristoj videble senpacientiĝis. Ili daŭre iris al la flanko por rigardadi la marbordon, ŝirmante siajn okulojn per la mano. La marbordo ja estis videbla jam dum la plej granda parto de la vojaĝo, kiel apenaŭ rimarkebla blanka strio ĉe nia maldekstra flanko, sed mi konstatis nun, ke la ŝipo malrapide alproksimiĝas al ĝi. Kvankam neniu komentis pri tio, ni estis maltrankvilaj, kaj ĉiufoje kiam aperis nova ŝipo, ĉiuj eksilentis. Finfine aŭdiĝis krio de unu el la maristoj kaj la tuta soldataro venis sur la ferdekon por amasiĝi ĉe la flanko, babilante kaj ridante pro entuziasmo. Intertempe, ni retiriĝis sub nian felan kovraĵon, laŭeble retenante nin de la ĝenerala ekscito.

Iom post iom la soldatoj enuis pri la rigardado, kaj reiris internen aŭ restis en grupetoj supre. Estis maleble preteratenti la fakton, ke oni pretiĝas por la albordiĝo. Ĉiuj maristoj diligente okupiĝis pri ŝnuroj aŭ pri la velo, kaj intertempe la soldatoj amasigis siajn posedaĵojn apud la flanko de la ŝipo. Nun, eĉ kontraŭvole, ni vidis la marbordon en la malproksimo. Nia unua impresio estis de brunaj kaj verdaj montetoj kelkloke dissemataj de grandaj blankaj ŝtonoj.

Ĝis la posttagmezo, ni ĉiam pli alproksimiĝis al la bordo. La maro ĉirkaŭ ni estis plena je boatoj kaj ŝipoj, kiuj lule balanciĝis sur la ondoj. Mi ne estus imaginta, ke povus ekzisti tiom da ili en unu sola loko. Sur la apuda bordo ni vidis gigantajn konstruaĵojn, kun aĵoj kiuj aspektis kiel vicoj kaj vicoj da pordoj - sed mi ne povis kompreni, kial la

pordoj estas lokitaj tiel alte super la tero. Estis facile komprenebla eraro: ja mi neniam antaŭe vidis fenestrojn.

Finfine la ŝipo puŝiĝis kontraŭ longa ligna kajo, kiu etendiĝis en la maro. Aŭdiĝis plurvoĉa kriegado de la maristoj, dum la soldatoj, portante nekredeble grandajn dorsoŝarĝojn, formis linion kaj komencis laŭvice transiri la flankon de la ŝipo. La maristoj komencis malŝarĝi kestojn kaj vazojn. Restis nur ni, forgesite.

Finfine venis al ni viro. Estis li kiu portis al ni la manĝaĵojn, kaj kiu ĝenerale ŝajnis respondeci pri ni. Li kriis al ni en sia sensignifa lingvaĉo, kaj indikis per gestoj, ke venis la momento por surbordiĝi. Malvolonte ni sekvis lin trans la ŝipoflankon, kaj grimpis malsupren al la ligna kajo.

Estis strange en la komenco marŝi denove, post tiom da tempo dum kiu ni limiĝis al tiel mallarĝa spaco. Krome, ni malkovris, ke ni alkutimiĝis al la balanciĝado de la ŝipo kaj ni ne povis tuj readaptiĝi al firma subpiedaĵo. La viro ne rekatenis nin. Ni ne povis fuĝi laŭ tiu malplena kajo, kie la ondoj plaŭdetis ambaŭflanke; kaj cetere, kien ni irus? Ni estis absolute perditaj, kaj la sola afero, kiun ni rekonis, estis ni mem.

Vidate de proksime, la konstruaĵoj estis imponegaj. Ili estis faritaj el vicoj de ŝtonoj, aranĝitaj laŭ eksterordinara reguleco. Ili estis tiel altegaj, ke ili ŝajnis domoj por gigantoj, ne por homoj. Estis vere, ke la pordoj ne estis tre altaj, tamen kial ili estis tiel multenombraj? Interne, anstataŭ la vastega halo, kiun mi atendis, ni trovis surprize malgrandan spacon, ne pli grandan ol mia antaŭa loĝejo. Mi ne komprenis, kio okazis: kial la konstruaĵo estas tiel grandioza ekstere, dum interne ĝi havas normalajn dimensiojn? Ĝi pensigis min pri rakonto de Morimanos, pri militisto kiu perdiĝis dum ĉasado. En la profunda arbaro li venis al mizera kabanaĉo, sed kiam li eniris li trovis sin en vastega halo, inda je reĝo. Al ni estis okazinta la malo. Sed ĉio estis tiel stranga kaj nova, ke mi ne plu pripensis la aferon.

Oni lasis nin solaj en la ĉambro, ĉirkaŭataj de grandaj vazoj el ŝtono. La pordon oni fermis. Ni ne kuraĝis eĉ proveti malfermi ĝin. Estis kvadrata truo alte en la muro, blokita de lignaj klapoj, kiuj enlasis nur la malmultan lumon kiu sukcesis enfiltriĝi inter la latoj. Ni sidis sur la grundo, ne parolante, dum la ĉambro iom post iom malheliĝis. La grundo estis komplete tegita de plataj ŝtonoj, kiuj estis ne nur tre malmolaj sed ankaŭ malvarmaj. Mi memoris, kiam Morimanos rakontis al ni, ke en Romo oni ne vidas la teron ĉar ĝi estas tute kovrita de ŝtono.

Poste la pordo malfermiĝis, kaj revenis la viro kun pano, akvokruĉo kaj poto. Rekte antaŭ niaj okuloj li elmontris la celon de la poto, kaj tiam reeliris. Tio estis la sola signo, ke li konsideris nin entute malsamaj ol la vazoj, kun kiuj ni dividis la ĉambron.

Tio estis la plej longa nokto de mia vivo. Ĝi estis multe pli malbona ol la unuaj noktoj, kiujn mi travivis en la komenco de mia kaptiteco. Tiam mi estis indiferenta al ĉio. Estis kvazaŭ min izolis dika mantelo, kiu ŝirmis min ne nur de fizikaj malagrablaj sed ankaŭ de timo pri la estonteco. Sendube la aliaj junulinoj havis similan sperton. Sed

nun tiu protekto estis perdinta sian efikecon, kaj la situacio trafis nin per sia plena forto. La ĉambro baldaŭ iĝis ekstreme malvarma, sed ne estis loko por kuŝi, krom sur la ŝtona pavimo. Ni sternis kelkajn el niaj ŝaloj sur la grundo por iomete moligi la ŝtonan tegaĵon, kaj kovris nin per la aliaj. Sed estis maleble dormi, krom fragmente, antaŭ ol revekis nin la malvarmo kaj malkomforto.

En la mateno nia gardisto revenis kun juna viro, homo stultaspekta kun pufa vizaĝo kaj densa nigra hararo aranĝita kiel vico de bele ordigitaj bukloj sur lia frunto. Ignorante nian distaŭzitan staton, ili tiris nin eksteren en la lumon, kaj komencis disputi pri ni. En iu momento ni ĉiuj teruriĝis, kiam nia gardisto tiregis Markosenan el la grupo kaj komencis elmontri ŝiajn ŝultrojn kaj krurojn, precize kvazaŭ temus pri juna bovido. La alia homo flankenpuŝis ŝin malestime kaj kaptis Sulabarkan per la brako. Ŝajnis, kvazaŭ li esprimas pri ŝi malaltan opinion. Efektive ŝi estis malsanaspekta malgrasulino, tamen ŝi vere estis tute en ordo. Finfine la viroj reenŝlosis nin. Ni staris senhelpe ĉirkaŭe en la malvasta spaco, kaj ĉiu evitis la okulojn de la aliaj. Mia stomako kirliĝegis pro antaŭtimo.

Baldaŭ la pordo remalfermiĝis kaj jen denove la du viroj. Ĉi-foje estis tiu kun la pufa vizaĝo, kiu vokis nin per gesto eksteren. Ni ŝafece atendis dum ili remetis la ĉenon ĉirkaŭ niajn kolojn, kaj ni ne kontraŭstaris, kiam la junulo forkondukis nin. Li gvidis nin al mallarĝa vojeto inter altegaj muroj, kiuj leviĝis kiel turoj super niaj kapoj kaj per sia minaca rigardo blokis de niaj okuloj la ĉielon. Kien ajn mi turnis mian vizaĝon, mi vidis nenion krom vasta regiono da senviva ŝtono. Tute ne troviĝis verdaj kreskaĵoj. Estis kvazaŭ ni vagus en terura premsonĝo.

Tro pezis sur mi la horora ĉirkaŭaĵo por ke mi detale rigardu, sed mi ricevis konfuzan impreson pri vico de ombraj kavernoj flanke de la vojeto. Dum mi preterpasis ilin, preskaŭ falante, el la angulo de mia okulo mi malklare videtis misterajn, nereconeblajn aĵojn vualitajn de mallumo. Subite du viroj aperis apud mi sur la vojo, kaj komencis malvolvi specon de rulaĵo, kiun unu el ili tenis en siaj brakoj. Ili malvolvis kaj malvolvis kaj malvolvis, dum senfina trembrila strio de ŝtofo pufiĝis kiel ondo, arda kaj ruĝa kiel sango. Mirigite, mi haltis por rigardi, kaj la kateno tuj streĉiĝis ĉirkaŭ mia kolo.

Ni rondiris angulon kaj senaverte trovis nin en la mezo de krieganta, svarmanta homamaso. La afero estis tiel neatendita, ke mi ne tuj rimarkis, ke temas pri la momento kiun mi antaŭtimis dum la tuta vojaĝo. El ĉiuj teruraj hontaĵoj, kiuj povus okazi en Romo, mi ĉiam aŭdis, ke la plej malbona estas tio, ke oni estos kondukata tra la stratoj en katenoj por distri la popolon. Sed kun sento de intensa senpeziĝo, mi vidis nun ke la afero estos multe malpli humiliga ol mi atendis. La homoj ne povus atenti nin malpli. Estis kvazaŭ ni estus vico de bovinoj, kiujn oni kondukas al la paŝtejo.

Intertempe ni puŝiĝis antaŭen kvazaŭ tra solida barilo, dum oni premis kaj ŝovis de ĉiuj flankoj. Ĉie estis bruego de voĉoj. Ie mi aŭdis marteladon. Homoj konstante kriegis malantaŭ niaj dorsoj, kun puŝcaretoj aŭ kun grandegaj ŝarĝoj surŝultre, tiel ke

ni devis premiĝi al unu flanko por ke ili preterpasu. En la mezo de tiu moviĝanta amaso, aliaj homoj okupiĝis tute serene pri siaj ĉiutagaj aferoj: ili babilis, trinkis, raziĝis, fritis kolbasojn, dishakis viandon, pesis manĝaĵojn, trankvile kvazaŭ ili sidus solaj kaj silentaj sur la planko de siaj kabanoj. Troviĝis eĉ grupo de infanoj, sidantaj en vicoj, kiuj unuvoĉe ripetis ion kune.

Super niaj kapoj estis kadukaj, ŝanceliĝantaj konstruaĵoj el ŝtono kaj ligno, kiuj aspektis kvazaŭ ili tuj disfalos. Iliaj flankoj estis plenaj je okuloj kaj vizaĝoj: kelkaj esploris nin de alte, dum aliaj suprenrigardis de sub niaj piedoj. Kiel mi ĉiam aŭdis, la domoj estis konstruitaj unu super la alia, kaj la homoj staris meze en la aero, kie nur malsolida barilo malhelpis ilin falegi rekte al la grundo.

Laŭ la tuta flanko de la vojo estis arkaĵoj, kaj sub ĉiu arko vidiĝis la plej miriga abundeco. Estis grandegaj sakoj plenaj je faboj, je greno, je jam muelita faruno, je nuksoj, kaj je tiom da aliaj aĵoj, kiujn mi tute ne rekonis. Unu fojon mi flaris ĵus bakitan panon, kaj rigardis malsupren laŭ kelkaj ŝtupoj en fajroplenon subgrundan kavernon, kie duonnuda viro, brila pro ŝvito, prenis panojn el forno. La ruĝa ardo de la flamoj respeguliĝis sur lia glimanta korpo, kaj li havis plurajn aĉajn vipostriojn sur la dorso. La forno ŝajnis sufiĉe granda por manĝigi tutan vilaĝon en unu fojo, kaj la panoj estis torditaj en fantaziajn spiralojn kaj ŝvelaĵojn.

Post tio sekvis tuta vico da ĉaregoj, plenegaj je la plej nekredeble variaj fruktoj kaj legomoj. Inter tiuj, kiuj estis por mi komplete novaj, mi rekonis kelkajn el mia hejmloko: pomojn, ekzemple, sed ĉi tiuj pomoj estis pli grandaj kaj poluritaj ol mi iam ajn vidis, krom en sonĝoj. Se ne temus pri la abomena malpureco de la ĉirkaŭaĵo, mi estus povinta imagi, ke mi pasis tra unu el la transirejoj kie la Alia Mondo tuŝas la nian. Sed tiuj magiaj pomoj estis staplitaj antaŭ ŝmirita muro, kie akvo malrapide glitis malsupren tra verda ŝlimo. Akvo stagnis en truoj ĉe la flanko de la vojo, kaj en unu angulo kuŝis amaso da forĵetaĵoj. Kiam ni preterpasis, trafis minodoro de urino.

Ni marŝis tra unu strato post alia, dum ĉe ĉiu angulo atencis nin la plej strangaj vidaĵoj kaj krioj kaj odoraĉoj; samtempe la homamaso ŝovis nin jen al unu flanko, jen al alia. Unu el miaj ĉefaj impresoj estis tio, ke ĉiuj ĉirkaŭ ni havas frenezan haston kaj ke ni estas devigataj hasti kun ili. En ĉiu dua momento la pufvizaĝa viro turnis sin por kriaĉi kontraŭ ni aŭ por tiregi iun antaŭen per la brako. La ĉeno ĉirkaŭ mia kolo konstante malstreĉiĝis kaj restreĉiĝis, kiam la aliaj junulinoj treniĝis antaŭen aŭ malantaŭen pro la homamaso. Mi estis devigata vadi senhelpe tra malpuraĵoj kaj akvokavoj, kaj la rando de mia robo makuliĝis de disŝprucinta koto. Plurfoje mi preskaŭ falis super ĉifitaj estaĵoj, kiuj kuŝis surtere prezentante la plej naŭzajn vundojn. Al unu mankis kruro, al alia restis nur stumpoj kiel brakoj. Virino ekkaptis mian robon kaj levis al mi bebon, kies vizaĝon preskaŭ komplete kaŝis inflaminta ulcero. Mi rigardis ĝin kun hororo, ĝis tiris min antaŭen subita streĉo de la ĉeno.

Dum mi premiĝis inter grupoj de homoj, jen kaj jen bloviĝis al mi nekutimaodoro. Pasis iom da tempo antaŭ ol mi konstatis, ke ĝi apartenas al la ĉirkaŭaj homoj. Kelkaj havis oleecan, preskaŭ naŭzan odoron. Aliaj estis strange dolĉaj, kiel floroj. Ĉio ĉi

plifortigis mian senton, ke la romanoj estas ne tute homaj. La plejmulto estis tre brunaj; ili aspektis kvazaŭ ili pasigis la tutan someron ekstere en la kampoj. Dise inter tiuj mi vidis aliajn kun eĉ pli malhela haŭto, preskaŭ ledokolora. Unu fojon Albila, kiu sekvis tuj malantaŭ mi en la linio, skuetis mian kubuton. Mi turnis min kaj kriis pro mirego, vidante du virojn, kiuj estis vere komplete nigraj, tiel ke iliaj okuloj kaj dentoj ŝajnis brili per nenormala blankeco. Kompreneble, mi jam aŭdis, ke ekzistas tiaj homoj, sed mi neniam tute kredis tion ĝis tiu momento.

Ni marŝis longegan distancon tra la homoplenaj stratoj. Unu eksterordinara nova vidaĵo sekvis alian, ĝis mi havis la senton, ke de ĉiuj flankoj disbatas min voĉoj, vizaĝoj, objektoj, kaj mi sopiris nur je paco kaj silento. En la fino mi ĉesis rigardi la aĵojn ĉirkaŭ mi, kaj lasis min drivi antaŭen duonsvenante, tra galimatio de kirliĝantaj bruoj kaj koloroj.

Finfine ni atingis kvartalon, kiu ŝajnis iom pli trankvila. Virinoj staris babilante sub la arkaĵoj, kaj ni vidis grupon de junulinoj de proksimume nia aĝo, kiuj atendis sian vicon ĉe fontano. Ili tute ne atentis pri ni. La viro ekmarŝis pli rapide, kaj ni stumpletis pro la peno ne postresti. Li iris rekte al pordo, kiu aspektis identa al la du apudaj, kaj kondukis nin internen.

Ni trovis nin en mallonga koridoro, kiu malfermiĝis en pli grandan ĉambron. La viro malaperis kaj revenis kun mezaĝa virino de peza staturo. Ŝi alproksimiĝis kaj komencis inspekti nin, en precize la sama maniero laŭ kiu mia patrino ekzamenus ĵus akiritan bovinon. Ŝi detale esploris la manojn de unu junulino kaj palpis la brakojn de alia, dum ŝi intertempe komentis super sia ŝultro al la juna viro. Ŝi eĉ volis levi la jupon de unu junulino - temis pri Etiona - por vidi, kio troviĝas sube. Kompreneble, Etiona tuj repuŝis sian jupon, je kio la virino eligis gruntan ridon, sed bonŝance ne insistis.

Ŝi ne ŝajnis malkontenta pri sia esploro, kaj kondukis nin al malpli granda ĉambro, kie ŝi lasis nin solaj. Estis la unua momento de komplete silento, kiun ni spertis dum la tuta tago. Mi estis elĉerpita kun turniĝanta kapo, kaj en la subita malbruo, mi ekkonsciis pri siblado en miaj oreloj. Estis speco de ŝtona breto laŭ unu muro, sed ĝi estis tro malgranda por ĉiuj, do ĉar ni estis ankoraŭ kunkatenitaj, ni devis sidi sur la planko. Kliniĝante unu kontraŭ la ŝultro de alia, ni tuj endormiĝis.

La ĉambro estis preskaŭ senluma kiam ni vekiĝis, krom kelkaj malfortaj radioj kiuj sukcesis enrampi preter la randon de la lignaj fenestroklapoj. Mi supozis, ke ekstere verŝajne estas malfrua posttagmezo. Estis vekinta nin la knaro de la pordo, kaj nun la dika virino vidiĝis ĉe la sojlo. Ŝi abrupte tiris la ĉenon, tiel ke unu-du el la junulinoj ekstreĉiĝis pro doloro, kaj indikis, ke ni sekvu ŝin al la pli granda ĉambro apud la enirejo. Tie, finfine, ŝi malkroĉis la ĉenon kaj iom sulkante la frunton, komencis ekzameni la spurojn, kiujn ĝi lasis sur niaj koloj. Du-tri junulinoj havis sufiĉe aĉajn cikatrojn, do ŝi alportis etan vazon da unĝvento per kiu ŝmiri ilin. Almenaŭ tio estis esperiga. Sed ŝajnis, ke ŝi ne intencas proponi al ni manĝaĵojn. Ni laste manĝis je la antaŭa vespero, kaj mi sentis svenemon pro malsato.

Anstataŭ doni al ni ion por manĝi, ŝi rekondukis nin eksteren en la straton. Ni vagis obee malantaŭ ŝi, sekvate de la pufvizaĝa junulo. La stratoj estis nun pli trankvilaj, kaj kelkaj infanoj partoprenis saltoludon sur la vojo, kvazaŭ ili tute ne rimarkis la ĉirkaŭan malbelegecon. Kiam ili vidis nin, ili alkuris kriante por premiĝi ĉirkaŭ ni, sed la virino frapis plurajn el ili ĉe la kapo kaj forpelis ilin.

Krepuskiĝis, kaj malantaŭ la vicoj de malfermitaj pordoj, ni vidis homojn kiuj pretigis manĝaĵojn kaj manĝis. Mi ne povis kompreni, kie ili tenas siajn kuirfajrojn; en tiuj malplenaj ĉambroj vidiĝis neniuj spuroj de fajrejoj aŭ de flamoj. Malgraŭ tio, neniel mankis fumo kaj malplaĉa haladzo, kaj la odoro de kuirado bloviĝis malsupren al ni de ĉiuj flankoj. Pro mia malsatega stato, ĝi kaŭzis al mi senton de naŭzo, precipe pro difinita fiŝeca nuanco, kiun mi trovis aparte vomiga. Ni aŭdis fragmentojn de parolado kaj de ridado dum ni preterpasis, kaj jen kaj jen glimetis la brilo de lampo. Tiom da miloj kaj miloj da homoj en siaj et-etaj ĉeloj; estis kvazaŭ ni troviĝus en grandega abelujo.

Ni marŝis kaj plumarŝadis sub la krepuskiĝanta ĉielo, kvazaŭ tra malbela sonĝo. Miaj piedoj sangis pro pistado sur la firme tretita tero, kaj mi deziregis sidiĝi por ripozi. Ĝuste en tiu momento mi aŭdis rekonajn kriojn de la aliaj junulinoj. Mi ĉirkaŭrigardis, kaj mia koro saltegis. Ne malproksime de ni staris tri-kvar viroj en multekoloraj vestoj kun desegno de kvadratoj, kiuj havis longajn lipharojn kaj krispigitajn hararojn. Dum momenteto mi kredis, ke ili venis por savi nin. Tiam mi konstatis, ke kvankam al ni ĉi tiu loko ŝajnas profunde fremda, al ili ĝi jam estas hejmo. Dum niaj vestoj estis makulitaj kaj ĉifitaj, iliaj aspektis freŝaj kvazaŭ oni ĵus demetis ilin de la teksokadro. Ili estis senstreĉaj, kiel homoj kiuj pasigis ĉi tie la tutan vivon; ili staris antaŭ ŝtona barilo kaj akceptis manĝaĵojn de virino ĉe la alia flanko. Ŝajnis, ke ili ŝercas kun ŝi. Unu el ili rimarkis nin, kaj tuj puŝetis la aliajn per la kubuto por rigardigi ilin. Ili staris kaj silente observis nin dum ni preterpasis, sed ili faris neniun movon por helpi nin. Ili ne apartenis al nia popolo. Pro ilia vestomaniero, mi pensis, ke ili eble venas de unu el la orientaj reĝlandoj.

Ni sekvis la pezan virinon al grandega konstruaĵo, kie ŝi kondukis nin al flanka pordo. Tie ŝi frapis kaj vokis ĝis finfine, kun laŭta grincado de feraj stangoj, iu malfermis la pordon. Maljuna virino staris en la enirejo kun fumanta lampo en la mano. Ŝi estis videble malkontenta, ke oni ĝenas ŝin je tiel malfrua horo. Post iom da grumblado ŝi enlasis nin kaj kondukis nin tra serio de ĉambroj, kiuj malfermiĝis unu en la alian laŭ maniero, kiu ŝajnis preskaŭ magia. Ni ankoraŭ ne estis plene ensorbintaj la fakton, ke tiuj konstruaĵegoj estas dividitaj interne en malpli grandaj spacoj.

Finfine ni alvenis en ĉambron kun vico de niĉoj en la muro, kaj la du virinoj indikis, ke ni senvestiĝu. Ni tuj iĝis ege singardaj. Ĉu temas pri la komenco de tio, kio ajn ĝi estas, kion ili volas fari al ni? La maljunulino kriis malpacience kaj ektiris la vestojn de la plej proksima junulino, kvazaŭ ŝi volus mem senvestigi nin. Sed la alia virino kvietigis ŝin per tuŝo ĉe la brako. Ŝi turnis sin al ni, kaj gestis kvazaŭ ŝi sin lavas. Vidante la junulon, kiu ankoraŭ staris apude, ŝi sendis lin eksteren. Kaj do, senhelpe kaj tre singarde, ni komencis senvestiĝi.

Ili kondukis nin, komplete nudajn, en grandan malluman kavernon. La lumeto de la lampo tute perdiĝis en tiel vasta spaco, sed mi ricevis impreson pri ombra plafono alte super niaj kapoj, dum senfina planko etendiĝis en la malproksimon. La grundo estis kovrita de misteraj desegnaĵoj, sed mia koro batadis tro forte por ke mi multe atentu pri ili.

Ni marŝis ĝis la fundo de la kaverno, kaj tie, je mia miro, estis laĝeto. Kelkaj ŝtupoj kondukis malsupren en la akvon, kaj la virinoj indikis, ke ni eniru por lavi nin. Tion ni volonte farus en normalaj cirkonstancoj, sed konsiderante la situacion, ni ĉiuj hezitis, dum la maljunulino blekis senpacience kaj la alia provis instigi nin per furioza gestado. En la fino, Markosena estis tiu, kiu trovis sufiĉan kuraĝon por paŝi, iom heziteme, malsupren en la akvon, kaj ni ceteraj sekvis, kiel aro da timigitaj ŝafoj. La akvo montriĝis ne tro profunda kaj eĉ varmeta. Mi atendis, ke ĝi estos malvarma. La virinoj eĉ donis al ni specon de pasto per kiu lavi nin kaj indikis, ke ni lavu ankaŭ niajn harojn.

La tukoj kiujn ili donis al ni por sekigi nin, estis malvarmaj kaj malseketaj, kvazaŭ ilin jam uzis aliaj homoj. Sed ni sekigis nin laŭeble, kaj atendis nian vicon por kombi niajn taŭzitaĵojn. La virinoj portis al ni kombilojn, sed estis nur du por la tuta grupo.

Nun ĉiuj fartis multe pli bone kaj ni eĉ ekhavis esperojn, ke eble la situacio ne estas tiel nigra kiel ni antaŭtimis. Sed tiam okazis io tre maltrankviliga. La du virinoj aliris la plej proksiman junulinon, kaj sen iu ajn averto la pli peza subite ekkaptis ŝin firme ĉirkaŭ la brusto, dum la alia per metala ilo forhakis ŝian hararon. Manava estis tiu, kiun ili kaptis, kaj ŝi luktis kaj rezistis, sed ŝiaj brakoj estis premitaj al ŝiaj flankoj. Ni ceteraj rigardis senhelpe. Ni estus povintaj sufiĉe facile superi la du virinojn, sed eĉ ne venis al ni la ideo provi.

Liberiginte Manavan, la virinoj pluiris al la apuda junulino, precize kvazaŭ ili orde pritraktus aron da ŝafoj. Ni sciis, ke kiam ili posedos niajn harojn, ni estos komplete sub ilia rego, sed ni povis fari nenion por tion malhelpi. Cetere, ni jam estis komplete sub ilia rego.

Ni reiris tra la malheliĝintaj stratoj, lumigataj nur de hazardaj lampoj, kiuj brilis el kelkaj malfermitaj pordoj. La plejmulto el la domoj estis ŝlositaj por la nokto, sed la stratoj estis same bruaj kiel antaŭe. Ĉaregoj senĉese preterruliĝis, devigante nin premiĝi kontraŭ la muroj de la domoj. Mi tremis pro malvarmo, kaj mia kolo ŝajnis nuda kaj senprotekta. Mi ne povis alkutimiĝi al miaj fortonditaj haroj.

Reveninte, ni finfine ricevis manĝaĵojn. Ni manĝis avidege; sed finmanĝinte, ni ankoraŭ malsatis. Pli malfrue en tiu sama nokto mi revomis ĉion.

Denove necesis kuŝi sur la ŝtona pavimo, sed ĉi-foje la virino provizis kelkajn mantelojn el dika lano, por iomete protekti nin de la malmola planko. Ni kuŝis dum iom da tempo en la mallumo kaj parolis pri la multaj spertoj de la tago. Post la bano kaj la manĝo, niaj esperoj sufiĉe reviviĝis, malgraŭ la afero pri niaj haroj. "Aŭskultu kion mi

volas diri,” Albila komentis. “Ĉi tiuj romanoj naskas nur unu fojon jare, kiel hundoj, ĉar ni marŝis dum duona tago tra tiu loko, kun la ŝtonoj kiuj kontuzis niajn piedojn, kaj eĉ ne unu gravedan virinon mi vidis.”

Mi konsideris ŝiajn vortojn. Mi ne rimarkis tion antaŭe, sed efektive ŝi pravis: inter tiuj miloj da homoj mi vidis nur unu gravedan virinon. En tiu momento mi ne komprenis mian subitan senton de rekono kaj de malstreĉiĝo, sed antaŭ ol mi povis pripensi la aferon, iu nova vidindaĵo forpuŝis ĝin el mia menso.

“Ili forrabas siajn infanojn de aliaj popoloj, eble,” diris Kintila. “Kiel eblus al iu ajn virino naski en senĝoja, senkomforta loko, kiel tiu?”

Mi vekiĝis la postan matenon kun malplena stomako kaj dolorantaj ostoj. Mia pli esperplena humoro de la antaŭa nokto jam forvaporigis, kaj mi antaŭsentis, ke hodiaŭ okazos io malbona. Pro la multegaj novaj spertoj dum la antaŭa tago mankis al mi tempo por maltrankviliĝi pri la estonteco. Sed estis klare, ke la peza virino kaj la junulo nepre havas ian planon por ni. Ne estis eble, ke ili intencas pluteni nin ĉiujn en ĉi tiu loko. Certe hodiaŭ ni malkovros nian sorton.

Post nelonge, kombite kaj manĝinte, sed en katenoj, ni eliris la trian fojon en la homoplenajn stratojn. Mi nun iom alkutimiĝis al la situacio, kaj mi povis ĉirkaŭrigardi pli trankvile. Nin kondukis la junulo, kaj kiel kutime li havis haston. Ĉiufoje kiam mi emis malrapidiĝi, mi sentis tireton ĉe la ĉeno. Post iom da tempo la homamaso komencis maldensiĝi. Ĉi tie la stratoj estis pli larĝaj kaj anstataŭ arkaĵoj estis vicoj de blankaj kolonoj. Nun ni marŝis pli malrapide, kaj ĉio kion ni vidis ŝajnis pli digna kaj pli impona. La statuoj donis al mi malagrablan senton. Ili estis tiom vivecaj, ke mi demandis min, ĉu ne temas pri veraj homoj enŝeligitaj en pentrita ŝtono.

Finfine ni alvenis ĉe vastega placo, kie la tero estis kovrita sub tavolo de plataj, blankaj ŝtonegoj. En unu-du lokoj vidiĝis herbotufoj, kiuj elstaris inter la pavimeroj. Tio iomete esperigis min: ĝi montris, ke kelkaj verdaĵoj tamen sukcesas travivi en Romo, kvankam mi ne povis imagi, kial ili elektis kreski ĉi tie, en la mezo de ĉi tiu ŝtona ebenaĵo. Ili estis same fremdaj al la loko kiel mi mem.

Ĉe la alia fino de la placo estis kolektiĝinta sufiĉe granda homamaso. Ĉiuj rigardis al alta podio, sur kiu staris pluraj homoj. Jen evidente nia celo, kaj kiam mi konstatis tion, mia koro ekbatis pli rapide. La grupo sur la podio konsistis nur el virinoj kaj infanoj, el kiuj multaj estis katenitaj kiel ni. Mian okulon tuj trafis brilkolora makulo: temis pri la konata ŝtofo kun la kvadrata desegno, kiu elstaris inter la apudaj pli palaj nuancoj kiel papavo en kampo de tritiko. Ĝi apartenis al alia grupo de junaj virinoj, kiuj povis deveni nur de trans la maro. Ni timis tro videble signali al ili, sed estis klare, ke ili vidis nin, kaj ni intersalutis nin laŭeble perokule tra la spaco, kiu disigis nin. Certe ili estis de nia popolo, eĉ se ni ne konis ilin. Eble ili estis de la vilaĝoj proksime al la maro.

Oni kondukis nin sur la podion, de kie ni povis rigardi malsupren al la vizaĝoj - ĉiuj

Ŝajnis esti viraj - en la suba spaco. Mi jam ŝvitis pro timo. La sufoka doloro denove sentiĝis en mia brusto kaj mi apenaŭ povis spiri. Mi tute ne komprenis la situacion, kaj permesis ke oni pelu min kvazaŭ blindulon de unu loko al alia, dum diversaj ritoj estis plenumataj super ni. Ĉar jam estis klare al mi, ke oni oferos nin.

Kiel unuan aferon, oni blankigis niajn piedojn per kreto. Kiam mi vidis miajn piedojn en la blankigitaj volvaĵoj, subita bildo aperis en mia menso. Tiel aspektis miaj piedoj, grimpinte la vojeton ĝis nia vilaĝo. Kaj je la memoro de tiu neniam plu vidota vojeteto, ekestis larmoj en miaj okuloj. Sed tio ne estis la fino. Al ĉiu el ni oni pendigis objekton ĉirkaŭ la kolo. Ĝi estis farita el rigida blanka materialo, kaj sur ĝi estis strangaj nigraj signoj.

Viro staris antaŭ ni ĉe la rando de la podio, kaj la sube amasiĝintaj homoj eksilentis. Li ekparolis kaj ili aŭskultis. Tiam, je mia miro, ili ĉiuj ekridegis. Mi konfuziĝis; mi tute ne atendis ion tian.

La viro hastis al ni, kaj ni time retiriĝis. Bonŝance, li ne venis al nia grupo. Li esploris per sia okulo kelkajn el la aliaj virinoj kiuj staris apude, kaj elektis knabinon proksimume dekkvarjaran en malpura blanka tuniko. Li kondukis ŝin al la antaŭa parto de la podio, kie ŝi staris kun la okuloj fiksitaj al la grundo kaj batetadis per la piedoj. Ŝajnis, ke li parolas pri ŝi. Mi havis senton, kvazaŭ bendoj streĉiĝas ĉirkaŭ mia brusto. Post momento li komencos la oferadon.

La spektantoj laŭte vokis, unu post alia. La viro respondis; li ŝajnis instigadi ilin. Mi aŭdis, ke ili incitas unu la alian ĝis stato de ekscito. Viro puŝiĝis tra la homamaso kaj saltis sur la podion. Li iris al la knabino... kaj forkondukis ŝin. Kaj tio ŝajnis al mi ĉio. Nenio pli.

Ĉi tiu sceno ripetiĝis kaj reripetiĝis. Oni elektis knabinon aŭ virinon, diversaj homoj elkriis ion, kaj poste iu saltis sur la podion kaj kondukis ŝin malsupren en la homamason. Pluraj el la virinoj estis akompanataj de malgrandaj infanoj, kaj estis eĉ kelkaj infanoj tute solaj. Unu fojon oni proponis tri malgrandajn infanojn kiel grupon. Okazis terura sceno, kiam oni apartigis la pli aĝan de la aliaj du. Ili ĉiuj ploris kaj kunkroĉiĝis, kaj necesis fortiri lin perforte. Certe li ne povis esti pli ol ok-jara.

Mi tute ne komprenis, kio okazas, sed almenaŭ ŝajnis, ke neniu estas mortigota. Cetere, la medio iel ne ŝajnis ĝusta. Mi sciis, ke la romanoj kondukas malsame ol ni, sed tamen mi estis certa, ke se ili volus fari oferon, oni sentus pli solenan etoson: oni ricevus impreson, ke temas pri speciala okazaĵo. Mi komencis nun iomete trankviliĝi, sed la aro da virinoj sur la podio estis maldensiĝanta. Baldaŭ venos nia vico.

Finfine la viro atingis nian grupon. Li ekzamenis nin, kaj per sia okulo li fiksas Boskilan. Ŝi premis sin malantaŭen kiam li alproksimiĝis, sed estis klare al ĉiuj, ke estos senutile rezisti. Li malhokis la ĉenon kaj kondukis ŝin antaŭen. Venis la kutimaj vokoj de sube, kaj baldaŭ iu venis supren kaj transprenis ŝin. Ŝi turnis sin por nin rigardi el larmantaj okuloj, dum oni forkondukis ŝin. Mi tute ne scias, kio okazis al ŝi

poste.

Unu post alia, oni portis nin antaŭen. Tri el la pli junaj knabinoj estis prenitaj de la sama viro. Mi estus enviinta ilin pro tio, ke ili rajtas resti kune, se ne temus pri la stranga reago de la homoj en la placo. Kiam la viro venis supren el la homamaso por ricevi ilin, ĉiuj komencis ridaĉi kaj akلامي laŭ malbela maniero, kiu ekstreme perturbis min. Tamen, ne estis tempo por mediti pri la afero, ĉar nun la estranto alproksimiĝis al Albila kaj mi. Ni ekkaptis niajn manojn pro teruro, sed li jam tiris ŝin firme ĉe la brako. Ŝi ĵetis al mi lastan senesperan rigardon trans la ŝultron, dum li irigis ŝin antaŭen. Kaj tiam venis mia vico.

* * *

Post mallonga tempo, mi troviĝis denove sur la strato, pelate de malgrasa viro kun maltrankvila esprimo, grizaj haroj kaj tre tufaj brovoj. Li provis alparoli min unu-du fojojn, sed vidante mian nekomprenon, li baldaŭ rezignis. Kelkfoje li prenis mian brakon, sed ĝenerale li ŝajnis atendi, ke mi sekvu lin. Kaj mi ja sekvis lin, kiel hundeto. Efektive, mia ĉefa timo estis tio, ke mi perdos lin inter la homamaso.

Kiam li rimarkis, ke estas malfacile por mi postsekvi lin, li iomete malrapidiĝis. Li ne ŝajnis malafabla, sed iom senpacienca. Unu fojon ni haltis ĉe viro, kiu havis kruĉegon kaj plurajn tasojn katenitajn al kolono. La kruĉo memorigis min pri tiu, kiun miaj patro kaj onklo aĉetis antaŭ tiom da jaroj kontraŭ la lano kiun mia patrino intencis uzi por niaj vintraj vestoj. Ni ambaŭ ricevis trinkaĵon el la granda kruĉo; ĝi havis malriĉan, acidan guston, kaj igis min tusi. Ĝi ne multe plaĉis al mi, sed mi komprenis, ke li deziras montri sian afablecon.

La urbo ŝajnis etendiĝi neimageblan distancon, kaj mi komencis demandi min, ĉu ĝi entute havas limon, kiam finfine ni alvenis ĉe grandioza pordego muntita en la plej altaj muroj, kiujn mi iam ajn vidis. Eĉ ekster la muroj la konstruaĵoj pludaŭris, sed poste ili maldensiĝis kaj maloftiĝis, ĝis finfine ni troviĝis sur vojo el plataj ŝtonegoj, kiu kondukis inter kampoj. Trafluis min fortega sento de senpeziĝo. Mi ne vidis verdajn kreskaĵojn de kiam oni portis min en la ŝipon. Mi spertis momentojn dum la pasinta monato, kiam tiom intensiĝis mia sopirego al herbo kaj arboj, ke ĝi preskaŭ kaŭzis al mi fizikan doloron.

Pluraj ĉaregoj staris atende ĉe la flanko de la vojo, kaj iliaj veturigistoj sidis apude en malgrandaj grupetoj, dum bovoj kaj muloj paŝtiĝis en la proksimeco. Vidante nin, unu el la viroj tuj ekstaris kaj mansvingis. Post kelkaj minutoj mi trovis min sur ĉaro tirata de mulo; mi sidis sur la antaŭa loko inter la du viroj, kiuj paroladis ĉirkaŭ mi kvazaŭ mi ne ĉeestus.

Dum la ĉarego saltetis sur la ŝtonoj, ili malvolvis tukojn kaj elprenis panon, fromaĝon

kaj pomojn, kiujn ili dividis kun mi. Ĉio gustis tre malsame ol la manĝaĵoj, kiujn mi konis, sed almenaŭ ĝi ne havis tiun malagrablan fiŝecan nuancon, kiu tratremis ĉion, kion mi ricevis de la romanoj. Mi estis nun pli trankvila post mia antaŭa timego, kaj komencis senti min iom pli sekura. La du viroj ŝajnis sufiĉe amikemaj, kaj mi ne havis impreson, ke ili intencas mistrakti min, kvankam mi konsciis esti komplete en iliaj manoj.

Parolinte kune dum ioma tempo, ili ekatentis pri mi. La grizharulo gestis al si mem kaj diris malrapide kaj klare: “Demetrio”.

“Anto,” diris la alia.

Mi rigardis kaj aŭskultis, sed mi estis tro konfuzata de la tuta situacio por povi reagi. Sed nun ili gestis al mi; eble ili deziris, ke mi diru mian nomon. Mi provis paroli, sed mia voĉo ŝajnis perdiĝinta. Finfine, kun miaj okuloj fiksita al la piedoj, mi sukcesis eligi “Bivana”.

“Pivala?” demandis unu.

“Bilana?” diris la alia.

Mi ne komprenis, kial tiel simpla nomo kaŭzas al ili tiom da malfacilaĵoj. “Bivana”, mi diris pli laŭte. Ĉi-foje ili sukcesis ripeti ĝin ĝuste, kaj poste ili lasis min regliti al miaj propraj pensoj dum ili pluparoladis preter mi.

La pavimita vojo kondukis antaŭ ni tra montetoj kaj kampoj. Estis kvazaŭ mi vekigis el terursonĝo, kaj la spertoj de la antaŭa tago jam komencis paliĝi ĝis nerealeco. Estis vere, ke la kamparo estis tre malsimila al tiu de mia hejmo, tamen kompare kun la urbo ĝi konsolis min per sia rekonebleco. La ĝenerala impresio estis surprize verda, kaj estis multe pli da arboj ol troviĝis en mia propra lando, kvankam la folioj estis flavaj kaj falontaj. Mi jam perdis la kalkulon de la tagoj, sed mi supozis, ke ni verŝajne alproksimiĝas al Samono.

La kamparo donis impreson de prospero kaj fekundeco, kun paŝtejoj plenaj je ŝafoj kaj bovinoj. En kampo post kampo kreskis speco de grimpanta planto, kiun mi neniam vidis antaŭe, aranĝita laŭ bele ordigitaj vicoj kun aroj da grandaj verdaj aŭ nigraj beroj. Sed unu afero timigis min: multaj el la homoj laborantaj en la kampoj estis katenitaj. La plejmulto aspektis konsternite maldikaj kun ĉifonaj vestoj, kiuj malkaŝis vipospurojn sur iliaj dorsoj. Kelkaj havis razitan kapon kaj cikatron sur la frunto. Mi demandis min maltrankvile, ĉu tia sorto atendas ankaŭ min, kvankam laŭ mia impresio, ĉi tie temas nur pri viroj. Sed nun, sidante komforte kun plena stomako sur ĉarego, mi apenaŭ povis kredi, ke la afero finiĝos tiel malbone. Ni pasis preter multaj konstruaĵoj, sed mi vidis neniujn similajn al la kabanoj kaj domaroj, je kiuj mi kutimis. Ofte la domoj estis arigitaj malantaŭ altaj muroj, iom kiel la vilaĝoj de mia propra lando. Sed anstataŭ lokiĝi sur la montopintoj, la plejmulto el ĉi tiuj estis en la ebenaĵo. Estis klare, ke la romanoj estas tute sen timo pri atako.

La vojo estis eksterordinare trafikoplana. Ĉiumomente ni preterpasis ĉaregon aŭ marŝantajn homojn kun ŝarĝoj sur la dorso. Ofte ni vidis grupetojn de viroj, kiuj kune portis sur la ŝultroj grandan objekton el ligno, kies flankojn kaŝis pendantaj faldoj de ŝtofo. Foje la ŝtofo estis tirita al unu flanko, kaj interne mi vidis viron aŭ virinon, kiu kuŝis en plena komforto. Nin mem konstante preterpasis pli rapidaj vojaĝantoj surĉevale aŭ, je mia surprizo, en batalĉaroj. Mi ĉiam aŭdis, ke la romanoj ne havas batalĉarojn.

Plurfoje ni pasis apud bandoj de viroj aŭ virinoj, kiuj per pezaj paŝoj marŝis en katenoj. En unu grupo mi vidis plurajn homojn, pri kiuj mi tuj rekonis, ke ili devenas de la sudaj reĝlandoj. Kelkaj tenis la okulojn fikse kaj senespere al la grundo, sed la aliaj levis al mi la vizaĝon kaj ni interŝanĝis senhelpajn rigardojn. Ŝajnis al mi, ke envia esprimo flagras momentete en iliaj mienoj. Sidante sen katenoj sur ĉaro, mi estis jam en pli bona situacio ol ili.

La tagmezo estis jam for, kiam ni alvenis ĉe aro da konstruaĵoj ĉirkaŭata de alta muro. Ni veturis internen laŭ la pordego kaj trovis nin en granda korto. Laŭ la du flankoj estis vico de konstruaĵoj kun pajlaj tegmentoj, kaj en la mezo laĝeto por anseroj. Al mi la ejo aspektis preskaŭ kiel malgranda vilaĝo. Kokinoj diskuris antaŭ la radoj de nia ĉarego, dum ni veturis malrapide ĝis unu el la pordoj.

Tie Demetrio saltis al la grundo, kaj mi sekvis lin en tro hejtitan ĉambron, kie ni trovis pezan viron sidantan sur benko, kiu senplumigis kokon. Demetrio puŝis min antaŭen, kun komento kiun mi ne komprenis. La alia viro rigardis min kritike, kvazaŭ li estis ne aparte kontenta pri tio, kion li vidis, kaj komencis grumbli. Sed Demetrio nur levis siajn ŝultrojn indifere. Parolante tre laŭte, kvazaŭ li supozus min surda, li gestis al la viro kaj diris: "Fortunato". Post tio li turnis sin por eliri. Mi intencis sekvi lin, sed Fortunato tuj leviĝis kaj kaptis mian brakon. Li kondukis min al granda ligna bloko, kie kuŝis pluraj mortaj kokoj. Kaj do, post nur kelkaj minutoj, jen mi staris antaŭ tranĉobloko kaj senplumigis kokinon.

Ĉio ĉi tiom diferencis de miaj antaŭatendoj, ke mi estis tute konfuzita. Iel mi neniam imagis, ke mi finiĝos en ĉambro kun nekonata viro, por senplumigi kokinon. Ĉu ĉi tio estas la plano, kiun la romanoj antaŭvidas por mi? Ĉu ĉi tie mi restos?

Estis monteto da kokoj sur la bloko: eble kvar aŭ kvin. Mi apenaŭ povis imagi, kial iu ajn volus mortigi tiom en unu fojo. Ĉu oni eble pretigas festenon? Pro la fajrego, kiu brulis sur altigita fajrejo ĉe unu flanko de la ĉambro, la aero estis malagrabla varma, malgraŭ la larĝe malfermitaj pordo kaj fenestro. Sed kompreneble: la tuta konstruaĵo estis farita el ŝtono, eĉ la tegmento. Estis kvazaŭ mi starus sur la planko de giganta forno por bakiĝi kiel pano.

Kvankam senplumigi kokojn neniam estis laboro, kiu aparte plaĉis al mi, la ordinareco de la tasko donis al mi pli sekuran senton. Ĉirkaŭate de la plej stranga situacio, almenaŭ ĉi tion mi povis rekoni. Dum mi laboris, mi memoris la lastan fojon, kiam mi senplumigis kokon. Estis kiam ni loĝis ankoraŭ en nia propra kabano, tuj antaŭ ol

translokiĝi al la vilaĝo. Mi sidis sur la grundo ekster nia pordo por fari tion, kaj intertempe venis mia patrino por diri, ke ŝi regalos nin per bakitaj pomoj, kaj ke fininte mian taskon, mi tuj venu por manĝi la mian.

Nun mia kabano estis forbruligita, kaj mi ne sciis, ĉu mia patrino vivas aŭ malvivas. Kaj se ŝi ja vivas, mi neniam havos la eblecon sciigi ŝin, ke mi senplumigas kokojn en ŝtona ĉambro.

Kiam mi pensis pri mia antaŭa vivo, la larmoj ekruliĝis laŭ miaj vangoj. Fortunato elektis tiun momenton por aliri min, muĝante pro kolero, verŝajne ĉar mia laboro malrapidiĝis ĝis nulo. Sed kiam li vidis miajn larmojn li tuj haltis, tiam frapetis min ĉe la ŝultro kaj diris ion per voĉtono, per kiu li ŝajne intencis konsoli min.

Iom poste, alta virino hastis internen. Ŝi havis tre rektan dorson kaj evidente opiniis sin tre atentinda homo. Mi malkovris poste, ke ŝi nomiĝas Eŭtikia. Ŝi tuj aliris min kaj tiris min al la pordo, kie ŝi starigis min en la lumo por atente ekzameni min. Ŝi pinĉis la ŝtofon de mia robo kaj esploris ĝin detale; kompreneble ĝi estis tute malsimila de ĉio, kion portis la romaninoj. Sed ĝi ankaŭ estis malpurega kaj mi estis malagrabla konscia pri granda sangomakulo ĉe la malantaŭo, kiu bonŝance estis pli-malpli kaŝita de la kvadrata desegno. Mia menstruo komenciĝis neatendite dum ni estis sur la ŝipo. Mi ŝiris striojn de la rando de mia ŝalo por uzi kiel ĉifonojn, sed estis malfacile ne makuli miajn vestojn en tia situacio, kaj cetere, mi estis tro indiferenta por aparte ĝeni min pri la afero.

La virino kondukis min eksteren al la korto kaj gvidis min al io, kio aspektis kiel kruta monteto kun pordo ĉe la pinto. Neniam antaŭe mi estis vidinta ŝtuparon. Kaj ĝis tiu momento mi neniam demandis min, kiel la romanoj atingas tiujn domojn konstruitajn alte en la aero. Sed ŝi jam ekiris supren, do mi grimpis poste. Alveninte ĉe la pinto, estis kvazaŭ ni denove paŝus sur ebena grundo, kaj mi baldaŭ forgesis, ke mi marŝas super la kapoj de aliaj homoj.

Mi sekvis ŝin en etan ĉambron preskaŭ komplete senluman. Ŝi malfermis la fenestroklapojn per puŝo, kaj transiris al kesto en la kontraŭa angulo. El tiu ŝi prenis plurajn robojn kaj ekzamenis ilin. Finfine ŝi elektis unu kaj sternis ĝin kontraŭ mia korpo. Ĝi estis iom mallongeta - mi estis pli alta ol la plejmulto de la romaninoj - sed ŝajne ŝi opiniis, ke ĝi konvenos, kaj transdonis ĝin al mi kune kun malpli longa tuniko. Ĝi estis de nova por mi flava nuanco. Evidente la romanoj havis tinkturojn, kiujn ni tute ne konis. Sed ĝi estis iom malinteresa, ĉar ĝi estis de nur unu koloro, sen desegno. Cetere, ĝi havis makulon ĉe la brusto.

Nun la virino gvidis min al longa ĉambro, kiu enhavis vicon de litoj - kvankam mi tiam ankoraŭ ne sciis, kio ili estas. Ŝi komprenigis al mi, ke mi surmetu la tunikon kaj la novan robon, kion mi faris kun iom da malcerteco. Ili estis kudritaj laŭ alia maniero ol la vestoj, kiujn mi kutime portis. Mia kapo apenaŭ reaperis el la kolumo, antaŭ ol ŝi venis al mi kaj komencis firme tiri la robon malsupren ĉe unu flanko kaj mallongigi ĝin ĉe la alia. Montriĝis, ke mi metis ĝin kun la dorso antaŭe. Cetere, mi sentis

malvarmeton; ĉu la geromanoj tute ne kovras siajn brakojn?

La virino prenis mian propran robon kaj kunĉifis ĝin. Evidente por ŝi temis nur pri malpurega ĉifono, kiun ŝi intencis tuj disŝiri. Subite mi komprenis, ke mi nepre devas pluteni tiun robon. Ĝi estas la sola restaĵo de mia pasinta vivo, de mia pasinta memo. Senespere mi provis rekapti ĝin de ŝi. Ŝi estis momente surprizita, sed tiam ŝi frapis min forte ĉe la brako kaj senindulge forprenis la robon el miaj manoj. Plorante, mi sekvis ŝin malsupren al la kuirejo. Mi sentis min stranga kaj fremda al mi mem en la malkutimaj vestoj. Oni estis ŝtelinta miajn harojn, oni forprenis ĉion, kio protektis min, kaj nun la sola restanta parto de Bivana estis kaŝita sub tiuj faldoj de roma ŝtofo.

Pli malfrue en tiu sama vespero, en la granda kuirejo kie oni jam laborigis min, mi renkontis la aliajn anojn de la domo. Ili estis tiomaj, ke en la komenco mi tute konfuziĝis, kaj povis nek memori iliajn nomojn, nek distingi eĉ ĉiujn vizaĝojn. Estis du-tri junulinoj, krom la pli aĝa virino kiu forprenis mian robon; estis pluraj fortikaj viroj, kelkaj infanoj, kaj diversaj aliaj. Unu viro aparte trafis mian atenton: li estis maldika kun kurba dorso, pinta vizaĝo, kaj hararo maldensiĝanta. Li ŝajnis iom apartigi sin de la aliaj; aŭ ĉu estis ili, kiuj evitis lin? Mi demandis min, ĉu temas pri la mastro de la domo. Sed tiu, kiu pleje logis miajn okulojn, estis juna virino, ne multe pli aĝa ol mi, kiu portis amason da ringoj kaj brakornamaĵoj. Ŝia haŭto estis komplete nigra. Ŝajnis, ke neniu opinias tion aparte rimarkinda, kaj ŝi gaje babilis kun la aliaj kvazaŭ ŝi estus tute ordinara. Estis io pri ŝia sinteno, kio pensigis min pri Elvisa. Ŝi enpremis sin en la liberan spacon apud mi sur la benko, kio multe nervigis min; mi timis lasi ŝian haŭton tuŝi la mian, kaj tiom kiom eblis sen ke ŝi rimarku tion, mi fortiris min al unu flanko. Ŝi estis la sola homo, kies nomon mi tuj lernis. Ŝi estis Iriso.

Ĉiuj ŝajnis tre pretaj montri sian amikemon. Mi vidis, ke ili volas helpi min hejmiĝi, tamen mi estis tro superŝutita de la amaso da novaj vizaĝoj kaj de la nekomprenebla lingvo, por provi reagi. Ĉiuj povis nur kun malfacilo ripeti mian nomon, kaj post iom da diskutado inter si, unu el la junulinoj fingromontris al mi kaj diris klare kaj malrapide: “Barbara”.

“Bivana,” mi diris.

Ŝi kapneis kun rideto. “Barbara,” ŝi ripetis.

Kaj tiel okazis, ke mi perdis ne nur miajn harojn kaj miajn vestojn, sed eĉ mian nomon.

KVARA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de tiu ĉi verko. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.net.

KVINA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de tiu ĉi verko. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.net.

LA NAZARETANOJ

SESA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de tiu ĉi verko. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.net.

SEPA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de tiu ĉi verko. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.net.

OKA ĈAPITRO

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de tiu ĉi verko. La plenan version vi povas akiri de www.retbutiko.net.

POSTSKRIBO

Dum la sekvantaj tagoj, la ekzekutoj de la kristanoj komenciĝis. Oni mortigis ilin per ĉiuspecaj kruelaĵoj por distri la publikon. Iuj estis manĝigitaj al sovaĝaj bestoj aŭ disŝiritaj de hundoj; iuj estis krucumitaj; dum aliaj estis devigataj surmeti specialajn tunikojn, kiuj tuj ekflamiĝis kiam oni tuŝis ilin per torĉo. Tiom estis mortigitaj, ke eĉ la avido de la popolanoj je tiaj scenoj satiĝis, kaj multaj homoj agnoskis sin naŭzataj de la senĉesaj spektakloj.

En la tago kiam oni anoncis ĉe nia tendaro, ke oni intencas venigi kelkajn kristanojn tiun vesperon al la ĝardenoj por servi kiel vivantaj torĉoj por nia amuzo, Filono kaj mi ekiris al Prenesto. Ni preterpasis funebran procesion tuj ekster la pordegoj de la urbo. Ĝi serpentumis malrapide laŭ la vojo akompanate de la plenda lamentado de flutoj kaj kornoj, kaj la vekrioj de la virinoj. Larmoj venis en miajn okulojn, kiam mi aŭdis ilin. Mi sciis nek la precizan tagon nek la manieron de la morto de mia filo; mi havis eĉ ne la mizeran konsolon funebri super lia kadavro aŭ adiaŭi lin per la konvenaj ritoj. Sed efektive mi ĉiam esperis, ke li ne mortos dum mi ankoraŭ vivos.

Eble la larmoj helpis min, ĉar preteririnte la tombojn, mi sentis ke mia koro iomete malpeziĝas, kaj mi komencis rigardi mian ĉirkaŭaĵon dum mi marŝis. La vojo kondukis inter kampoj, kiuj estis plejparte brunaj kaj senherbaj post la longa seka somero, sed la arboj kaj arbustoj estis ankoraŭ verdaj, kaj iliaj folioj ne jam komencis fali. Elvisa kuris gaje antaŭe. Ŝi ankoraŭ ne sciis pri Oresto, kaj ŝi jam ĉesis demandi pri li antaŭ sufiĉe da tempo. Estis agrable denove marŝi en la kamparo. Mi konstatis kun surprizo, ke dum mia multjara loĝado en Romo, mi neniam povis paŝi libere. Ĉiam necesis puŝi sin tra tro plenaj stratoj, kaj premiĝi inter aliaj homoj.

Elvisa malrapidiĝis post iom da tempo, kaj fine mi devis porti ŝin. Filono komentis kun nekutima zorgemo, ke ŝi verŝajne estas peza, kaj proponis mem preni ŝin, kiam mi laciĝos. Sed malgraŭ lia helpo, ni ne plu marŝis tiel rapide kiel antaŭe, kaj kiam noktiĝis, ni estis apenaŭ preter Gabio. Ni pagis kelkajn asojn al kamparano por dormi en lia fojnejo. Estis jam tro malvarme por tranokti ekstere sen almenaŭ kroma tuniko por uzi kiel kovrilon, sed mi kaj Filono jam delonge perdis ĉiujn vestojn krom tiuj, en kiuj ni staris.

Mallonge antaŭ la sekva tagmezo, ni pasis sub la malgranda monteta urbo, kiun mi tiel ofte vizitadis, kiam mi estis sklavo. Mi serĉis per miaj okuloj la bone konatan vojeton, kiu kondukis tra la deklivoj al la vilao. En alia okazo mi estus sugestinta, ke ni interrompu tie nian vojaĝon, aŭ eble eĉ Filono mem estus proponinta tion. Sed hodiaŭ ni ambaŭ silentis. Mi kredas, ke li same kiel mi volis eviti la renkontiĝon kun malnovaj geamikoj kaj la neceson respondi iliajn bonintencajn demandojn.

Ni alvenis al Prenesto malfrue en la posttagmezo, kaj mi sekvis Filonon tra reto de interkruciĝantaj stratetoj al la skribejo de Stefano. Filono lasis min kaj Elvisan ekstere dum li eniris por serĉi sian bofraton; laŭ mia impresio, li ne estis certa, kian bonvenon

ni ricevos. Sed post kelkaj minutoj li reaperis ridetante, kun Stefano ĉe sia flanko. Stefano brakumis min kaj Elvisan, kaj kondukis nin internen.

Baldaŭ ni kuŝis sur elegantaj benkoj en tute malgranda enmura ĝardeno, dum sklavo portis al ni tasojn da akvumita vino sub la atenta okulo de Valeria, la bofilino de Stefano. La gekuzoj de Elvisa jam forportis ŝin por ludi; ili aĝis nur kelkajn jarojn pli ol ŝi.

Stefano estis kontentega revidi nin, ĉar li estis supozinta nin ĉiujn mortigitaj en la brulego. Li diris al ni, ke li provis informiĝi pri ni pere de sia eklezio, kaj malkovris, ke la sinagogo de Filono estis forbruligita kun granda parto de la preĝantaro interne. La nazaretanoj ricevis iom da malbonvena atento ankaŭ en Prenesto, li diris, kaj lin mem oni alvokis antaŭ la juĝiston por pridemandado. Sed la juĝisto estis unu el liaj malnovaj klientoj, kiu forsendis lin post indulga admono, ke la nazaretanoj restu silentaj kaj evitu la publikan atenton dum iom da tempo. Tial la nazaretanoj ne plu kunvenadis, kaj kelkaj eĉ reiris al la regulaj diservoj en la templo. Stefano tamen ĉesis iri; lia rilato kun la tradiciistoj estis nun tro streĉa. Malgraŭ tio, li plutenis la kutimon fermi sabate sian butikon.

Li rakontis, ke lia entrepreno kreskis kaj prosperis dum la jaroj post lia alveno en Prenesto. Lia edzino, la fratino de Filono, mortis antaŭ kelkaj jaroj, sed ne antaŭ ol vidi la elaĉeton el la sklaveco de ĉiuj siaj gefiloj. Stefano nun loĝis en vasta kaj multekoste dekorita apartamento, kune kun siaj filo kaj bofilino kaj iliaj infanoj.

Li diris al Filono, ke li ricevas pli da laboro ol li sukcesas plenumi, kaj ke lia filo ofte provis konvinki lin malfermi duan kopiejon. “Sed mi ne plu estas juna kiel antaŭe,” li klarigis, “kaj mi ne scius kion fari sen la helpo de Febo. Li daŭre ĝenas min, ke mi serĉu bonan laborestron. Sed ne plaĉas al mi la ideo lasi la entreprenon en la manoj de sklavo. Tio estas la plej rapida maniero perdi sian investaĵon.”

Li komencis rakonti al Filono, ke Febo interesiĝas pri neokupata ejo en la sama strato por kiu oni serĉas luanton; li volis, ke Filono akompanu lin tien en la mateno por rigardi ĝin. Intertempe, Valeria sidiĝis apud mi sur la divano kaj demandis, ĉu mi ne trovos Preneston tre senekscita kaj enuiga post la vivo en Romo. Ŝi estis vere dolĉa kaj ankoraŭ tre juna, eĉ se ŝi jam havis du infanojn, kaj mi estis kontenta, ke Elvisa kaj mi trovis novan hejmon, kie ni finfine povos ekloĝi ĉirkaŭate de nia familio.

* * *

Nia nova kopiejo troviĝas en la sama strato kiel tiu de la bofrato de Filono, kaj tiel proksima, ke Elvisa povas kuri tien por ludi kun siaj gekuzoj, kiam ajn ŝi deziras. Ni loĝas en la butiko, en malgranda flanka ĉambro, kiel ni faris dum tiom da jaroj en Romo. Sed Stefano sendas al ni abundon da laboro kaj nia klientaro kreskas rapide;

se la afero daŭros ĉi tiel, baldaŭ ni estos en situacio preni apartan loĝejon. La luprezoj estas multe malpli altaj ĉi tie ol ili estis en Romo. En Prenesto eblas trovi teretaĝan apartamenton kun la propra akvoprovizo kaj ĝardeno, kontraŭ malpli da mono ol oni pagus en Romo por malvasta subtegmentejaĉo sur la kvara etaĝo.

Multaj homoj havas dometon tuj ekster la muregoj, kie estas spaco por teni kokinojn kaj kreskigi legomojn. Ankaŭ mi ŝatus loĝi tie, sed mi scias, ke mi neniam sukcesus konvinki Filonon forlasi la urbon. Tamen, eĉ de la urbocentro estas nur mallonga vojo ĝis la pordegoj, kaj mi kaptas ĉiun pretekston por eliri kun Elvisa en la kamparon. Finfine mi povas instrui al ŝi ĉiujn aferojn, kiujn mi de ĉiam deziras: kiel rekoni la naturajn herbojn, kaj kiel nomi la arbojn kaj plantojn.

Ankaŭ Filono volas ekinstrui ŝin; li montras pri ŝi pli da intereso, nun kiam ni perdis Oreston. Antaŭ kelkaj tagoj li diris al mi, ke estas tempo ke ŝi lernu legi kaj skribi. Tio ne estas malbona ideo; ili estas utilaj scioj, eĉ por knabino. Sed mi ne kredas, ke li trovos Elvisan tiel facile kondukebla, kiel estis Oresto.

Kiam ajn mi iras al la banejo aŭ la bazaro, mi levas miajn okulojn al la ŝtona senarba monto, kiu staras alte super la urbo, kun la grandega templo de Fortuno lokita sur ĝia flanko. Vidante ĝin, mi memoras, ke mi ankoraŭ ne donis al la diino la dankoferon, kiun mi promesis al ŝi. Sed mi ŝparas mian monon, ason post aso, kaj kion ajn Filono volas diri pri tio, mi intencas iri tien en la printempo por repagi al la diino mian ŝuldon. Mi scias, ke ŝi faris sian eblon por mi, eĉ se ŝi ne sukcesis savi Oreston. Se homo insistas forĵeti sian vivon, eĉ diino ne povas multon fari por malhelpi tion.

Tiel multe okazis post kiam oni forportis min de mia malgranda vilaĝo antaŭ tiom da jaroj! Vidante min nun, dum mi marŝas al la bazaro kun mia korbo sur la brako kaj mia filineto kiu saltetas ĉe mia flanko, malmultaj homoj divenus kian historion mi povus rakonti, se oni petus. Kaj eble, se oni efektive petus, mi tro emfazus la malbonajn tempojn, kvazaŭ tiuj pli malĝojaj momentoj sufiĉus por forviŝi ĉiujn pli feliĉajn jarojn, kiuj okazis antaŭe. Ĉar mi ja spertis ankaŭ feliĉajn tempojn, kaj se mi konsideras mian propran vivon, mi ne dirus, ke la malbonaj tempoj superpezis la bonajn.

BIBLIOGRAFIO

Verkistoj de historiaj romanoj ne kutime agnoskas siajn fontojn, eble ĉar la haveblaj faktoj ĉiam estas kungluitaj per densa tavolo da fantazio. Tamen, mi deziras agnoski mian ŝuldon al pluraj aŭtoroj, kies verkoj ludis gravan rolon en mia provo rekonstrui la vivomanierojn de la keltoj, la romianoj kaj la fruaj kristanoj. La sekvanta listo ne celas esti kompleta bibliografio de ĉiuj libroj konsultitaj dum la verkado de La Ŝtona urbo, sed montras nur tiujn, kiuj plej multe influis min.

A Celtic Miscellany: Translations from the Celtic Literatures, K.H. Jackson: Penguin, 1971.

Iron Age Farm: The Butser Experiment, P.J. Reynolds: British Museum, 1979.

The Druids and their Heritage, Ward Rutherford: Gordon & Cremonesi, 1978.

The Coming of Rome, John Wachter: Paladin, 1979.

The Roman Conquest of Britain, AD 43-57, D.R. Dudley kaj G. Webster: Batsford, 1965.

The Satyricon, Petronius, tr. J.P. Sullivan: Penguin, 1977.

The Sixteen Satires, Juvenal, tr. Peter Green: Penguin, 1974.

Daily Life in Ancient Rome, Jérôme Carcopino, tr. E.O. Lorimer: Peregrine, 1978.

As the Romans Did: A Sourcebook in Roman Social History, Jo-Ann Shelton: OUP, 1988.

Women in Roman Law and Society, Jane F. Gardner: Croom Helm, 1986.

The Jews in the Roman World, Michael Grant: Weidenfeld & Nicolson, 1973.

Saint Paul, Michael Grant: Weidenfeld & Nicolson, 1976.

Tiuj verkistoj provizis min per la bazaj faktoj. Pri la maniero laŭ kiu mi utiligis tiujn faktojn, ili kompreneble ne respondecas.

Krome mi dankas Alan Heusaff de la Kelta Ligo kaj d ron N.J.A. Williams de University College, Dublino, pro iliaj valoregaj konsiloj kaj helpo rilate al la trovado de taŭgaj nomoj por miaj keltaj roluloj.

Dankojn ankaŭ al Claude Piron kaj al mia edzo, Renato Corsetti, kiuj zorge tralegis la esperantlingvan manuskripton por atentigi pri anglismoj kaj malklaraĵoj, kaj kiuj faris multajn utilajn sugestojn rilate al la stilo. Laste, mi dankas Gerrit Berveling pro liaj konsiloj pri transskribado de latinaj nomoj, kaj Chris Declerck, kies tre atenta kontrolo kaptis plurajn nerimarkitajn malglataĵojn.

KLARIGOJ PRI LA TRADUKO

La vortprovizo

Poeto ne estas kontenta pri la jamaj vortojmalproksima, fora kaj distanca, kaj pensas, ke estus bele, se ekzistus ankaŭ la vorto lontana. Alia ne ŝatas lontana, kaj anstataŭe decidas uzi dista. Ŝajnas, ke por ili Esperanto ne estas vivanta lingvo, sed speco de duonkuirita supo, en kiun ĉiu rajtas ĵeti sian karoton. Intertempe la du novaj vortoj aldoniĝas al la esperanta vortaro, kiu riskas rapide iĝi same ampleksa kiel tiu de la angla.

Ĉiu lingvo kompreneble devas evolui kaj kreski. Novaj konceptoj nature postulas novajn vortojn. Sed se oni rigardas la naciajn lingvojn, oni rimarkas, ke la kresko okazas ĉefe en la kampo de novaj inventaĵoj, procedoj, sociaj konceptoj kaj simile. Malofte okazas, ke lingvo akiras novan vorton por tute baza koncepto kiel malproksima, kaj oni malatentus aŭ eĉ mokus homon kiu provus proponi tian vorton.

Konsiderante ĉion ĉi, mi decidis uzi en ĉi tiu libro (kiu fakte estas traduko de romano, kiun mi verkis originale en la angla), nur tiujn vortradikojn, kiuj jam havas longan tradicion en nia lingvo. Mi provis uzi laŭeble nur fundamentajn radikojn, inkluzive de tiuj aprobitaj de la Lingva Komitato kaj la Akademio en la ok Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro. Fundamentaj radikoj estas indikitaj en Plena Ilustrita Vortaro (PIV) per steleto, dum la ciferoj 1 ĝis 7 signifas, ke la koncerna radiko estas registrita en unu el la unuaj sep Oficialaj Aldonoj. La oka estis eldonita nur post la apero de PIV, kaj estas trovebla en Aktoj de la Akademio II. 1968-1974. La fakto, ke difinita vorto aperas en PIV, ne en si mem montras, ke tiu vorto ricevis oficialan aprobon.

Mi uzis neoficialigitajn vortojn nur kiam tiuj ŝajnis al mi absolute necesaj, aŭ kiam ili estas tiel vaste uzataj, ke vere ne havus sencon eviti ilin. Cetere, kiu imagus, ke tiel ordinaraj, kaj ŝajne nemalhaveblaj, vortoj, kiel ekzemple mesaĝo, tribo, peniso kaj investi, neniam ricevis oficialan sankcion? Ĝenerale, uzante neoficialajn vortojn, mi preferis tiujn, kiuj aperis jam en Plena Vortaro (PV), kaj do havas historion de almenaŭ sesdek jaroj.

Sekvas listo de la neoficialaj radikoj, kiujn mi uzis en la romano, escepte de kelkaj teknikaj terminoj kiel plantonomoj, romiaj moneroj kaj similaj. (Mi volonte ricevos informojn pri iuj eventuale preteratentitaj.)

Agnoski, alianco, anheli, areo, bankedo, baŭmi, blufi, bolto, cico, cirkumcidi, ĉampiono, defio, dekori, deprimi, drasta, drivi, druido, ekspedicio, ekzotika, etoso, farĉi, fascino, feki, fekunda, fibulo, galimatio, gapi, generi, graki, grunti, gvati, hasti, heni, hororo, implici, investi, kaco, kikero, komato, komenti, koncipi, kramfo, kriĉi (birda krio), kulmino, kultivi, lanĉi, menstruo, mesaĝo, mimi, mutili, nito, orlo, ostaĝo,

peniso, persvadi, perturbi, perversa, pisi, pluki, poleno, prepucio, prestiĝo, pulso, razeno, retreti, skafaldo, snufi, spekti, stagni, staplo, stiri, stoko, stufi, stumbli, sturmi, sugesto, ŝablono, ŝminko, ŝoko, ŝtormo, taŭzi, teamo, testo, torturi, trako, treti, tribo, unĝento, versio, vilao.

La solaj veraj neologismoj, kiujn mi mem kreis por ĉi tiu traduko, estas la nomoj de la du plej gravaj keltaj festoj: Belteno kaj Samono.

Kontrolante la precizan signifon de difinitaj vortoj, mi plurfoje malkovris surprizan mankon de akordo inter PIV kaj PV, laŭ kiu PIV malrekomendas aŭ eĉ subpremas difinojn, kiuj troviĝis en la pli frua vortaro. (Vidu, ekzemple, ŝati, rim. 1 kaj 2, kaj konsideri 3 laŭ PIV; agnoski 1 laŭ PV.) En tiaj okazoj mi sekvas Plenan Vortaron, kies difinoj ŝajnas al mi pli bone akordiĝi kun la komuna lingvouzo.

Restante interne de iom mallarĝa limo, foje okazas, ke oni malkovras riĉaĵon, kiun oni estus povinta preteratenti, se oni vagus tra pli vasta kampo. Uzante nur oficialajn radikojn plus tiujn listigitajn supre, mi konstatis, ke tamen neniam mankas al mi la ebleco redoni ĉiujn nuancojn de la angla originalo; aliflanke la neceso serĉi sinonimojn devigis min eluzi ĉiujn eblecojn de la vortokunmetado en Esperanto. Ioman mankon mi rimarkis nur kiam temis pri sinonimoj de la vorto krei, sed mi faris mian eblon per tiaj esprimoj kiaj kriegi, kriaĉi, voki, eligi ŝiran krion, akre krei, tondri, muĝi, bleki kaj tiel plu.

Kompreneble, kontroli la oficialecon de la radikoj kaj serĉi sinonimojn postulis pli da tempo kaj da pensado ol simple transpreni jam pretajn vortojn el alia lingvo. Sed kial ni rajtas supozi, ke traduki plenlongan libron ne postulu iom da mensa streĉo?

Gramatikaj konsideroj

Sinsekvo de tempoj

Mi kelkfoje ricevas la impreson, ke ne ĉiuj esperantistoj konas la gramatikan regulon pri sinsekvo de tempoj. Tial mi permesas al mi ripeti ĝin ĉi tie (vidu la paragrafon 234 en Plena Analiza Gramatiko por pli detala traktado). Laŭ la regulo en Esperanto, en kazoj de nereкта parolo, la citataj vortoj konservas la saman tempon, kiun ili havas en la origina frazo, ekzemple:

Rekta parolo: Ŝi diris, “Mi fartas bone”.

Nerekta parolo: Ŝi diris, ke ŝi fartas bone.

Mi ne vidas grandan diferencon inter la frazo, Ŝi diris, ke ŝi fartas bone, kaj aliaj de la speco : Li pensis, ke ŝi fartas bone; Li sciis, ke ŝi fartas bone; Li vidis, ke ŝi fartas bone. Tial, ankaŭ en tiaj strukturoj mi konservas la originan tempon, same kiel ĉe la nerekta parolo. (Por pli detala diskuto, vidu la paragrafon 271 en PAG.)

Tradukante mian propran verkon el la angla, mi konstatis, ke en la originalo mi tre ofte uzis strukturon, kiun oni eble povus nomi “kaŝita nereкта parolo”. Temas pri frazoj, kiuj reprezentas la pensojn aŭ atendojn de la ĉefa rolulo, sed kiuj ne estas enkondukitaj de klara markilo kia: Mi pensis, ke... aŭ Mi sciis, ke...

Jen du ekzemploj:

As they approached the outer gateway, we children scrambled ... to the top of the inner rampart, where we would have a good view as the strangers came through the gates.

We found the village in chaos when we arrived. ... Not only my family, but everyone who lived in the outlying homesteads was moving within the safety of the ramparts. Fortunately, the animals could be pastured outside for the time being. There would be time enough to bring them in once the first Romans came into view.

En la angla, tiu strukturo estas nemiskomprenbla, ĉar ĝi estas markita per la uzo de la kondicionala tempo. Tio certe ne estus la ĝusta tempo en Esperanto, kaj mi ne trovis alian solvon ol uzi la simplan estontecon.

Dum ili alproksimiĝis al la ekstera pordego, ni infanoj kurgrimpis ... ĝis la pinto de la interna remparo, de kie eblos bone vidi kiam la fremduloj eniros la pordegon. ([Vidu la kuntekston.](#))

Ni trovis la vilaĝon en plena ĥaoso, kiam ni alvenis. ... Ne nur mia familio, sed ĉiuj kiuj loĝis en la ĉirkaŭaj domaroj venis por serĉi sekurecon interne de la remparo. Bonŝance la brutojn oni povis ankoraŭ paŝti ekstere, almenaŭ provizore. Sufiĉos la tempo por reporti ilin internen, kiam ekaperos la unuaj romanoj. ([Vidu la kuntekston.](#))

Mi devas konfesi, ke tute ne plaĉas al mi tiu subita salto al la estonta tempo, kiu trafas sufiĉe strange en Esperanto, sed mi ne sukcesis elpensi pli bonan solvon. Se mi estus verkinta la libron rekte en Esperanto, verŝajne mi estus aldoninta la markilojn: ni sciis, ke ... kaj Oni opiniis, ke ...

Interpunkcio

Ne ekzistas en Esperanto unueca regulo pri interpunkcio. Ĝenerale oni apartigas subordigitajn propoziciojn de la cetera parto de la frazo per komoj. En la praktiko mi trovas, ke tiu kutimo emas tro multe diserigi la frazon, precipe se ĝi estas longa kaj komplika. Tial mi ofte preferas pli “maldensan” interpunkcion, kiu laŭ mi ebligas pli fluan legadon.

Rilate al la maniero esprimi citaĵojn, rapida trarigardo de la teksto montros, ke mi sekvas la britan kutimon. Mi faras tion ĉar mi mem estas angla, kaj aliflanke mi ne vidis apartan kialon por favori alian sistemon.

Traktado de propraj nomoj

Keltaj

La antikvaj keltoj estis antaŭskriba popolo. Iliaj nomoj foje konserviĝas en latinaj tekstoj kaj per skribaĵoj sur ŝtonoj aŭ moneroj el la romia epoko. (En Britujo, fakte, eĉ antaŭ la romia invado cirkulis moneroj, sur kiuj estis skribitaj la nomoj de la tribaj reĝoj.) Tiuj skriboj evidente sekvis la regulojn de la latina ortografio, kaj mi sentis neniun skrupulojn kontraŭ ilia transskribado en Esperanton.

Keltaj viraj nomoj plej ofte finiĝis per -os en la nominativo, kaj mi tenas tiun finaĵon en mia traduko. Por formi la akuzativon, mi uzas la finaĵon -on (ekz. Karatakos, Karatakon). Virinaj nomoj ĝenerale finiĝis per -a, al kiu mi aldonas -n por formi la akuzativon.

Latinaj

Kiam mi verkas en Esperanto, mi kutime preferas teni personajn nomojn en la origina formo, aldonante la esperantan prononcon en krampoj. La origina formo tuj portas onin spirite al la koncerna loko; la nomoj Marcus kaj Gaius, ekzemple, nepre pensigas pri antikva Romo.

En ĉi tiu traduko, mi unue intencis uzi tiun sistemon, sed mi baldaŭ trovis min en rapide densiĝanta kaĉo. La latina literumado relative bone funkcias por la nominativo, sed kion fari pri la akuzativo? Eĉ tiel simpla nomo kiel Arescusa (prononco: areskuza) prezentas malfacilaĵojn. Per la aldonado de -n naskiĝas misforma bastardo (Arescusan) kun latina radiko kaj esperanta finaĵo. Kiam temas pri Fortunatus kaj Gaius, la problemo estas eĉ pli evidenta. Ĉu oni diru Fortunatuson kaj Gaiuson? Aŭ ĉu forigi la finaĵon: Fortunaton kaj Gaion? Neniu solvo estas kontentiga. Tial mi malvolonte decidis pri plena esperantigo de la latinaj nomoj; efektive, mia propra sperto konvinkis min, ke tio estas la sola praktika solvo.

Decidinte esperantigi la nomojn, mi tuj troviĝis antaŭ nova problemo: tiu pri la sistemo de transskribado. La nomo Julio Cezaro (origine: Iulius Caesar) donas al ni preskaŭ ĉiujn regulojn por la esperantigo de latinaj nomoj: I, funkciante kiel duonvokalo, kiel ĉi tie, iĝas J; C restas antaŭ E kaj I (antaŭ aliaj literoj, tamen, ĝi iĝas K); la grupo AE simpliĝas al E; intervokala S iĝas Z. Notu la akcenton: la latina formo estas Iúlius, sed en Esperanto oni prononcas Julío.

Sed restas lasta problemo, kaj rapida kontrolo en PIV montras, ke en Esperanto regas plena konfuzo. Temas pri la relative granda grupo de latinaj nomoj, kiuj havas unu formon en la nominativo kaj alian en la ceteraj kazoj. Ĉi tiun problemon ilustras la tri

nomoj Nerono, Marso kaj Venuso. Jen parto de ilia deklinacio en la latina:

Nominativo: Mars Nero Venus

Akuzativo: Martem Neronem Venerem

La esperanta formo baziĝas sur la nominativo en la kazo de Marso, sed sur la malnominativo en la kazo de Nerono. Rilate al Venuso, la situacio iĝas eĉ pli komplika: PIV rezervas ĝin nur kiel la nomon de la planedo, dum por la diino ĝi rekomendas Venera (kaj, cetere, donas du zamenhofajn ekzemplojn de Venero). Sama distingo ne troviĝas ĉe Marso, kiu rilatas kaj al la dio kaj al la planedo. Alivorte, en Esperanto ne ekzistas konsekvenca regulo, kvankam mi rimarkas tendencon uzi la nominativon nur kiam tio finiĝas per -s (ekz. Marso, Iriso, Hermeso).

En mia traduko, mi decidis ĝenerale uzi la malnominativon kiel radikon, tamen mi rezervas la rajton esti ne pli konsekvenca ol PIV.

Anna Löwenstein

NOTOJ

[Noto 1](#) Pri la traktado de keltaj nomoj, vidu la sekcion “Klarigoj pri la traduko”, p. 341.

[Noto 2](#) Kiam temas pri civitanoj de la romia imperio, oni kutime parolas pri “romianoj” kaj ne “romanoj”. Tio tamen kondukas al iom ĝena neceso distingi inter la du konceptoj, kion la tiutempaj homoj certe ne faris. Tial en ĉi tiu verko - t.e. en la teksto mem - mi ĉiam uzas nur la vorton “romano”, ĉu rilate al la loĝantoj de la urbo Romo, ĉu rilate al civitanoj de la pli vasta imperio.

[Noto 3](#) Festo en la unua tago de la kelta nova jaro (1a de novembro).

[Noto 4](#) La keltoj ofte transdonis siajn infanojn post la nasko por vartado ĉe alia familio, kun la celo krei reciprokajn kunligojn inter la familioj.

[Noto 5](#) Sudangla tribo de tiu epoko, najbara al tiu de Bivana.

[Noto 6](#) Malalta arbo, kreskanta en kalkaj regionoj, kun venenaj semoj (latine: euonymus europaeus). En la angla ĝi nomiĝas spindle tree (ŝpinilarbo) pro sia tre glata ligno, aparte taŭga por fari ŝpinilojn.

[Noto 7](#) Flava floreto, kreskanta precipe en kalkaj regionoj, kun la latina nomo blackstonia perfoliata (angle: yellow-wort). Ĉar ĝi apartenas al la familio de la gencianoj, mi nomas ĝin ĉi tie flava genciano.

[Noto 8](#) Al la visko, parazita planto kiu kreskas sur arboj, la keltoj atribuis magiajn proprajojn.

[Noto 9](#) Romia nomo de Milano.

[Noto 10](#) Brillkolora verda skarabo, kiu vivas en rozoj kaj flugas kun laŭta zumado.

[Noto 11](#) Romia arĝenta monero.

[Noto 12](#) Havenurbo proksima al Romo.

[Noto 13](#) Junono estis la ĉefa romia diino kaj reĝino de la dioj. Kun la kromnomo Lucina, ŝi aparte okupiĝis pri naskoj.

[Noto 14](#) Dense loĝata kvartalo en antikva Romo.

[Noto 15](#) Vidu la piednoton 21.

[Noto 16](#) Laŭ la romia kalendaro, la 13a aŭ la 15a tago de la monato.

[Noto 17](#) Urbo proksima al Romo.

[Noto 18](#) Romia bronza monero de malalta valoro.

[Noto 19](#) En Romo oni organizis regulan senpagan disdonadon de greno al malriĉuloj.

[Noto 20](#) Unu el la sep montetoj sur kiuj estis konstruita Romo.

[Noto 21](#) Aludas al sistemo de interrilatoj en la antikva Romo, funkcia en ĉiu nivelo de la socio, laŭ kiu ĉiu viro serĉis la protekton de pli potenca homo (patrono).

[Noto 22](#) La romianoj mortigis nedeziratajn novnaskitojn, lasante ilin ekstere sen ŝirmo nek manĝaĵoj.

[Noto 23](#) La romianoj pasie ĝuis vetkuradon inter ĉevalteamoj, kiuj estis signitaj per malsamaj koloroj.

[Noto 24](#) Orienta diino, kies kulto populariĝis en Romo. La ekstrema fervoro de ŝiaj sekvantoj estas rigardata iom malaprobe de la instancoj.

[Noto 25](#) Kuniklo estas unu el la manĝaĵoj malpermesitaj al ortodoksaj judoj.

[Noto 26](#) La romianoj kalkulis la horojn ekde la sunleviĝo.

[Noto 27](#) Laŭorigine la dio de la vino, Bakĥo poste iĝis la centra figuro en mistikisma kulto, laŭ kiu li promesis eternan vivon al siaj sekvantoj post la morto.

[Noto 28](#) Romia nomo de Napolo.

[Noto 29](#) Unu el la sep montetoj de Romo.

[Noto 30](#) Unu el la sep montetoj de Romo.

[Noto 31](#) Partujo estis mezorianta regiono, tiutempe regata de la romianoj.

[Noto 32](#) Unu el la sep montetoj de Romo.

[Noto 33](#) Urbo proksima al Romo.

Pri la aŭtoro



Anna Löwenstein ekinteresiĝis pri la romianoj dum sia unua vizito al Italujo en 1982. La grandiozaj romiaj monumentoj tiel imponis ŝin, ke venis al ŝi la demando, kian impreson ili donis siatempe al barbaro veninta el malpli evoluinta socio. Tiel naskiĝis la ideo por La Ŝtona urbo.

Anna Löwenstein naskiĝis apud Londono en 1951 kaj instruis al si mem Esperanton kiam ŝi estis 13-jara. En 1977 ŝi eklaboris en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Dum tiu periodo ŝi fondis kaj redaktis la feminisman revuon Sekso kaj egaleco, kaj ofte verkis por la junulara revuo Kontakto. Ŝi nun loĝas apud Romo en Palestrina (la urbo Prenesto de ĉi tiu romano), kun sia edzo Renato Corsetti kaj du filoj. Esperanto estas unu el iliaj tri hejmaj lingvoj. Apud sia agado en la Esperanto-movado, ŝi faras volontulan laboron kiel konsilanto pri mamnutrado, kaj en 1995 verkis la libreton Sukcesa mamnutrado.

Kolofono

Titolo: La Ŝtona Urbo
Aŭtoro: Anna Löwenstein
Serio: Stafeto n-ro 23
Kovrilo: Julia Litvinova
ISBN de la papera eldono: 978 90 71205 77 4
UDK: 82.3.892
NUR: 340

Leĝa depono de la papera eldono: D/1998/2924/30

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140 - 2000 Antwerpen
www.retbutiko.net
© 2000 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi ekzemplero de La Ŝtona urbo estas nekompleta provversio kaj povas esti libere kopiata.

